



Antonio Marco Botella

Hispana Lirika Antologio

en esperanto

Al zaragozaj esperantistoj

Kaj mi foriros... kaj restos la birdoj kantantaj!
(Juan Ramón Jiménez)

Antonio Marco Botella

Hispana Lirika Antologio

Poetoj el la hispana liriko

en Esperanto

“Frateco”

1-a eldono, 2014

© Antonio Marco Botella
Kovrilo: Joe Bazilio Costa

Eldonis: "Frateco".
Cadena, 20, 1º. 50001-Zaragoza (Hispanio)

Presita en Hispanio
Zaragoza, 2014

Bitá eldono: 2021

ENHAVO

La origino de la hispana liriko.....	7
La naskiĝo de du popolaj versoformoj	10
Novaj sciofontoj: la disvastigo de harĉoj	15
Postaj studoj pri la harĉoj	18
La romancoj eposo-lirikaj. Kanto de Mio Cid.....	22
La Romancaro kaj la tradicia liriko	30
Romancoj kun la nova temo pri la morto.....	43
Gonzalo de Berceo (13a jc.).....	47
Juan Ruiz -Arkipastro de Hita- (1283-1355).....	50
Markizo de Santillana (1398-1458)	53
Jorge Manrique (1440-1479).....	57
Komandoro Escrivá (16a jc.)	61
La soneto laŭ itala stilo perfektigita	64
Gil Vicente (1465-1536)	65
Juan del Encina (1469-1529)	68
Joan Boscán Almogávar (1487-1542).....	70
Juan de Timoneda (1490-1583)	73
Garcilaso de la Vega (1501-1536)	76
Sankta Teresa de Ávila (1515-1582).....	82
Gutierre de Cetina (1520-1560)	89
Fray Luis de León (1527-1591).....	91
Fernando de Herrera (1534-1597)	101

San Juan de la Cruz (1542-1591)	104
Lupercio Leonardo de Argensola (1559-1613)	110
Luis de Góngora y Argote (1561-1627).....	114
Félix Lope de Vega y Carpio (1562-1635)	119
Bartolomé Leonardo de Argensola (1562-1631)..	130
Francisco de Quevedo y Villegas (1580-1645)	133
Pedro Calderón de la Barca (1600-1681)	138
Sor Juana Inés de la Cruz (1651-1695)	146
Gustavo Adolfo Bécquer (1836-1871).....	149
Rosalía de Castro (1837-1885).....	213
Manuel Machado Ruiz (1874-1947).....	219
Antonio Machado Ruiz (1875-1939)	224
Ricardo León y Román (1877-1943).....	236
Francisco Villaespesa (1877-1936).....	243
Fernando Villalón (1881-1930).....	249
Juan Ramón Jiménez (1881-1956).....	251
Pedro Salinas Serrano (1891-1951).....	256
Jorge Guillén Alvarez (1893-1984).....	260
Gerardo Diego (1896-1987)	264
Federico García Lorca (1898-1936).....	267
Dámaso Alonso (1898-1990)	296
Vicente Aleixandre y Merlo (1898-1984).....	300
Rafael Alberti Merelló (1902-1999)	304
Miguel Hernández Gilabert (1910-1942).....	311

La origino de la hispana liriko

En la historio de la hispana liriko ekzistas sorĉaj anguloj, kies legado vekas en ni ne nur la plaĉon pro la beleco de la versoj, sed ankaŭ la plezuron kiun oni sentas, kiam io ne konata brilas subite per novaj profiloj ĝis tiam ne perceptitaj. Tiel okazis al mi jam antaŭ longe, kiam mi legis unuafoje la antikvajn hispanajn kanzonaron kaj romancaron, t.e. la popola poezio, versoj grandparte anonimaj.

Tiuj poemoj havas certan delikatan belecon troveblan nur en la sovaĝaj floroj (permesu al mi la komparon) aŭ en la aromoj plej rafinitaj de misteraj lirikaj resonoj ("la plej delikataj floroj", diras la poeto Dámaso Alonso): la plej sorĉaj el la tuta poezio.

Mia surprizo estis granda, kiam okaze de miaj esploroj por studi la popolan lirikon de la 8a ĝis la 16a jarcentoj por dokumenti tiun fakon de mia verko "Lirikaj perloj de Al-Andalus", mi konstatis, ke tiu agrabla sento ne forpasis: mi ja kredis trovi en pli ol unu el tiuj versoformoj hispana-araba-hebreaj naskiĝintaj en unu el tiuj periodoj de la formiĝo de la al-andalusa liriko, la originon de tiom da poemetoj tradicie kantataj aŭ recitataj de generacio al generacio laŭlonge de jarcentoj de la popolo.

Mi klarigu tuj, ke por la universitataj studentoj de mia generacio, la hispana liriko havis sian komenciĝon kun la poemo de Mio Cid', t.e. je la 12a jarcento. Estis meritoplena tasko de pluraj fakaj sciencistoj, kiuj esplorante tra la spuroj de tiuj antikvaj ĉarmaj poemetoj venis al konkludo, ke la hispana liriko naskiĝis dum la regado de Abd-Alläh (Kordovo, 844-912), sed konvenas klarigi la temon kiel tio okazis.

Kun la veno de araboj kaj ekregado de la dinastio omaja en Iberio (la araboj nomis ĝin Al-Andalus), vekiĝis ĉe ni la inklino por la poezio: La emiro Abd-al-Rahmän la 1a komencis sian regadon en la jaro 756, restarigis en sia palaco de Kordovo unu el la tradiciaj kutimoj de la kortego omaja en Bagdado aŭ Damasko, kaj tio konsistis en la starigo inter la geservistoj de sia palaco, de kantistinoj kaj ankaŭ de poetoj, malavare pagataj de la emiro.

Kantistinoj kaj poetoj, ofte partoprenis kiel ĉefrolantoj en recitaloj okazintaj en palacaj festoj. La emiro mem verkis belajn poemojn, kaj tio, evidente, influis kaj grave konkeris la spiriton de la popolo en la amo kaj plezuro de la poezi-praktikado.

En la rezidejo de la emiro, oni parolis nur la araban lingvon, ne ĉar tiu estis la lingvo de la regantoj, sed precipe, ĉar ĝi estis la lingvo plej fleksebla kaj riĉa el tiuj

tri parolataj en Al-Andalus: krom la araba, ankaŭ la hebrea parolata ĉe la judaj kvartaloj, kaj la romanca uzata de la hispanoj, t.e. la latina en sia vulgariĝa periodo.

Post la forpaso de Abd-al-Rahmān la 1a, tiu kutimo ne nur ne perdiĝis sed enradikiĝis kaj akiris fortan impulson en popolaj medioj.

La naskiĝo de du popolaj versoformoj

Dum la regado de la emiro Abd-Alläh (844-912), unu jarcenton post la ekregado de la unua al-andalusa omajo, en unu el tiuj periodoj en kiuj la popolo ne plaĉe akceptis la ekscesojn de la Kordova povo, naskiĝis tute originala versoformo nomata moaŝaho¹.

Disvastigis tiun novaĵon Julián Ribera en 1915, kaj post studo de antikvaj manuskriptoj konfirmis tiun naskiĝon antaŭ ne longe, tri prestiĝaj arabistoj: la ĉeĥo R. Nykl, la egipto Abd al-Ahwani kaj la hispano Emilio García Gómez, kiuj certigis, ke laŭ Ibn Bassäm el Sevilo en 1109, kaj al-Hiyārī el Gvadalaĵaro en 1106, ambaŭ citis kiel realan la ekziston de du poetoj loĝantaj en Cabra (dek kilometroj sude de Kordova), kiuj inventis tiun poezian versoformon, prezentanta tri revoluciajn novaĵojn, gravaj unikaĵoj tiuepoke:

a) Mallongaj versoj (la araba metriko konsistis en sufiĉe longaj versoj).

b) Versoj grupigitaj laŭ strofoj kun ŝanĝiĝantaj rimoj (ne kiel la unurima kasido araba).

¹ Moaŝaho: (Ar. muwassaha, vorto kiu tra wisah kaj wassaha signifas "leda zono ornamita per gem-inkrustaĵoj: Versoformo inventita, laŭ kelkaj prestiĝaj arabistoj, de Mušadam ibn Mu'afa aŭ de Muammäd ibn Hammud al-Cabri "la blindulo (de Cabra, proksime al Kordova). La inventintoj estis favoratoj de la emiro Abd Allah (888-912). La moaŝaho estis versoformo verkita en klasika araba lingvo, kaj kutime uzata en popolaj medioj.

c) La poemoj verkitaj en la araba havis ĉe la versofinoj esprimojn en la hebrea aŭ en la romanca lingvoj. Tiuj versofinoj estis nomataj harĉoj kaj ofte estis recitataj aparte de la poemo-kerno.

Tiu moaŝaho, se kantata aŭ pli dialekte skribita, estis nomata zeĝelo², kiun kelkaj arabistoj opinias, ke ĝi estis inventita multaj jaroj poste kun similaj elementoj kiel tiuj de la moaŝaho. Jen ekzemplon de tiu verso-formo verkita de la mistika poeto granadano As-Sustari:

*Jen la lum' de l' bona vojo
brilis por mi en la koro.*

*Ŝprucis suno el konceptoj,
kaj la lum' el perfekteco,
vibris en mi kiel vero
kun intenso kaj fervoro.*

*Jen la lum' de l' bona vojo
brilis por mi en la koro.*

*Mi aspiras l' Amatinon.
Li dorlotis min plej plaĉa,*

² Zeĝelo: Versoformo konsistanta el du oksilabaj versoj unurimaj, kiuj funkcias kiel refreno. Poste, tri unurimaj versoj, kaj la kvara rimanta kun tiuj de la refreno. Laŭ plej elstaraj kompetentuloj pri la temo, la zeĝelo influis en la naskiĝo de la provençala poezio, precipe la unuan el la plej konataj trobadoroj, Vilhelmo de Poitiers, duko de Akvitanio. Ankaŭ ĝi multe influis en la formiĝo de la okcidentaj liriko.

*metis min survoje ama
laŭ mia sentiva volo.
Jen la lum' de l' bona vojo
brilis por mi en la koro.*

La plej prestiĝa verkisto de zeĝeloj estis Abd al-Malik ibn Quzmän, naskiĝinta en Kordovo en la jaro 1078, aŭtoro de kompleta verko, "Kanzonaro". Jen unu el la poemoj, en kies teksto li montras altan memestimon pro lia kontribuo al la perfektigo de la zeĝelo:

*La zeĝelon, grandtrezoron,
elpurigis mi je nodoj.
El zeĝelo senesprima,
faris mi alian brilan,
kiel orjuvel' fascina
riĉa pri sonorparoloj.*

*La zeĝelon, grandtrezoron,
elpurigis mi je nodoj.
Kiom belas ĉi zeĝelo!
Kiel ĉarmas ĝia teksto!
Loge sonas en orelo
Freŝa stilo kaj dolĉ-vortoj.*

La zeĝelon, grand-trezoron,

elpurigis mi je nodoj.

*De l' zeĝel', sultano mita,
mi fariĝis plengenia,
dum zeĝelo mia brilas,
la ceteraj kaŝas honton!
La zeĝelon, grandtrezoron,
elpurigis mi je nodoj.*

Laŭ dedukto de kompetentaj arabistoj per aludoj en poemoj de Ibn Quzmän, tiujn zeĝelojn oni kutimis kanti ne nur fare de unu sola kantisto, sed kun popola partopreno, kvazaŭ ĥoro, kaj la publiko ripetis la refrenon ĉiu-foje ke la kantisto atingis la kvaran ŝanĝo-VERSION de ĉiu strofo. Tio enkondukis al la formiĝo de la poemeto nomata harĉo. Tiu kantonovaĵo multe amuzis la popolon, ĉar variigis la rigoron de la unurima araba kasido, nur recitata en palacoj, bienodomoj kaj lirikaj fakaj medioj.

Kun la forpaso de l' tempo, la simpla popolo, ripetis unu kaj alia fojo tiujn versopecojn, kaj ne ĉiam en la araba lingvo, sed plejofte miksitaj en la romanza aŭ hebrea, kaj tio enkondukis al la formiĝo de poemetoj nomataj "harĉoj"³, tiel antikvaj –diras la eminenta erudiciulo

³ La plezuro kiu vekas en la leganto tiuj primitivaj poemetoj, estas kiuj impulsis min sekvi la vojon de la menciitaj scienc-esploristoj por transdoni al vi version en Esperantopri tiu duonkaŝita ĝardeno de l' pasinto, kie kreskis la plej delikatajn florojn de la hispana liriko apenaŭ naskiĝintaj pri la temo ĉiam interesa kaj kelkfoje pasia de la amo.

Al tiuj el miaj legantoj, kiuj bone scias la historion pri la origino de nia liriko ekde sia naskiĝo, mi petas senkulpigon.

Ramón Menéndez Pidal, ke la poemo de "Mio Cid' " (12a jc.) ŝajnas kvazaŭ verkita antaŭ-hieraŭ.

Efektive, tiuj menciitaj poemetoj, plejofte parolis pri amo. Jen unu el la plej primitivaj, en kiu konstateblas la arabaj vortoj miksitaj al la romancaj:

*Vayse meu corachon de mib.
¿Ya, Rab, si me tornarad?
¡Tan mal meu doler li-l-habid!
Enfermo yed, ¿cuando sanarad?*

Kies traduko estas:

*Mia kor' el mi forkuras.
Ho Di'! ĉu ĝi revenos?
La dolor' al mi torturas
pro l' amat', ĉu li bonvenos?*

Ekzistas multaj poemetoj kiel ĉi tiu, kies traduko montriĝas pli ol malfacila, sed la problemo ne kuŝas en la miksaĵo de lingvoj, sed en la traduko de popolaj dialektoj, kelkaj pli influataj de la araba kaj aliaj de la romanco el la diversaj regionoj.

Novaj sciofontoj: la disvastigo de harĉoj

Sed tiuj unuaj sciofontoj ne sufiĉis, ĉar ĉio kion oni malkovris inter la antikvaj dokumentoj estis popolaj kanzonoj en la araba. Fine estis en la jaro 1948, kiam la historiisto S. M. Stern, trovis dudekon da moaŝahoj en la hebrea, laŭ fidela imito de la arabaj, kies versofinoj estis en la plej arkaika romano. Iom pli poste, tiu sama historiisto publikigis alian moaŝahon en la araba kun versofino latinida, de la Tudelano Al-A'ma al Tutili (m. 1126), kaj samtempe, ankaŭ la hispano Emilio García Gómez, anoncis sian studon de aliaj manuskriptoj kun simila enhavo al tiu prezentita de Stern. Ĉiukaze, la poemetoj, ripetitaj de generacio al generacio, ĉiam estis en la latina vulgara kun malkleraj esprimoj el la popolo. Jen alia el tiuj primitivaj poemetoj:

*Je la ektagiĝo venu,
venu kun l' aŭror', amiko.*

*L' amik' kiun mi pli amas,
venu kiam tag' jam ravas.
Bonamik' la plej amata,
venu kiam tag' ekblankas;
venu vi sen akompano,*

*kiam venas brak' ĉe brako,
lumo kun petola tago,
sed venu sen akompano!*

La evoluo de la menciitaj harĉoj progresis kun la fleksebleco de la romanca lingvo kaj estas cititaj en la Romancaro kaj Kanzonaro, ne nur de anonimaj trobadoroj kiel parto de la tradicia poezio, sed ankaŭ de la mano de la unuaj renomaj poetoj de la kastilia lingvo, ja laŭ kompetenta opinio de Menéndez Pidal, tiuj unuaj poemetoj ne estis verkitaj en la kastilia lingvo, sed kiel dirite, en la romanca postlatina. El la profundo el la mezepoko venas multnombraj poemetoj: kelkaj rakontas belaj legendoj, aliaj spegulas bildojn el la ĉiutaga vivo, plejofte, la versoj, per teneraj vortoj kantas la eternan kanzonon el pura amo:

*Levu al mi la okulojn
kiuj logis min per amo.*

*Levu ilin kun plezuro
por ke via amrigardo
ĝoje ama ĝis la fundo
donu mian koron pacon.*

*Revivigas vi mortintojn,
faras vi el hom' libera*

*malfeliĉa forkaptito,
diru per okuloj belaj
tion kion al mi plaĉos
aŭ mi mortos pro malgajo.
Levu al mi la okulojn
kiuj logis min per amo.*

Ekzistas centoj kaj centoj el tiuj priamaj poemetoj tre ofte kantataj de la popolo per anonimaj aŭtoroj.

Postaj studoj pri la harĉoj

Ŝajnis, ke ĉio estis dirita pri la primitivaj harĉoj, sed post profunda studado de D-ro Federico Corriente⁴, la temo ne sin prezentas tiel simple kaj konklude kiel oni pensis. Tiu ĉi talenta profesoro ĵus malfermis novan ĉapitron pri la harĉoj, disvolvante per solidaj argumentoj en sia verko "Poezio dialekta araba kaj romanca en Al-Andalus" (eld. "Gredos" Madrid-1998), tute novajn teoriojn pri la origino de la hispana liriko, kaj eble ankaŭ pri la al-andalusa.

La verko pri la tre antikva hispana koplo nomata harĉo estas speciale verkita por kleruloj sciantaj, ne nur la klasikan araban lingvon, sed ankaŭ tiujn poeziajn formojn lokajn kaj regionajn de tiu epoko, do postulas ke la leganto estu iom pli ol kompetentulo.

La harĉo naskiĝinta el la versoformo moaŝaho, estas la plej admirinda ekzemplo pri kunfandiĝo de la poezioj de du popoloj malsamaj: la araba kaj la al-andalusa.

Ĝis 1988 oni ne eldonis unuafoje (A. Jones, en Oksford') ensemblon de harĉoj faksimile. Estis tiel, ke la saĝaj

⁴ Federico Corriente, estas d-ro pri semida filologio, katedra profesoro pri araba lingvo de la Universitatoj de Zaragozo kaj antaŭe de Madrido. Li ankaŭ plenumis saman taskon en Universitatoj de Egipto, Maroko kaj Usono.

Membro de la Akademio de la araba lingvo de Kairo. Lia lasta verko pri poezio araba kaj romanca dialektaj, estas vera revolucio pri tiuj scioj.

kompetentuloj interesataj pri la temo, povis rekte studi ilin, inter ili Federico Corriente, kiu sintezigis en la menciita verko tezojn radikale malsamaj al tiuj subtenitaj de Ribera, Stern, García Gómez k.a. ĝenerale bone akceptitaj ĝis tiam.

Ni diru tuj, ke Federico Corriente, laŭ la plej spertaj fakuloj pri la temo, estas la aktuala filologo pli bone scianta la araban lingvon parolatan en Al-Andalus. Jen kial liaj opinioj pri la harĉoj, ĉiam surbaze de firmaj kaj detalaj argumentoj, havas tiel alta aŭtoritato, ke eĉ la plej kompetentaj filologoj estas devigataj nepre aŭskulti lin.

Li asertis: “estas grava eraro ke, la lernolibroj pri la naskiĝo de la hispana literaturo prezentu kiel unuajn monumentojn de nia beletro tekstojn, kiuj neniam ekzistis en la realo, escepte en la mensoj de kelkaj “deĉifristoj”, kaj ke tiuj entelekiroj estu la bazo pri la scio, kiun laŭsupoze, oni havas el la tuto de la liriko dialekta romandalusa”.

Laŭ F. Corriente: “pli ol la triono el la vortoj de la arabaj harĉoj interpretitaj kiel romancaj, ne tiel estas, ankaŭ ne la kvinono el la hebreaj, kaj li konsideras tiujn topikojn, same kiel tiuj de gravaj fakuloj, kiel “kripto-romanismo” aŭ “maŭrofobio”. Ĉe la fundo de la temo kuŝas, la rifuzon akcepti pli aŭ malpli konscie, la malvenkon de la kruco fare de la lunduono”.

Tiuj alportoj al-andalusaj signifus, heredon hispana-romian de la poezio, la mistiko kaj aliaj elementoj, fakte ideologiaj konnotacioj...

F. Corriente studas, analizas kaj diras, ke tiuj indikitaj versoformoj estas ja aŭtentaj; li eksplikas la anatomion de ĉiu el ili: kiel ili evoluis kaj alvenis ĉe Okcidento kaj kiel estis interpretitaj de la nuntempaj fakuloj. Li katalogas ĉiujn ekzistantajn kazojn detale kaj ĝisfunde, esprimas la koncernan kritikon kaj laste, el sia scio kaj klero, kiel la unua studemulo de la romanca lingvo en Al-Andalus, klarigas tiujn polemikajn tekstojn. Li substrekas, ke multaj el la tekstoj de harĉoj, ne estas, kiel oni asertis, verkitaj per la araba alfabeto, ĉar evidentas, ke oni ne bone legis aŭ penis interpreti, multajn grafiojn por prezenti ilin kiel arkaikaj romancaj vortoj.

La harĉo -konfirmas la dokta studemulo- ne estas versoformo el la primitiva hispana liriko kun propra strofa formo tiel firma kaj originala, ke ĝi pretervivis adoptita de la poetiko de la arabaj okupantoj. Prefere ni diru, ke ĝi estas simpla varianto, ne abunda, de tipa formo el la esprimo araba-alandalusa, kiu en certaj okazoj, uzis minoritatajn lingvojn vulgarajn ekzistantaj en Al-Andalus. Ĝia metriko eksplikeblas sen la helpo de la formoj arabaj, kaj eblas, ke granda parto el tiuj harĉoj aperintaj, ne estas alio ol tradukoj aŭ versioj al la romanca de arabaj poemoj.

La konkludoj pri la studoj de F. Corriente, plenplenas de okulfrapaj sekvoj, pro la radikala signifo ke ili prezentas kompare kun tiuj prilaboritaj de aliaj ĝisnunaj prestiĝaj fakuloj, ĉar ne temas ja pri supozoj pli aŭ malpli probablaj, sed pri saĝa kombino de raciaj sintezoj kaj altaj kapabloj lingvaj, historiaj kaj filologiaj. Plie, li prezentas en la libro, transkribon kaj interpreton de ĉiuj harĉoj ĝis nun konataj, same de aldonoj el moaŝahoj kiel de zeĝeloj devenantaj el versoj romancaj aŭ arabaj, kaj fine ankaŭ studaĵon pri idiolekto romia-alandalusa, laŭ aperas en la romancaj harĉoj.

La romancoj eposo-lirikaj. Kanto de Mio Cid

Laŭmezure kiel la kristana rekonkero de hispanaj teritorioj progresis, aperis, iom post iom, poemoj ekzaltante la figurojn de la plej elstaraj batalantoj aŭ kantante iliajn heroaĵojn per esprimoj eposo-lirikaj. Ili ricevis la nomon de gesto-kantoj. La unua pli kompleta el ili aperinta en la 12^a jc., de ni ĉiuj konata, estas “**La Kanto de Mio Cid**”, poemo kiu kantas la geston de la kastila kavaliro, Rodrigo Díaz de Vivar, pli konata per la kromnomo, Cid’ Campeador (1040-1099).

Tiuj poemoj konsistantaj el nedifinita nombro da versoj dek ses-silabaj unurimaj asonancaj aŭ konsonancaj, oni kutimis priskribi per oksilabaj versoj kun asonanca rimo en la paraj, lasante la ne-parajn tute liberaj, sed fakte konsistis en sia origino el du oksilabaj versoj, kiuj pro konveno de antikvaj kopiistoj aŭ eldonistoj de la 15a kaj 16a jarcentoj, separis du hemistikojn.

Plejofte, la romancoj estis kantataj aŭ recitataj en publikaj placoj, sed kvankam rave aŭskultataj de la popolo, ne ĉiuj bone kapablis memori pro la longeco de la poemo la unuajn versojn.

Tial oni retenis nur la fragmentojn plej dramajn aŭ plej emocie lirikajn. La deklamantoj normale celantaj

sukceson, al kutimiĝis deklami nur tiujn partojn pli interesajn, aŭ versiojn pli-malpli fantaziajn, ĉiam dependantaj de la imago-kapablo de la recitanto. Kaj estis tiel kiel la versioj plimultigis ĝis malapero de la originalo, plejofte restanta en la menciitaj oksilabaj.

"La Kanto de Mio Cid" estas vera arta juvelo, kiu ekzaltas la figuron de heroo, kies ekzisto estas rigore konstatebla kaj tute certa, kaj ĉiuj personoj kaj lokoj, kiujn oni aludas en la poemo, ankaŭ estas rigore kontrolitaj kaj veraj. Verkita de anonima aŭtoro proksimume je la jaro 1140, ĝi estas la unua ĝesto-poemo de la hispana liriko. Oni konservas ĝin en manuskripto kopiita en la jaro 1307 de Pere Abbat. Ĝi konsistas el tri partoj enhavantaj 3.730 versojn asonancajn pri la kastila kavaliro Rodrigo Díaz de Vivar "El Cid Campeador" (1040-1099).

La unua parto de la manuskripto "La kanto de l' ekzilo" ĝis la verso 1085, rakontas la viverojn de Don Rodrigo kiam li estis ekzilita de la Reĝo, Don Alfonso, adiaŭas kaj forlasas la edzinon, Doña Ximena, kaj survoje al ekzilo trapasas Burgos marŝante kun liaj fideluloj tra la kastiliaj stepoj sub la rigoro de terura varmego kaj la ordono de la Reĝo al siaj regatoj malpermesante ilin helpi Cid-on kaj liajn sekvantojn, eĉ de akvo kaj nutraĵoj.

Ĝi priskribas, krom la anekdoto de infanino eksplikante al li la kialon de ilia ne-helpo pro obeo al la reĝa ordono,

ankaŭ la batalon de Don Rodrigo kun la araba reĝo de Zaragozo, kontraŭ la maŭroj de Ilerdo, helpataj de la Barcelona grafo, kiun li venkis kaj kaptis en batalo, kaj poste liberigos...

Mi tradukas la cititan unuan parton laŭ la manuskripto, t.e. per dek ses-silabaj versoj unurimaj:

Cid' eniras en Burgos

*Mia Cid'⁵ Rodrigo Díaz/ pasis tra la Burgos-pordoj,
dum sesdeko da standardoj/ post li flirtas kun honoro.
Ĉiuj, viroj kaj virinoj/ staras en tre alta nombro,
por lin vidi de fenestroj/ propraj hejmoj kaj balkonoj.*

*Ĉiuj volus lin gastigi/ sed plenum' de reĝ-ordono
venis en leter' fermita/ dum l' antaŭa nigra nokto:
"Ke neniu Cid-on helpu/ gastu lin neniu homo,
kaj se iu tion faros/ falu sur lin la rigoro,
tiu perdu la okulojn/ savon de l'anim' kaj korpo.
Tiu, la kristana gento,/ gardis ĉe si kor-angoron,
ili kasis sin de l' Cid-o/ volis diri lin nek vorto.*

Cid-o iris al gastejon,/ sed fermitaj ja la pordoj,

⁵ Cid', el la araba dialekta, Sid: sinjoro.

*restis li sen rifuĝejo/ pro l' ordon' de reĝ' Alfonso.
La Cido-akompanantoj/laŭte per desperaj voĉoj,
vokis la gastejomastrojn/ sed ne venis et-respondo.
La ĉevalon Mia Cid-o/ pikis per la feraj spronoj
kaj piede frapis pordon/ sed ĝi restis sen trem-movo.
Antaŭ Cid-o ekaperis/ naŭjar-infanin' ĉe pordo:
"Mia Cid', bonhore glavon/ prenis vi por nia gloro.*

*Sciu: reĝo malpermesas/ doni al vi ian loĝon
per severaj skribminacoj/ kaj plej duraj pun-admonoj,
ni ja tute ne kuraĝas/ doni al vi azil-lokon,
ĉar ni certe perdus ĉion/ eĉ bienojn kaj alodojn,
ankaŭ perdus ni l' okulojn/ kaj por ĉiam la ripozon.
Ho Cid'! gajnus vi nenion/ ricevante ni malbonon;
ke l' Kreinto vin protektu/ siaj estas virt' kaj bono".
Tion diris kaj eniris/ la knabin' en sian domon.
Cid' perceptis ke el reĝo/ ne ricevos et-pardonon,
ĝis la katedral' li iris/ kaj derajdis sen sufoko,
surgenuis en preĝejo/ kaj preĝadis kun fervoro;
kiam finis li la preĝon/ Cid' daŭrigis sian vojon,
pasis trans river' Arlanzon/ lasis post si lastan pordon.
Apud Burgos, bela urbo/ sur sablaĵ' je vesperhoru,
oni metis lian tendon/ Cid' derajdis por ripozo.
Mia Cid', bonhore glavon/ prenis vi por nia gloro ⁶.*

⁶ La ĵonglistoj aŭ trobadoroj kutimis nomi Cid-on per pluraj frazoj kun kategorio de epiktetoj, kiel tiu indikita en la poemo aŭ alia, ekzemple ankaŭ: "tiu kiu bonhore naskiĝis", ktp.

*Sur sablaĵo li ripozis/ ĉiuj neis al li domon,
sed ĉirkaŭ Cid' restis/ sekvantaro kaj skorto.
Tiel kampis Mia Cid-o/ kvazaŭ estus li sur monto.
La reĝ' ankaŭ ne permesis/ vendon al li de manĝo-stoko
kaj kuraĝus ja neniu/ malobei la ordonon.*

La dua parto: "La kanto de l' edziĝoj" ĝis la verso 2.277 rakontas, kiam Cid-o (dialekte arabe SID, sinjoro) aliras al Valencio, konkeras ĝin, kaj petas al la Kastilia reĝo, ke liaj edzino kaj filinoj povu viziti lin. La reĝo plezure akceptas la peton, kaj siaflanke, petas Cid-on, ke li akceptu la Infantojn de Carrión kiel edzojn de siaj filinoj...

La tria parto "La kanto de Corpes", rakontas la malkuraĝon de la Infantoj de Carrión okaze de eskapinta leono, kiun Cid-o gardis kaptita, antaŭ kiu la Infantoj honte forkuris. Ankaŭ ili sin montris malkuraĝaj dum bataloj. Ĉio, tio estis sufiĉa motivo de moko fare de la soldatoj de Don Rodrigo.

Ofenditaj, la Infantoj petis permeson al Cid-o por foriro kaj kunporti siajn edzinojn al Carrión, sed en la kverkaro de Corpes, ili nudigis, suferigis kaj grave ofendis la filinojn de Cid-o, kiujn fine ili forlasis senhelpaj, solaj en tiu arbaro. Sciinte tion Don Rodrigo, petis justecon al la reĝo Alfonso la V-a, kiu kunvokis Kortesojn en Toledo, kie Cid-o defiis

kaj venkis la Infantojn de Carrión, kiuj estis deklaritaj perfiduloj.

La filinoj de Don Rodrigo, Doña Elvira kaj Doña Sol, edziniĝis al la Infantoj de Aragono kaj Navaro, kaj tiel Cid-o parenциĝis kun ambaŭ kristanaj reĝoj.

“Mio Cid-o”, Don Rodrigo Díaz de Vivar, restis por la hispana historio kiel la ideala prototipo de la mezepokaj kristanaj kavaliroj.

En la “Hispana Romancaro” aperas tiuj poemoj, kiuj elstarigas la figuron de tiu kastilia heroo. Mi tradukis pecon de unu el ili: tiu kiu rakontas la revenon de Cid-o kiel konkeranto de la Valencia regno kaj eniras en la preĝejon de Sankta Petro de Cardeña. La versoj diras:

Reveno de Mio Cid'

*Cid' revenas venko-gloro
al San Pedro de Cardeña,
post militi kontraŭ maŭroj
kaj konkeri regnon fremdan.*

*La trumpetoj laŭtsonantaj
atentigas pri l' alveno;
inter la kriad' elstaras*

forte “Babieca”-henoj⁷.

*Ĉe la sojlo lin akceptas
la monaĥoj kaj abato
per laŭdad’ al bona Dio
kaj al Cid-o per flatado.*

*Deĉevalis Cid’ kun ardo
kaj eniris en preĝejon,
kaj kun la standardo alten
li parolis kun fiero:*

*“El ĉi templo mi eliris
pro envio kaj malsaĝo
al ekzilo humiliga
al sufer’ en fremda lando”.*

*“Mi revenas miajn larojn
post konker’ de riĉa regno
kun l’ admiro de venkitoj
kaj la am’ de mia gento”.*

*“Estis ja kruela fakto
kiam mi en Sankt-Gadeo
devis ĵuri pri la reĝo*

⁷

Babieca: nomo de la ĉevalo de Don Rodrigo Díaz de Vivar.

certa lian lojalecon”.
Ho, jes! kiom aĉa pago,
tiu de la reĝ’ Alfonso:
mi donacis al li regnon,
li ekzilis min sen honto!”
“Sed donaci kiel venĝon
mian tutan konkeraĵon
al la gento alilanda,
tio estus fia ago,
kiun faros mi neniam,
ĉar nobela kastilano;
ja ne vane mi devenas
el honora alta rango:
kavaliroj senriproĉaj
el la Díaz de Vivar-o”.

La poemo "Kanto de Mio Cid" estis la plej antikva poemo eposo-lirika kiun oni konservis ĝis 1948. Ĝi estas eksterordinare interesa sub vidpunkto lingva, beletra kaj historia.

La Romancaro kaj la tradicia liriko

La historia romancaro havas sian originon en realaj faktoj kantataj aŭ recitataj de generacio al generacio de trobadoroj kaj ĵonglistoj al popolo en publikaj placoj, kaj plej granda parto el ili estis anonimaj, verkitaj eĉ antaŭ ol oni ekbalbutis la kastilian lingvon. En tiu historia-legenda hispana romancaro vivas, la plej granda parto el la mezepoka historio de Hispanujo. Tiuj romanoj kolektiĝis kvazaŭ en serioj glosantaj faktojn kaj legendojn, kiuj tiam altiris la atenton aŭ fantazion de la popolo.

Ekzemple, ni citu la dramon, ŝajne, okazinta je la komenco de la oka jarcento al la gota reĝo Don Rodrigo, kiam Iberio estis okupita de la araboj. Legendo aŭ historio reala, antikvaj kronikoj rakontas, ke Don Julián Oppas, gubernatoro de Ceuto, havis filinon nomatan La Cava, kiu estis logita kaj sekve perfortigita de Don Rodrigo. Kiel venĝon, Don Julián proponis al la araboj okupantaj tiam Nord-Afriko, invadi Hispanion kaj promesis ilin provizi de sufiĉe da ŝipoj por transporti la nordafrikajn trupojn al iberiaj teritorioj, kaj li mem partopreni en la batalon kontraŭ la gota reĝo.

Tiu historio aperinta en la Romancaro konsistas el jenaj poemoj:

“Don Rodrigo kaj la perdo de Hispanio”; “La amo kaj senhonorigo de La Cava fare de la reĝo”; “La perfido de Don Julián, patro de tiu knabino”; “La malvenko de Don Rodrigo”, kaj “Puno kaj morto de tiu reĝo”.

Konstateblas la rilato de ĉi tiuj poemoj inter si, kaj oni klare perceptas, ke temas pri diversaj epizodoj el unu sola historio. La romano kantas per kvardeko da belaj versoj pri la unua titolo:

L' Amoroj de la gota reĝo

*Don Rodrigo, gota reĝo,
vervkonfesis sian amon,
al la belulin' La Cava
logita de sia ĉarmo:
“Volu min atenti, kara,
mi parolas vin kun ardo,
mian koron al vi donas
kaj mi restos de vi sklavo”*

*Kun sinteno tre diskreta
ŝi respondis kun sarkasmo:
“Am' al reĝo vin signifus
perdon de majesta rango
via ŝercoplana peto
ŝajnas moko pli ol amo”.*

*Don Rodrigo ŝin replikas
ke ŝi cedu ja kun plaĉo,
ĉar kun li ŝi ankaŭ regos
Hispanion kaj hispanojn.
Surgenue ŝi aŭskultas
dirojn kaj amĝentilaĵojn
de la reĝo komplezema
karesanta ŝiajn manojn.*

*Je la hor' de la siesto,
ordonis la reĝ' kun hasto,
ke La Cava ĉe li venu
restu kun li en la ĉambro.
Tiel plenumiĝis volo
de amora reĝmandato,
peko kaŭzo de la perdo
de l' hispana bela lando.*

*Ŝi, la malicema Cava,
pirakontis sian patron
la perforton de la reĝo
en iliaj amrilatoj.*

*Tiu estis la motivo
por ke la ĉefkomandanto*

*de la Nord-Afrika Ceuto,
la gota Don Juliano,
volis venĝi la ofendon
al sia honor' kaj rango,
do perfidis sian genton
per konsento kun l' araboj
por detruĝi Hispanion
post rapida okupado.*

Profunde drama estas la serio pri “**La sep infantoj de Lara**”, kaj terure impresaj tiuj versoj emociigaj, kiam la patro alvenas ĉe la bataalkampo kaj rekonas la sep kapojn de siaj filoj:

*Kisante tiujn sep kapojn
de mortigitaj infantoj,
per akv' purigas la okulojn
ŝanĝe li ricevas ilian sangon!*

Serioj kiel tiuj skizitaj, ekzistas pluraj aliaj, kelkaj sufiĉe interesaj, kiel la epizodoj pri grafo Fernán González, Bernardo de Carpio aŭ la geston de Sanĉo la Ila de Kastilio kaj sieĝo de Zamora. Romancoj tre ŝatataj de la popolo estas multaj, jen unu el ili:

Romanco pri Abenamar

*Abenamar, Abenamar,
Maŭro el la maŭra gento,
tagon kiam vi naskiĝis,
venis kiel grandaj benoj
tre favoraj sort-signaloj
klaraj signoj el ĉielo:
Kalma estis la blu-marro,
vidinda la luna kresko;
maŭro naskiĝinta tiel
ne mensogos, eĉ ne eron.*

*La maŭro aŭdinte tion
jen respondis kun soleno:
Sinjoro, mi ne mensogos,
eĉ se diro de malvero
devus pagi mi per vivo
tiun mankon de sincero,
ja mi estas fil' de maŭro
kaj de kristanin' kun kredo.*

*La patrino mia diris
al mi ekde l' infaneco:
ke mensogon mi ne diru
ĉar ĝi estas dur-ofendo,*

*tial, ho reĝ'! demandu
ĉar respondos mi nur veron.*

*Mi vin dankas, Abenamar,
ĉar vi montris ĝentilecon,
kiaj estas l' artaj turoj
kaj l' apudaj alt-kasteloj?*

*Estas l' Alhambr', sinjoro,
la alia la moskeo,
ankaŭ tiuj Alixares
ĉiuj kun mirindaj heloj,
ĉar ĉizitaj tiel lerte
ili splendas pur-belecon.
La maŭro ĉizinta ilin
gajnis cent da ormoneroj
po la ĉiu taglaboro,
estis por li sama perdo
ĉiu tago senlabora
kiam li ne kreis belon.*

*La turo alia estas
la Ĝeneralifo-revo,
palaco kun bela horto
kie nazariaj reĝoj
vivis la trankvilajn horojn*

kiam floras dum somero.

*La aliaj turoj estas
el majesta reĝ-kastelo
“Torres Bermejas” nomata
pro l’ kolor’ el ruĝ-aspekto.*

*Tiam reĝ’ Don Juan diris
kun tre granda ton-soleno:
Se vi volus, ho Granado!
mi tuj estus via edzo,
donus mi al vi Sevilon
kaj Kordovon krom dankemon.*

*Edziĝinta jam mi estas,
ne vidvino, kara reĝo,
la maŭro min posedanta
amis min kun am’ intenso.*

Tiu ĉi romano, verkita de anonima aŭtoro, estas unu el la plej belaj el antikva kastilia liriko. Simila kiel tiu, kaj krome plena de romantikaj resonoj estas jena poemo:

Romano pri Ĝerineldo

Ĝerineldo, Ĝerineldo,

*paĝi' de la reĝ' amata,
kiu havus vin ĉi-nokte
ĉe mi en luks-ĉambr' floranta!
Ĝerineldo, korpo ĉarma,
Dio helpu min, vi ravas!*

*-Ĉar mi estas nur paĝio
serĉas vi, princino kara.
Mi ne serĉas, Ĝerineldo,
diras mi nur veron klaran.
Ĉi promeson, karulino,
kiam vi plenumos fakta?
Inter dekdu kaj l' unua
kiam reĝ' jam dormos plaĉa!
Jam forpasis noktomezon
sed li estis ne venanta.*

*Malfeliĉa, Ĝerineldo,
kiu amis vin singarda!
Belprincin', malfermu haste,
Antaŭ via pord' mi staras!
Kiu frapas mian pordon
je tiu ĉi horo tarda?
Estas mi, l'amiko via
ĵus veninta laŭ ni planas.
ŝi prenis lin de la mano*

*kune kuŝis pasi-ardaj,
kaj per tuŝoj kaj karesoj
forflugis la nokt' ekstaza.
Ambaŭ je la ektagiĝo
dormis en lacec' agrabla.*

*Dume, moŝta reĝ' vekigis
pro terura sonĝo stranga;
la paĝion urĝe vokis
sed la voko estis vana:*

*Ĝerineldo, Ĝerineldo,
mia hejm-servist' plej ŝata!
"se vi volas min perfidi
agu tion inde saĝa,
se kun l' infantin' vi dormas
vi ja la kastelon rabas".*

*Sian glavon prenis reĝo,
ĉe l' filino iris hasta,
tie vidis Ĝerineldon
kun la infantin' dormanta,
sekve volus lin mortigi
sed memoris lin infana
kiam li la bebon vartis
kvazaŭ filon tre amatan,*

*tuj decidis lasi glavon
inter ambaŭ korpoj lacaj
kiel signo kaj atesto
pri ilia far' amara.*

*Kien iri, karulino?
Kie trovi lokon kaŝan
por eskapi de l' furoro
de la reĝ' de ni mokata?*

*Prenu rozojn kaj liliojn
el la bela hort' palaca,
mi kaj vi suferi devas
punon por amor' malsaĝa.*

*Kial vi nun, Ĝerineldo,
tiel palas kaj malgajas?
Bona reĝo, el ĝardeno
florojn, plantojn enspirantaj
la parfum' de iu rozo
forprenis la ruĝon vangan.*

*Mia glav' atestas grave
ke vi tondis rozon kastan
Moŝto, volu min mortigi,
mi meritas morton aĉan!*

*Dum tiu kolokv' okazis
venis la filin' tonpaca:
Mia reĝo kaj sinjoro,
ne mortigu homon aman,
donu al mi la paĝion
kiel edzon por mi kara
aŭ se vi volas lin morta
morton apud li mi klamas.*

Ekzistas pluraj versioj pri tiu ĉi poemo; tiun kiun mi tradukis, eble la plej arkaika, apartenas al la eminenta filologo kaj historiisto, Ramón Menéndez Pidal.

Inter la anonimaj romanoj plej elstaraj ne povas manki tiu lirika versio pri...

Grafo Arnaldos

*Kiu ĉe la akvomaro
havos tian bonan sorton
kiel havis graf' Arnaldos
kiam venis la aŭroro
la maten' de Sankt-Johano
tag' de festo kaj de ĝojo!
Li eliris por ĉasado
portis sur la man' falkono,
kiam vidis li velŝipon*

veni haste al marbordo.

*Silkaj estis ĝiaj veloj,
rigilar' laŭ fajna robo,
la maristo ĝin gvidinta
kantis per dolĉega voĉo
kaj la mar' fariĝis glata,
perdis vento sian forton
kaj la fiŝoj el la fundo
aperis sur la marondoj,
la birdoj majeste flugis
pozis sur la mast' kun logo.*

*Tiam diris graf' Arnaldos,
Aŭdu lian saĝ-parolon:*

*“Mi nun petas vin, maristo,
min regalu per kanzono”.*
*La maristo lin respondis
per afabla dir' kaj tono:*
*“Nur miajn akompanantojn
mi regalas miajn strofojn”!*

Alia el tiuj belaj romanoj kies simpla legado ĉarmas,
estas tiu kies lirikismo kuŝas pli en la eĥoj el la versoj ol
en la propra signifo de la vortoj. Jen kiel ĝi belas:

La ermitejo Sankt-Simon'

*Staras en la bel-Sevilo
l' ermitejo Sankt-Simon'
kien ĉiuj damoj iras
tien preĝi al Sinjor'.*

*Mia damo ĝin vizitas la plej delikata flor'
montras jupon sur subjupoj
krom mantil' kun sunor';
portas sur la belaj lipoj
dolĉon el tenera kor',
sur la blanka mildvizaĝo
montras iom da kolor',
kaj ĉe siaj bluokuloj
iom da tristeca ombr',
kaj brilas kiel suno
ĉe la pord' de Sankt-Simon'.*

*Meson diras la abato
per murmur' kaj fuŝa voĉ',
mes-infanoj lin helpantaj
ankaŭ misrespondas tro,
kaj anstataŭ "amen", "amen"
nur diras "amor", "amor"...*

Romancoj kun la nova temo pri la morto

Laŭmezure kiel progresis la rekristanigo de la hispana popolo, unu el la temoj kiu akiris pli granda disvastigo estis tiu pri la morto, fakte io simile kiel la aliaj Eŭropaj liriko. La mezepoka homo vivis kun la konstanta rigardo al la morto, kiuj al ĉiuj kunvokis: al riĉuloj, al la kortegaj damoj, al komercistoj al simplaj monaĥoj, eĉ al papo mem. Ĝi estis niveliga kaj konformema povo, kiu egaligis grandajn kaj malgrandajn, riĉajn kaj malriĉajn, do ne rara ke tiu temo aperis en ĉiu liriko. Kelkaj el tiuj versoj esprimas tre okulfrape tian ĝeneralan kunvokon.

Diras la Morto:

*Al la morta danco venu ĉiu homo
en la mondo ekzistanta sen distingo,
kiu ne mem volos veni per la forto
mi devigos veni haste sen evito.*

Multaj el tiuj poemoj aperintaj en la Romancaro konservas ankoraŭ certan neeviteblan pravon kaj allogon.

Jen unu el ili verkita de anonima poeto:

Romanco de l'Amanto kaj la Morto

*Songô certa nokto songîs,
revo el l' animo mia!,
songîs mi pri miaj amoj
brakumite retenitaj.*

*Mi ekvidis damon blankan,
kun la blank' el neĝ' glacia...
Ho, el kiu lok' vi venas?,
kiel estis vi aginta
por eniri mian domon
se fenestroj restas ĉiam
pordoj kiel ĵaluzioj
hermetike tuffermitaj?*

*Ja Amoro mi ne estas,
sed la Mort' de Di' sendita!
Ho vi, tre rigora Morto,
lasu unu tag' min viva!
Eblas nun nur unu horon
kaj tuj via viv' finiĝas!
Haste li piedvestiĝis,
jen li tute jam vestita,
straten kure li aliris
kien loĝis l' amo lia.*

*Vian pordon tuj malfermu,
mia am', obeu vigla!
Por mi estus vere plaĉa
fari tion tre rapida,
sed patrin' ne ekdormas,
paĉj' ne estas foririnta.*

*Se vi nun ne tuj malfermas,
faros tion vi neniam!,
jam la Mort' min haste serĉas
kun vi viv' fariĝus brila!*

*Sub fenestro mia iru,
kie mi kudradis iam,
por atingi la balkonon
mi surmetos ŝnuron silkan.
Se la ŝnuro ne sufiĉus
por atingi ĉambron mian
mi per miaj haroj plektos
fortan ŝnuron kuntorditaj.*

*Jen la Morto sin prezentas.
La maldika silk' rompiĝas.
Venu kun mi! Hor', destino
por l' Amanto venas fia!*

Post jaroj kaj jaroj, la unuaj elstaraj poetoj el la hispana liriko ripetis kelkajn el la antikvaj poemoj, foje subskribitaj de ili mem, foje kun atentindaj ŝanĝoj aŭ similaj motivoj sed elpensitaj kun originalaj aldonoj, dediĉitaj al la amata, al dia bebo, al Sankta Maria, al la patrino, al bona amik(in)o, al la morto ktp. La nomoj de tiuj aŭtoroj jam estas sufiĉe konataj: Gonzalo de Berceo, Juan Ruiz, Jorge Manrique, Villсандино, markizo de Santillana, Gómez Manrique, Iñigo de Mendoza, Juan de Encina, Gil Vicente kaj tre longa vico el ili, kiuj kontribuis al la formiĝo de la kastilia liriko.

Gonzalo de Berceo (13a jc.)

La plej antikva el la konataj poetoj de la kastilia liriko estis Gonzalo de Berceo, naskiĝinta en 1264, kaj kies verkado, nur pri religiaj temoj, koincidas kun la ceteraj okcidentaj lirikaj inklinoj. Pastro de la monaĥejo San Millán de la Cogolla (Rioja) li majstris la versigon kaj spegulis la socian etoson de sia tempo kaj lia liriko montris tre altan nivelon didaktan, sed mankis al li la lirikismo kaj naiveco kiuj brilis en la antikvaj harĉoj kaj poemoj ricevintaj la influon de la hispana-araba civilizacio.

Li verkis pri Sankta Mariaj-temoj, kiel "La Mirakloj de Nia Sinjorino" kaj ankaŭ biografiojn pri aliaj sanktuloj, krom Enkondukon konsistantan el 25 rakontoj pri La Mirakloj de Sankta Maria. Jen unu el tiuj rakontoj:

La avara plugisto

*Loĝis iam ĉe la kampo certa homo,
petolema sin kondukis laŭ finormo,
la plugilon uzis li pli ol alio
amis li la grundon eĉ pli ol mem Dio.*

*Li ofendis sen motivo aŭ rezono,
Ŝanĝis por ampleks' de sia hort' limŝtonon,
agis false, maljuste, kun malamo,*

ĝuis inter la najbaroj de fifamo.

*Sed li amis kun fervor' Sankta-Maria-n,
kredis pri l' mirakloj kaj boneco ŝia,
ĉiutage diris al ŝi jenan preĝon:
Ave! vi akuŝis la Mesio-reĝon!*

*Kiam finis la plugisto sian taskon
estis li kaptita de diablo-klano,
kiuj trenis lin per ŝnuroj kaj best-batoj
ricevinte la duoblon el ŝuld-pago!*

*L'anĝeloj kompatis tiun fianimon
ĉar ĝin trenis la diabloj al abismon;
ili volis helpi kaj ĝin nepre savi,
sed por tia pasto ja faruno mankis.*

*Kiam la anĝeloj diris saĝ-rezonon,
centon diris la aliaj, sed kun dornoj;
la fiuloj la bonulojn grave premis,
la anim' tutpeka ne plu povis teni.*

*Unu el l'anĝeloj staris kaj asertis:
mi konstatis veron kaj krome atestis,
ke la korpo kunportanta ĉi animon
estis de Virgin' Maria koramiko.*

*Vidis ĝin l'anĝeloj tre senhelpohava,
la piedojn kaj la manojn ŝnur-ligataj
kvazaŭ ŝafo izolita inter veproj
kiun ili devis savi el infero.*

*Frazo tiel riĉa kiel virt-enhava
estas tiu Salve la Regino Sankta,
kiu terurigas ja la malamikon
kaj la lango devas diri kun jubilo.*

*Ĉiam li ŝin citis antaŭ ĉiu manĝo
per la pia: Ave graciplena frazo,
kaj la buŝ' diranta tiun kantino
tute ne meritas ian ajn fiĉenon.*

*Post aŭskulti nomon de Sankta Reĝino
la diabloj tuj forkuris kun kor-timo,
diluigis en nebulon malprecizan
kaj forlasis la animon negativan.*

La lingvaĵo uzata de Gonzalo de Berceo estas plena de kamparanaj dialektaj esprimoj kaj popularaj komparoj vere trafaj, kaj la kolokva senco de multaj el liaj paragrafoj estas sendube ekzemplodonaj kaj unuaj en la tiutempa poezio.

Juan Ruiz -Arkipastro de Hita- (1283-1355)

Naskiĝinta, verŝajne, en Alcala de Henares kaj loĝinta en Gvadalajaro kaj Hita. Li studis en Toledo kaj tuj montris sian talenton kiel poeto. Enkarcerigita de la jaro 1337 ĝis 1350 ordonite de la ĉefepiskopo de Toledo Gil de Albornoz, li verkis en prizono liajn plej gravajn poemojn.

Lia stilo sentiva, viva, delikata, montranta profundan konon de la doloro, amo kaj plej diversaj homaj pasioj, donis al liaj versoj lirikan enhavon kaj certan lingvofluecon en epoko kiam la lingvo ankoraŭ estis en evolu-periodo: ĝi ne plu estis la romanca sed ankoraŭ ne la kastilia. Lia verko "Libro pri Bona Amo" spegulas sian epokon: krizaj ŝanĝojaroj kiujn la versoj trafe profilas.

La verko, riĉenhava, estas verkita plejofte kvazaŭ aŭtobiografie, miksita de aspektoj rakontaj kun aliaj didaktaj, en kiuj aperas amoro, la vivoplezuro, sed ankaŭ kritikoj, peko kaj morto; ankaŭ troveblas fabloj, religiaj, satiraj kaj humuraj pecoj. La lingvo estas senĝena kaj kolokva, kun abundaj karesemaj diminutivoj kaj popolaj onidiroj, kiuj faras ĝin tre esprimo-kapabla kaj altira. Vere admirindaj tiuj pecoj pri kolokvoj inter blinduloj, plendoj al la Fortuno, grekoj kaj romanoj, la muso de Gvadalajaro, laŭdoj al Sankta Maria, komentoj pri la kvalitoj de la malgrandaj damoj, argumentoj de arkipastro kontraŭ la

amo, konsiloj al enamiĝantoj, fablo de junulo kiu volis edziĝi samtempe kun tri fraŭlinoj, kaj multaj aliaj kiuj faras de tiu libro unu el la plej legindaj de la mezepoko...

Li uzas plurajn versoformojn, dependantaj de la karakterizoj de la varia teksto: de heksametroj precizaj ĝis la tiutempa moderna “cuaderna via”, konsistanta el dekkvarsilabaj versoj, unurima kvarstrofo (el mezepoka franca origino), kiun mi mem uzos en mia traduko por iamaniere alproksimiĝi al la originalo. Jen unu el tiuj pecoj:

*Se vi volas scii pri Amoro kaj damoj
multon devos vi lernadi pri sagac' kaj amoj;
por ke damo volu vin akcepti kun korflamo
volu vi elekti ŝin kun saĝ' kaj sentovarmo.*

*Serĉu belulinon tre alloga kaj bonsana,
ke ŝi estu ne tro alta, ankaŭ ne tre nana;
se vi povus, ne vulgara nek kapric-tirana,
por virino tia Am-kompreno restas vana.*

*Serĉu la knabinon svelta, ne tre granda kapo,
blondaj haroj sen tinktur' kaj linda okulfrapo,
longaj okulharoj, frunt' serena ĝis sentgapo,
larĝa kokso: tiu estas l' ideala stampo.*

*La okuloj grandaj, helaj, dolĉ-esprimoplenaj,
klaraj kaj ridemaj, promesantaj sin edenaj;
etaĵ la oreloj kun brilanta ring' rubena,
kolo alta, kiel plaĉas al la gent' solena.*

*Nazo iom pinta, blankaj dentoj: fajnaj, etaĵ,
ĉiuj blank-egalaj, ĉiuj kun la ĉarm' identaj;
rufaj dentokarnoj kaj dentaro tre koketaĵ,
ruĝe-flavaj lipoj laŭ desegn' belsiluetaj...
Prefere la buŝ' malgranda kiel dolĉo-tena,
la vizaĝo blanka kaj senhara: mildoplena;
gravas ĉiam vidi ŝin senvesta, suverena,
ĉar la korpoformo diros vin: jen la konvena!*

Eblas, ke en la malfacila tasko traduki ĉi tiun mezepokan poemon perdigis ion el la aromo de la poezio de Juan Ruiz. En tiu kazo mi petas senkulpigon, sed mi penis kiel eble plej!

Markizo de Santillana (1398-1458)

Iñigo López de Mendoza, markizo de Santillana, naskiĝis en Carrión de los Condes en 1398. Li estis influa homo en la kortego de Johano la 2a kaj tre grava por la evoluo de la hispana liriko.

Sub beletra vidpunkto li impulsis la tradukon de klasikuloj multe influis en la akcepto de la novaj konceptoj de la itala beletro. Li difinis la poezion kiel “ŝajnigo de io utila, envolvita de bela kovro” kaj pri la popola poezio: kanzonoj kaj romanĉoj, li esprimis opinion klasisman ĉar senvalorigis ĝin ĉar “tio estas afero por amuzo de modestaj, malriĉaj homoj”, kaj tamen estis tio kio donis al li senliman famon.

Li kolektis, unuafoje en beletro, “Rakontoj de maljunulinoj ĉe kamenfajro”, kaj estas aŭtoro de jenaj verkoj: “Komedieto de Ponza” (inspirita en la “Dia Komedio” de Danto), “Infero de enamiĝantoj”, “Forpaso de Don Enrique de Villena”, la didaktaj poemoj “Dialogo de Blas kontraŭ Fortuna”, “Proverboj el glora doktrino” k.a. Li ankaŭ verkis kanzonojn, montar-rakontojn, kvardekon da sonetoj laŭ “itala stilo” kaj multnombraj poemetoj. Jen unu el tiuj dediĉita al tri filinoj siaj:

Sur la pado de arbaro

*plena de diversaj floroj,
vidis mi tri damoj-rozojn
komentante pri la amo.*

*Volis koni mi la damojn,
kaj unu el ili preta
ekkantis kanzonon belan
plena de kastec' kaj ĉarmo.*

*Ili al mi gardas:
sed l' intenc' ne trafas...
Por rigardi la belecon
de la tri ĝentilaj damoj
mi kovris min post l'arb-branĉoj
kaj ŝatis en la kontemplo.*

*La alia dam' sopiris
kun profunda kortristeco,
kaj ekkantis kun honesto
pri l' am' kiun ŝi aspiris:*

*La knabin' ambola,
kiel dormos sola?*

*Por evito de peturbo
restis mi senmov-kaŝita,*

*la aliaj du kantintaj
lasis aŭdi nur susuron.*

*La tria el la fraŭlinoj
diris, la vizaĝ' kontenta:
jam du el vi kantis lertaj
kantu mi nun kun jubilo!*

*Punu Di' l' fiulon
tute sen skrupulo.*

*Kiam ili tri jam kantis
la knabinoj tutgraciaj,
la kaŝejon mi forlasis
kiel homo senvestita.*

*Ili diris: - kara nia,
ne pri ci ni ja sopiras,
sed ci kantu, ni jam kantis.
Diras kanto antikva:*

*-La knabino amsopiris,
sed ne por mi,
tion bone mi komprenis!*

La markizo de Santillana, protektanto de saĝuloj, amanto de scienco kaj kulturo kaj li mem unu el la homoj plej kleraj el sia epoko, forpasis en Gvadalajaro en la jaro 1458.

Jorge Manrique (1440-1479)

Hispana poeto, kies verkado ne ampleksa, enhavis unu el la poemoj plej altnivela de tiu epoko: "Coplas por la muerte de su padre" (Koploj je la morto de lia patro). Tiu poemo, eksterordinara elegio, elstaras pro la fajna precizeco de la lingvo en la formo, la zorgo por la detala celo persona de la poemo, kiu konstante aperas ĉe la fundo de ĉiu strofo.

La aliaj el siaj poemoj alĝustiĝas al tiuj tradiciaj tiuepokaj, en kiuj abundas la erotika galanteco envolvita en fajna alegorio, sen forlasi la originan provencan stilon reganta en la tuta poezio dum tiuj tagoj.

Menciindaj liaj poemoj "Kastelo el Amo" kaj "Amoskalo", en kiuj priskribas la pasio en siaj diversaj nuancoj kaj certa delikateco en la vera amo kiam emocie unu deklaras sian amon al la alia.

En sia "Kanzonaro" ne mankas la noto humura kaj burleska kiu donas al tiuj poemoj specialajn nuancojn tute malsamaj al tiu kiu famigas lin "Je la morto de lia patro". Kaj ankaŭ elstaris la poemo "Sen Dio kaj sen vi kaj mi", kiu esprimas certan parololudon vere okulfrapa.

Jen kelkaj versoj el lia elegio "Koploj je la morto de lia patro":

Elegio

*Memoru, kor' dorminta,
vekigu la cerbon vian
atentante
kiel pasas la vivo nia
kiel la mort' ruze venas
tiel silente:
kiel rapide plezur' foriras
kaj oni ĝin memoras
dolorsente;
kiel laŭ l' opinio nia
ia ajn temp' pli valoras
ol nuntempe.*

*Se ni nuntempon observas
tiu moment' tuj malaperas
jen finiĝo,
se ni prijuĝas ion talente
ni opinios ĝin ne veninta
la pasinton*

*Neniu sin trompu pensante
ke daŭros tion kion atendas
pli ol ĝi daŭris
ĉar ĉe ni ĉio nepre efemeris*

*en la ekzisto de la vivo nia
sen plias*

*Niaj vivoj estas fluoj
finiĝantaj en la maro
tiel morto,
tien iras eĉ nobelaro
en destino senrevene
fata sorto,
tien iras eĉ famriveroj
mezaj kaj pli modestaj
al feĉtombo,
tie ĉiuj estas ja egalaj
kiuj laboras permanaj
aŭ sub krono.*

Invoko

*L' alvoko de famaj poetoj
kaj de vanaj oratoroj
mi forlasas,
ĉar iliaj fikciaj vortoj
kunportas sekretherbojn
kiuj ne gustas;
mi nur rekomendas
kaj vere alvokas
al tiu sur la ter' vivanta*

*kiu ne konis ĉi mondon
kaj sian diecon.*

*Tiu ĉi mondo estas la vojo
por la alia, kiu estas loĝejo
ne pensita;
sed oni devas zorgi atente
kiel vivadi virte tiujn tagojn
sen erare.*

*Kiam ni naskiĝas ni marŝas
dum ni vivas,
kaj kiam forpasas ni alvenas;
tial ni serene ripozas
kiam ni mortas.*

(Kaj tiel daŭrigas la poemo)

Lope de Vega opiniis pri tiu ĉi poemo, "ke oni devus ĝin skribi per oraj literoj", kaj vere estas tiel, ĉar la profundeco de ĉiu strofo vibrigas niajn korojn pro emocio.

Jorge Manrique forpasis en Cuenca en la jaro 1479.

Komandoro Escrivá (16a jc.)

Valencia poeto vivanta dum la epoko de la Katolikaj Reĝoj (16a jc.), kies verkaro aperas en ambaŭ eldonoj de la “Ĝenerala Kanzonaro” (1511-1514) de Hernando del Castillo. Li ĝuis de la favoro de Fernando “la Katolika” kaj reprezentis tiun aragonan reĝon kiel ambasadoro ĉe l’ Vatikano en 1497.

La poemoj de Escrivá havas la karakterizojn de la Kanzonar-epoko, kaj en ili montriĝas aspektoj de la tradicia popola liriko kaj ankaŭ tiu alia eskvizita kaj rafinita, ofte emfaza kaj tro polurita poezio, laŭ la gusto de la tiama kortego.

Menciindaj liaj pastoralaj poemetoj kaj precipe tiu tre konata kanzono “Venu morto tiel kaŝe”, kiu tiom eĥis en la hispana beletro (Lope, Calderón, Cervantes, Gracian, k.a.). Jen la poemo:

Venu morto tiel kaŝe...

/

*Venu morto tiel kaŝe,
ke ne sentu mi vin veni,
por ke la plezur’ vin teni
ne vivigu min malplaĉe.*

*Venu kiel vunda fulmo,
ĉar ĝis kiam ĝi ja vundas
ne sonas la bru' profunda
por sukcese fari l' vundon.*

*Estu via veno tiel,
Aŭ aliel, estu scia,
ke nia renkont' ĝojiga
revivigos min aliel.*

II

*Vi mortigas kun allogo
kaj kun tia glori-sufero,
ke ne estas fenomeno
pli dolĉa ol mia morto.*

*Kaj fieras mi pri tio,
tiel ĝene mi kontentas,
ke la sekvan sent-turmentan
mi ne ŝanĝas por alio.*

*Kaj decidis mia sorto
doni al mi gloron fian
ja nun mi nur ambicias
la angoron de la morto.*

Joan Escrivá estas aŭtoro de dialog-verko: “Plendo al sia amikino antaŭ la dio Amo” (“Ĝenerala Kanzonaro”, eldonita en 1514), verkita laŭ la priama modelo, tiam tre populara, de Juan de Flores, fakte sentimentala novelo laŭ la stilo de tiu epoko.

La soneto laŭ itala stilo perfektigita

Iom post iom la hispana liriko aktualiĝas per la itala influo, kaj la romanca versoformo ne plu estas la plej prestiĝa uzata ĉe ni. Jen bela soneto verkita dum la 16a jc. de anonima aŭtoro:

Al Kristo krucumita

*Ne movas min la am' al vi, ho Dio!
atingi la promeson de l' Ĉielo,
nek ne Vin vundi per fimalfidelo
pro timo al infero aŭ alio.*

*Min movas Via sort' kaj agonio,
Vin vidi krucumitan kun kruelo!
Min movas Viaj vundoj kaj mokcelo,
l' ofendojn al Vi kaj la senracio!*

*Min movas tiel forta ama penso,
ke mi Vin timus mem eĉ sen infero
kaj mi Vin amus sen Ĉiel-kompenso;*

*Premii mian amon tre intensan
Vi ne bezonas, ĉar pro fid' kaj vero
mi same amas Vin kun sent' potenca.*

Gil Vicente (1465-1536)

Poeto kaj teatroverkisto naskiĝinta en Lisbono. Li verkis tiel majstre en la portugala kiel en la hispana lingvo: oni konservas 44 teatro-verkojn el kiuj 15 en la portugala, 11 en la hispana kaj la ceteraj en ambaŭ lingvoj. Li kunlaboris en la verkado de la Ĝenerala Kanzonaro de García de Resende.

La poezio de Gil Vicente ricevis fortan influon de la tradicia kastilia liriko kaj de la antikvaj kanzonoj galega-portugalaj, kaj elstaras pro la simpleco, popularaj formoj kaj muzikemo de liaj esprimoj. Tiu stilo multe influos kelkaj jarcentoj poste en la nuntempa hispana poezio, speciale en la tiel nomata “Generacio de 27”.

Jen unu el tiuj simplaj priamaj poemetoj pri kiuj ni menciis:

*Panjo, mia am' foriris,
malproksime li loĝos:
forgesi lin mi ne povos,
kiel amon mi retrovos?
kiel amon mi retrovos?*

*Panjo, revis mi pri sonĝo
kiu trafis mian koron:*

*revis mi pri am-foriro
al insuloj de la maro,
ne eblas forgesi amon,
kiel amon mi retrovos?
kiel amon mi retrovos?*

*Mi revis, panjo, pri sonĝo
kiu trafis mian koron:
ke foriris mia amo
al lontana Aragono.
Tie mia amo loĝos
forgesi ĝin mi ne povos,
kiel amon mi retrovos?
kiel amon mi retrovos?*

Gil Vicente, laŭ dirite, majstris la poezion laŭ inspiro de la antikva Kanzonaro galega-portugala. Jen unu el tiuj poemoj, tre esprimosimpla, sed miaopinie, unu el la plej belaj el tiu epoko:

Cántiga⁸

*La knabino tre gracias,
kiel ĉarmas ŝi kaj belas!*

⁸ *Cántiga*: Antikva populara versaĵo destinita al la kanto, tre elstara la galega-portugala. La plej tradiciaj estas tiuj konsistantaj el oksilabaj versoj miksitaj kun aliaj dekdusilabaj

*Volu diri vi, maristo,
en la ŝipoj naviganta,
ĉu la veloj, ĉu la steloj helradiaj
tiel belas.*

*Diru vi, ŝik-kavaliro,
kun la armovest' kovrata,
ĉu l' armil', ĉu la batalĉeval' militaj
tiel belas.*

*Volu diri vi, paŝtisto,
kiu la ŝafaron gardas,
ĉu la valoj, la brutar' aŭ la mont' brilaj
tiel belas.*

Kiel teatroverkisto li evoluis de la naivaj paŝtistaj esprimoformoj al tiuj pli kompleksaj de la socia satiro kaj al certa simbolisma teatro, kiel antecedento al formuloj kaj temoj kiu karakterizos tiun de Calderón de la Barca.

Gil Vicente ankaŭ montris sian talenton kiel muzikoverkisto, li komponis muzikaĵojn pri sakra stilo, en kiuj enkondukis popularaj melodioj kaj polifoniaj kantoj.

Juan del Encina (1469-1529)

Poeto, teatroverkisto kaj muzikisto naskiĝinta en Encina (Salamanko). Je la komenco de la 16a jc. li restis pluraj jaroj en Romo kiel kantisto de la kapelo de papo Leono la 13a kaj kiam li estis 50-jara paŝtrikisto kaj celebris sian unuan meson en Jerusalemo. De la jaro 1523 li loĝis definitive en la nordhispana urbo, Leono.

En lia "Kanzonaro"(Salamanko(1496) aperas multaj lirikaj poemoj el lia junaĝo, inter kiuj elstaras kelkaj mallongaj kun populara karaktero kaj etoso paŝtista kaj kamparana, kiujn ofte akompanis melodioj de li mem komponitaj, el kiuj nur 68 (publikigitaj de Barbieri en 1890) alvenis ĝis nia nuntempo.

Jen unu el tiuj poemetoj, plena de fajna sentiveco:

*Bluaj dolĉokuloj havas
la knabin' nun neamanta,
kiu ilin kaptos, raba?*

*Ili estas belaj, vivaj,
ĉiujn havas sorĉkaptitaj,
sed ŝi montras ilin tristaj
kaj la ĝojo ĉiujn ravas.*

*Gloron kaj plezuron ŝatas
la memoroj pli sentivaj
gardi la rigardon vian
estas venk' kaj sent' jubila.*

*Per ilia ĝentileco
donas fidon kaj misteron
kaj vivigas en suferon
kiu vivis eŭforia.*

*Neniu l' okulojn viajn
vidas sen la ĝukorsento
senti sin sub dolĉkateno
dezirata por eterno.*

El siaj teatroverkoj nur 15 oni konservas nun, reprezentantaj la periodon inter mezepoko kaj renesanco, en kiuj li spegulas la etoson de la tiama socio en siaj pluraj aspektoj: religia, kamparana-paŝtista, ideologia kaj beletraj...

Joan Boscán Almogávar (1487-1542)

Verkisto, poeto, edukisto, li naskiĝis en Barcelono, sed kutime verkis en la kastilia lingvo. Li lernis beletron sub la gvido de la itala humanisto, Lucio Marineo Sículo kaj baldaŭ pasis al la kortego de Karlo la 5a.

Boscán majstre sciis kombini la petrarkismon (kun ties rafinitaj esprimoj kaj antitezoj), al la stilo firma de Ausias March (esprimanta profundajn precizajn bildojn). Ekzemplo pri tiu poezio povas esti jena soneto:

*Agrabla sonĝ' kaj dolĉa malkontento
kiam sonĝante mi imagis sonĝi;
delico dolĉa kiu trafas trompi,
se tro longiĝus tiu trompa sento.*

*Dolĉa, sen esti en mi, kun la tento
atingi, kion fakte mi ne povis;
plej dolĉa ĝuo, kvankam en mi trovis
malĝojon, pro vekiĝo el kontento.*

*Ho sonĝ'!, ju pli leĝera des pli plaĉa,
certe pli ideala kaj bonvena
se venus ĝi malpeza kaj trankvila!*

Ĉar mi en sonĝo sentis min bonŝanca

*kaj eĉ fantaste ĝuis ĝin korplena,
tamen kun ver' ne sentis min jubila!*

La plej granda merito de Boscán, vere transcenda, estis la enkonduko en Hispanion de la italaj versoformoj, kune kun lia amiko Garcilaso de la Vega, kio sendube signifis la modernigon de la hispana poetiko. Ekzistas kelkaj poemoj de Boscán verkitaj laŭ la tradicia metriko kastilia, sed la plej granda parto el ili konsistas el sonetoj kaj kanzonoj renesancaj laŭ la modelo ekreganta en la itala poetiko de la epoko, kiun li kaj Garcilaso sukcese enkondukis en la kastilian lirikon.

Elstaraj poemoj de Boscán, inter aliaj estis, la epistolo en tercetoj al Diego de Mendoza pri la plaĉo de la edziĝa vivo, la alegorio La Oktava Rimo kaj la mitologia fablo de Hero kaj Leandro (dekdu silaboj sen rimo). Jen unu el tiuj senrimaj poemetoj de la kataluna poeto:

La najtingalo kiu perdis siajn filetojn

*Kiel kutime linda najtingalo
sub foli-ombroj de l' ulmar' kaj fagoj
ploradis senkonsole la forperdon
de siaj dorlotitaj gefiletoj,
kiujn ĝi dum momento lasis solaj
senplumaj sed provante la ekflugon;*

*el nesto prenis ilin kamparano
kaj la birdino triste plore trilas
dum tuta nigra nokto senripoze,
kaj de la branço kie ĝi firmstaras
sian doloran kanton renoviĝas
kaj siaj plendoj tra la kampo vibras...*

Boscán tradukis proze kaj modele, inter aliaj, “La Kortegano” de Baltasar de Castiglione.

Li forpasis en la jaro 1542.

Juan de Timoneda (1490-1583)

Verkisto, eldonisto kaj elstara poeto naskiĝinta en Valencio en la jaro 1490. Kiel eldonisto li disvastigis gravajn verkojn kiel la komedioj de Lope de Rueda, Alonso de Vega, “La pastoralaj kolokvoj” de Juan de Vergara k.a. Li kompilis kaj eldonis plurajn Kanzonarojn kaj Romancarajn en kiuj li inkludas romancojn de pluraj aŭtoroj kaj aliaj propraj. Li ankaŭ verkis spritajn rakontojn kaj fabelojn en kiuj li kolektas antikvajn elparolajn legendojn, kaj tradukis kaj donis novajn versiojn el verkoj de Boccaccio, Ariosto kaj Bandello.

Distingiĝis ankaŭ Timoneda kiel dramverkisto, kiu montriĝas kun atentinda itala influo kaj tendencoj al moderna hispana teatro, sekve oni povas konsideri lin, kun Lope de Rueda, kiel patroj de la hispana teatro. Gravaj liaj “autos sacramentales” (teatraĵoj pritraktantaj temojn el dogmo kaj eŭkaristio) aperintaj en du kolektoj, la unua: “Sakramenta Trio” (1558) en kiu aperas la teatraĵoj “La perdita ŝafo”, “La kastelo de Emaus” kaj “La Eklezio”; kaj la dua “Sakramenta Trio” (1575): “La sakramenta fonto”, “Edziĝo de Kristo” kaj “La Fido”, bibliaj kaj religiaj temoj, anonco de la teatro de Calderón.

Fine kaj ne laste, Juan de Timoneda ankaŭ estas aŭtoro de sentivaj poemoj: kantoj, romancoj, kanzonoj, eglogoj k.a.

Jen unu el liaj belaj poemoj esprimanta delikatajn sensojn kun amemaj nuancoj vere rafinitaj:

Kanzoneto

*Tiu venas aŭ ne venas,
tiu trafo aŭ ne trafo,
kiam pri la Amo temas
ne ekzistas ĝu' egalo.
Tiu penso de amanto
esti de ŝi dolĉ-amata
rivalas kun la dubsento
de l' amanto atendanta,
ĉar l' espero kaj sopiroj
en la koro ĉiam kantas;
tiel grandas amo-sento
ke nenio ĝin egalas.*

*Tiu reciprok-rigardo:
ŝi al li, li al ŝi, ravaj,
kaj atendi la belnokton
kaj paroli ŝin tre arda,
kiam pri la Amo temas*

ne ekzistas ĝu' egala.

*Tiu pens' ĉu ŝi min aŭdis,
Aŭ mi vidis ŝin hazarde,
ĉiuhore kun l' espero
de sia akcepto varma,
en la mondo de la sentoj
ne ekzistas ĝu' egala.*

*Tiuj ĉarmaj dam-indikoj,
tiu tse! lin dolĉ-vokanta,
tiu jeso oportuna,
tiu dir' ke 'ŝi lin amas,
kvankam ŝajnas simplaj signoj
ne ekzistas ĝoj' egala.*

Juan de Timoneda forpasis en la jaro 1583.

Garcilaso de la Vega (1501-1536)

Naskiĝis la poeto Garcilaso, en Toledo, je la jaro 1501. Brila renoviganto de la kastililingva poetiko, li estis perfekta modelo de la kortegano renesanca. Dum sia mallonga vivo, li kunigis la idealajn elementojn kiel homo de armiloj kaj de beletro, ĉar samlerte li uzis armilon kiel plumon, kaj tial lia vivo estis, konstanta batalo por amo, poezia kreado kaj heroaĵoj.

Ĉar ne fermita al ĉiuj spiritaj ideoj kaj novaĵoj de sia epoko, li kun Boscán adaptis al la kastililingva liriko la modernajn italajn versoformojn, inter ili la soneton, kiu fariĝis de tiuj tagoj la poetika formo plej uzata dum la renesanco kaj la beletra hispana orjarcento. Jen unu el tiuj sonetoj de li verkita:

*En mi skribitaj viaj ĉarmoj restas
kaj se verkadi pri vi mi deziras
sufiĉas via belo tre altira
jen vi aperas linda kaj majesta.*

*Mia inklino al vi ja aŭtentas,
ĉar mi la ecojn viajn tre admiras,
pro am' al vi konstante mi sopiras
laŭ mia kor' kaj sentoj vin atestas.*

*Nur la beleco via min plej ravas
kaj mi pri tiom granda am' mi miras
kiom l'animo mia ĝin surportas...*

*Inspiron ŝuldas mi al vi bril-havan,
por vi mi vivas kaj dolĉege spiras,
pro vi mi devas morti kaj...mi mortas!*

La liriko de Garcilaso havas la brilan riĉan enhavon de la belaj temoj, la novajn konceptojn pri amo kun nuancoj de certa platona idealismo, kaj ankaŭ, elirintan rekte el lia propra malfeliĉa koro, realan sincerecon por esprimi la doloran senton, kiu premis lian spiriton pro certa granda amo kiun li sentis, sen la koncerna reciproko de la amatino, ama sento kiun li tiel majstre sciis esprimi.

Rimarkindas, lia inklino por naturo, kiun li en siaj poemoj ofte uzis, kvazaŭ alian protagoniston de la dramo kiun li poezie rakontas, kiel estas konstateble en tiu ĉi fragmento de la “**Unua Eglogo**”:

*La sun' etendas siajn orradiojn
sur helaj montoj kaj brulantaj valoj,
vekante homojn, bestojn kaj la birdojn
kiuj ekflugas super la altaĵoj:
super la verdaj kampoj kaj montpintoj*

kie montriĝas belo kun spontano.

*Dum birdoj tion faras
laŭ tasko ordinara
al kiu sia mem natur' inklinas
ĉiam l' animo mia triste larmas,
kiam la ombroj ĉion sombre nigras
aŭ venas lum' kun siaj heloj klaraj,
tiam, galope fluas larmoj miaj...*

Pli frue ol Garcilaso, neniu poeto kantis en la kastilia lingvo la malfeliĉojn de amo profunde sentita aŭ la mil diversajn sentojn de idealigita amo, kiel oni povas legi en sama citita eglogo:

*La mildaj karesemaj diroj viaj,
-en kiu fremdorelo nun belsonas?
Viaj okuloj klaraj kaj sentivaj,
kiun rigardas kaj de nun adoras?*

*Por kiu ŝanĝis vi la amon mian
kaj rompis mian fidon al vi, ŝtonan?
Kiun fremdkolon ame vi katenas
per viaj belaj brakoj dolĉ-amoraj?
Eĉ kor' marmora tute ne toleras
mian hederon vidi, horo trompa!*

*plektitan sur alia mur' ĉagrena;
kaj tiu am' despera en mi vora
amaras min kaj mian koron premas...*

Tiuj versoj estas dolora lamento despere sentata, plendo kiu apenaŭ trovas la solan konsolon de la naturo, kiun la poeto amas, kaj tial komunikas al ĝi siajn suferojn kiam li daŭrigas:

*Eĉ mem la ŝtonojn, mia plor' kortuŝas,
kaj sian malmolecon tuj frakasas;
kliniĝas l' arbobranĉoj grundon tuŝas
kaj birdoj, kiuj tre plezure kantas,
la tonon ŝanĝas, kiam min aŭskultas,
kaj mian morton sentas kaj imagas.*

*Post vigla ardo kuŝas
la best'sovaĝa laca,
kaj kiam ĝi dolore min ekaŭdas
por aŭdi min la dormon ja forlasas.*

*Ho, amo! Vi montriĝis pri mi dura
eĉ per l' okuloj vi ne min kompatas
mi sentas mian koron senstimulan
kaj nur per larmoj ĝi trankvile pacas!*

Garcilaso estas poeto kun mesaĝo: li komunikas al la legantoj la idealon pri beleco de la homoj de sia epoko. Kiel propra mesaĝo, li esprimas sian doloron antaŭ la dramo de nebla amo kaj insiste montras sian fidelecon al la reĝa politiko kiel decas en reĝa kavaliro. Lia petrarkismo estas aŭstera, profunda kaj konciza, kiel koncernas al kastilia kavaliro. Atentas li la pejzaĝon same kiel la renesancaj poetoj, sed tuj turnas siajn okulojn al Toledo amata, kaj kiel amanto de la naturo revas ĉe la riverbordo de la loka Taño, kiel oni povas konstati per ĉi versoj de la "Tria Eglogo":

*Proksime de river', l'agrabla Taño,
ekzistas lok' izola kun salikoj
vestitaj de hedera verdo-ĉarmo
de l' trunko ĝis plej altaj branĉopintoj.*

*Kaj tiom dense teksas foliaro
ke l' verdon ne atingas sunradioj...
La akvo banas la herbejo-kampon
kun sono gaja al orel' kaj birdoj,
kristala Taño tiel milde iras,
ke oni dirus ke ĝi amsopiras.*

*Loĝanta tie bela akvo-nimfo
siajn orpurajn harojn kombis distra,*

*eligis ŝi la kapon kaj kun miro
pleniĝis la herbej' de floroj disaj...*

Garcilaso de la Vega mortis kiam li apenaŭ estis 35-jara, ricevinte gravan vundon en batalo, ĝuste kiam oni atendis de li ankoraŭ pli gravajn beletrajn kreaĵojn, pli altajn lirikajn atingojn. La delikataj brilaj poemoj de Garcilaso, kun temoj bukolikaj pri grekaj-latinaj dioj kaj amaj argumentoj, kunvivis kun la tradiciaj lirikaj popularaj kanzonoj kiuj plenigis tutan epokon.

Sankta Teresa de Ávila (1515-1582)

Grava verkistino el la hispana beletra mistikismo, religia doktorino kaj reformatora fondintino de la regularo de monaĥa ordeno, Sankta Teresa de Ávila estis unu el la figuroj plej elstaraj de sia epoko: ŝia doktrino kaj instrukapablo por persvadi, ŝia rafinita personeco kaj mistika sento pri amo, ŝia simpleco eĉ por pritrakti la plej altajn temojn de la homa spirito, donas eksterordinaran dimension intelektan al ŝia verkaro, sendube unu el la plej brilaj el la tiutempa hispana beletro.

Ŝi naskiĝis en Gotarrendura (Ávila) en la jaro 1515, kaj jam infanaĝe ŝi montris sian inklinon legi, precipe prikavalirajn librojn, kio iamaniere influis ŝin konjekti la vivon kiel idealo, laŭ la stilo de la tiamaj kavaliroj, kiuj oferis sindoneme siajn strebojn al Dio kaj al senhelpaj malfeliĉuloj. En tiu idealisma etoso ŝi kreskis revante pri fantaziaj spiritaj konkeroj kaj imagante piajn epopeojn por konverti la nekredantojn...

Nur deknaŭjara ŝi forlasis la gepatran hejmon por eniri en monaĥejon, kie ŝi devis lerni doktrinon kaj disciplinon, sed ŝi tuj rimarkis la grandan abismon ekzistantan inter la pragmata rutina vivo de tiuj religiaj centroj kaj tiun, kiun ŝi imagis kiel pli adekvatan por tiuj komunumoj: ŝi amis la

homon kiel saĝa kreo de Dio, kaj Dion kiel maksimuma amo de ĉiuj amoj.

Ŝi, do, tute ne komprenis la pasivan sintenon kaj fikcian disciplinon de tiuj komunumoj kaj tuj pensis nepre reformi la ordenon, por igi ĝin pli efika kaj la komunumojn pli fervoraj kaj efektivaj.

Alia fakto profunde influanta ŝin estis grava malsano kiun ŝi suferis kaj malebligis ŝin aktivi dum longa tempo. Ŝi estis ĉe la bordo de la morto kaj eĉ en certa okazo oni konsideris ŝin forpasinta. La profunda observado de la vivo sen iu ebla reago de sia malsanullito, plifortigis ŝian internan vivon kaj devigis ŝin rekonsideri la tutan sistemon pri homaj valoroj. Tio donis kiel rezulton la bezonon pli intense ami Dion kaj potencigi la propran spiriton por plenigi ĝin per la plej puraj diaj esencoj...

Sankta Teresa vidis la mondon, la religion kaj ĉion, kio ŝin ĉirkaŭis per okuloj de poetino, kaj prikantis verse aŭ proze ĉiujn nuancojn, kiujn ŝi perceptis en la homa spirito. La versoj, kies periodoj kaj reguloj eble bremsis la flugon de la idealisma fantazio de Teresa, ne atingis la altan kvaliton de ŝia prozo, sendube unu el la plej elegantaj de ŝia epoko: unika de la vidpunkto de la ideoj pri profundaj doktrinaj konceptoj, kaj sekve esprimo plej alta kaj bela de mistikaj ideoj.

La versoj de Sankta Teresa ne nur ne ignoras la belecon de nia mondo, sed taŭgas kiel vehiklo de la sentoj de la homa spirito, kies celo estas nur malkovri en nia interno la plej sekretajn fontojn de nia mistika idealismo kaj igi tiujn sentojn servi kaj omaĝi Dion. Jen versoj esprimantaj tiun celon:

Aspiro pri eterna vivo

GLOSO

*Mi vivas ne mem vivanta,
kaj mi tian vivon vokas,
ke mortas mi, ĉar ne mortas.*

*El ĉi dia unuiĝo
de l' am' kiun mi ja vivas
restas Di' de mi kaptita
kaj libera mia mio,
sed vidi kaptita Dion
tiom al mi furoras,
ke mortas mi, ĉar ne mortas.*

*Ho Di', kiom viv' longiĝas!
kion daŭras ĉi ekzilo,
ĉi prizon' kaj pun-ekzisto
de l' animo katenita!*

*Nur atendi la eliron
tiel ŝire min doloras,
ke mortas mi ĉar ne mortas.*

*Kiom vivo min amaras
sen la ĝuo de l' Sinjoro!
ĉar se am' ĝojigas koron*

*Ho Di', kiom viv' longiĝas!
Kiom daŭras ĉi ekzilo,
ĉi prizon' kaj punekzisto
de l' animo katenita!
Nur atendi la eliron
tiel akre min doloras,
ke mortas mi, ĉar ne mortas.*

*Kiom vivo ja amaras
sen ĉeesto de l' Sinjoro!,
Ĉar se am' ĝojigas koron
la esper' ne tro lontanas;
Di' mildigu mian ŝarĝon,
peza kiel ŝtal' malmola,
ke mortas mi, ĉar ne mortas.*

*Vivas mi kun la konfido,
ke mi fine nepre mortos,*

*ĉar mortanta vivo trovos
la esperon kaj la fidon;
morto por atingi vivon,
mi atendas plenfervora,
ke mi mortas, ĉar ne mortas.*

*Jen, konstatu vi l' amforton;
viv' ne estu al mi ĝena,
ĉar nur al vi laste restas
por vin gajni perdo-ploron,
venu haste mort' leĝera,
venu jam la morto dolĉa,
ke mortas mi, ĉar ne mortas.*

*Tiu supra viv' ĉiela
estas ja l' aŭtenta vivo,
ĉar ĝis la ekzisto-fino
oni ne ĝin ĝuas plena;
mort' ne estu trov-evita,
vivas mi mortanta glora,
ke mortas mi, ĉar ne mortas.*

*Viv', kion mi doni povas
al Dio en mi vivanta,
se ne estas al vi, vana,
por alia viv' pli bona*

*kaj ĝui Lin pli ekstaza?
Mi tra l' mort' Lin trafi volas
kaj mortas mi, ĉar ne mortas.*

*For de vi restanta sola,
kian vivon al mi restas
sed suferi morton certan
el ĉiuj la plei angoran?
Mi kompaton pri mi sentas
ĉar mia malbon' hororas,
ke mortas mi, ĉar ne mortas.*

Kiel oni povas facile rimarki, ĉiuj versoj estas enkadritaj en preskaŭ unu sola temo: ŝia delira amo al Dio. Tio fakte signifas certan malriĉon pri temoj, kiun ŝi superas, kiam ŝi uzas prozon: la prozo de Sankta Teresa estas flua, eleganta, vere ĉarma, ĉar ŝi verkas tiuokaze sub la deviga postulo didakta interesi la ceterajn pri tio, kion ŝi konsideras kiel propra misio. La versoj de Teresa estas kvazaŭ preĝo, “dialogo kun Dio”, ŝi diris.

La prozo estas dialogo kun la homoj kaj en tiuj okazoj ŝi simple parolas, serene, sen ia ajn aŭtoritata tono; kaj eĉ kiam ŝi certigas ion, tuj ŝi aldonas “miaopinie”. Ŝi evitas la teknikajn vortojn kaj malmulte uzas la teologan terminologion, kaj tio eksteriĝas per tiu simpleco, kiun ni jam aludis. Tio ebligas la personojn kun ne tro alta kultura

nivelo, kompreni ŝin perfekte, ĉar ŝia stilo rekta kaj kolokva parolas al la homa koro. Cetere ŝi uzas tre ofte diminutivojn, karesajn kaj etigajn terminojn, kaj tio donas al ŝiaj esprimoj spontanen kaj amikeman freŝecon...

La verkaro de Sankta Teresa disvastiĝis tra la tuta mondo, ĉar ŝiaj verkoj estas tradukitaj al multnombraj lingvoj: pli ol cent hispanaj eldonoj, kvindeko en la franca kaj itala, dudeko en la germana kaj portugala, kaj laŭ malpli alta nivelo, en la angla, pola, rusa, nederlanda, kroata kaj multaj aliaj lingvoj.

La influo de la verkoj de Sankta Teresa sur aliaj verkistoj estas granda, precipe inter mistikuloj, kaj inter ĉi tiuj ni tuj citu ŝian samtempulon, la poeton Sankta Johano de la Kruco.

Sankta Teresa verkis pli ol dekon da libroj, pli ol kvincent leterojn kaj tridekon da poemoj...

Teresa Cepeda Ahumada, religie Teresa de Jezuo, forpasis en Alba de Tormes (Salamanca) en 1582.

Gutierre de Cetina (1520-1560)

Poeto naskiĝinta en Sevilo, ofta vojaĝanto tra la mondo, kaj dum iom da tempo kortegano kaj militisto.

Lia poezia verkaro konsistas el kvin madrigaloj, 244 sonetoj, 11 kanzonoj, 17 epistoloj kaj 15 diversaj aliaj poemoj. Li precipe prikantis la amon, ne laŭ la platona senco sed kiel sento reala de la propra vivo, sekve li ne idealigis la virinon, sed liaj esprimoj estis ĉiam delikataj, sentemaj, plena de muzikaj resonoj... Aperas en ties versoj certaj rafinitaj influoj de la italo Petrarko, kaj de la hispanoj Ausias March, Boscán kaj Garcilaso, ĉe kies skolo li lernis la lirikarton, sed super tiuj influoj ŝprucis lian originalan stilon kaj kreemon, kiu donis al li grandan prestiĝon.

Jen unu el liaj plej belaj madrigaloj:

Helaj okuloj...

*Okuloj heloplenaj,
se laŭdojn indas via dolĉrigardo,
kial vi min rigardas kun singardo?
Se ju pli pie belaj
des pli vi sorĉas kiun vi rigardas,
kial vi montriĝas al mi durarda?*

*Okuloj tre serenaj
rigardu min almenaŭ, ne kolera.*

En 1546 Gutierre de Cetina vojaĝis al Meksikio kun sia onklo, ĝenerala prokuroro, kaj tie mortis dum nokta priama kverelo kontraŭ alia kavaliro, kiam apenaŭ li nur estis 37-jara kaj tiom oni atendis de lia talento.

Fray Luis de León (1527-1591)

Katedra profesoro, verkisto, filologo kaj poeto. Lia prozo simpla, belstila, klara kaj profunde lirika, faris de li, la plej fidelan reprezentanton de tio kio signifis reale en Hispanio Renesancon. Neniu kiel li, sciis kunfandi en unu solan, la kulturajn fluojn kiuj konverĝis en lia epoko: la klasikan heredon, la italan influon, la hispanan tradician menson kaj la profundan religian mesaĝon el pasinto.

Liaj ideoj platonaj devenas el la klasika mondo; lia koncepto pri mondharmonio rekte el Pitagoro. Liaj idealaj modeloj estis Vergilio kaj Horacio, el kiuj li lernis ami naturon kaj ĝui izolecon. Li komprenis tuj la valoron de la biblia poezio, kaj sendiskute li estis unu el la plej elstaraj hebreistoj de sia epoko.

Lia poezio, tiel altvalora kiel lia prozo, senorname elegantas. Lia inspiro ne fontas el la tuja realo, sed el la beleco de la naturo, kiu kondukas lin emfazi la ideon pri eterneco. Fray Luis kristianigis la klasikajn ilojn beletrajn laŭ la religia spirito de la renesanco.

Ankoraŭ tre juna, li gajnis la katedron pri Teologio en la Salamanka Universitato konkure kun la dominikanoj, kiuj neniam pardonis lian triumfon. Fray Luis de León uzis la latinan lingvon por oficialaĵoj, la kastilian por la poezio kaj aliajn lingvojn, (itala, hebrea, kaldea) por studi. Tio ebligis

lin esplori la internan signifon de la Sanktaj Skriboj sub diversaj aspektoj kaj traduki kastilien “La Kanto el la Kantoj” kun komentoj. Tial li estis enkarcerigita kvin jarojn, akuzita de simpatio al la judaro.

Kiam li eliris el prizono, li verkis:

*En ĉi tiu fikarcero
min enfermis l’ ambicio,
la mensog’ kaj l’ envio
suferi en mallibero.*

*Feliĉa filozofio
tiu de la saĝa homo
pacvivanta sen ornamo
kun povraj manĝo kaj domo,
neenviata, sen nomo,
sola, nur kun dia amo!*

Lia tradukemo ankaŭ trafis “La Bukolikoj” de Vergilio, “La Odoj” de Horacio kaj “Psalmoj” de David. Li verkis originale interesajn librojn, ni citu “La perfekta edzino” (trad. al Esperanto de A. Jiménez Loira), “Nomoj de Kristo” kaj aliajn. Li verkis originale ankaŭ belajn poemojn: “Profetaĵoj al rivero Tajo”, “Izola vivo”, odojn “Al Salinas”, “Al Filipo” kaj aliajn.

Jen elstara poemo lia, kiun ni provis traduki:

Serena nokto

I

*Ĉe l' vido de l' ĉielo
de lumoj multenombraj ornamita,
rigardas mi al tero
dumnokte nigre frida
en dormo kaj forgeso infinita.*

II

*Ĉagreno, am' kaj tristo
anksion vekas, mia koro varmas;
l' okuloj sen rezisto
fariĝas font' kaj larmas;
kaj la ĉielon laŭde mi proklamas.*

III

*Loĝejo grandioza!
Elstara templ' de plaĉ' kaj klar-kulmino,
l' anim' ĉe ĝi ripoza,
pro kia trompfascino
restadas en ĉi ter-prizon' ĝis fino?*

IV

*Ho, kia misdecido
pri ver' modifas la senduban sencon
kaj pri la dia fido
konjektas falsan penson
sekvante ŝajnan veron aŭ tendencon?*

V

*Liveras sin al revo
la homo, sed pri si mem ne atentas,
kaj lanta paŝ' sen strebo
turnas ĉiel', silentas,
lin rabas vivo, kiu ne aŭtentas.*

VI

*Vekiĝu ho, mortonto!
Rigardu bone en vin mem, ho homoj!;
l' animoj el ĉi mondo
faritaj el bondonoj
Ĉu vere povos vivi laŭ fantomoj?*

VII

*Ha, levu hom' la vidon
al tiu ĉi eterna brila sfero!
Ĉu trompos vin la fido
al flata viv' sur tero
kun ties tim' kaj ĝia plen-espero?*

VIII

*Ĉu ne malsprita tero
estas nur unu el la punktoj brumaj,
ne atentinda ero
kompare al resumaj
pase', futur' kaj nun' eterno-lumaj?*

IX

*Kiu ne tion vidas
kaj la mizeron de la ter' valoras,
ne ĝemas, ne plu vidas,
ne rompas kion glorias
el bonoj kiuj la anim' trezoras?*

X

*Kontenton oni spiras,
ĉi tie regas paco por ĉiamo,
pri ĝi ni ja sopiras;
sur alta seĝ' de l' Amo
ĝi sidas en sanktega glor' kaj famo.*

XI

*Enorma bel-prezenco
montriĝas tie ĉi en sia helo,
klarega lumpotenco*

*en sia tuta belo
printemp' eterne floras en ĉielo.*

XII

*Ho, belaj kampoj veraj!
ho, freŝaj verdpaŝtejoj bonodoraj!
Riĉhavaj ŝaktoj teraj,
bienoĵ tutvaloraj
kaj valoj fruktodonaj brilkoloraj!*

Grandparte el la poemoj de Fray Luis de León estis verkitaj sub la metrika versformo "liro", (strofo kvinversa: tri sepsilaboj kaj du dekunusilaboj, en konsonanca rimo, aBabB, kiun mi rigore respektis en la traduko). Versoj pensemaj kaj pensigaj kun profundaj konceptoj metafizikaj, gravaj rimarkoj filozofiaj, ĉarmaj metaforoj.

Tamen ĉion ĉi li esprimas per tute simpla lingvo, kiel en tiu ĉi poemo:

Izolita vivo

*Kiel kviete vivas
kiu por fuĝi el monduma bruo
kaŝan padon trairas
sekvante kun plezuro
la saĝajn homojn rarajn sur ĉi spuroj.*

*Kiu en sia brusto
ne sentas ambicion por la gloro,
envias kostajn luksojn
kaj la artan plafonon
lerte farita de arab' per oro.*

*Kiu indiferentas
kiam famo trumpetas sian nomon,
kaj ne aŭdas, sincera,
laŭdajn flatajn parolojn,
kiujn kondamnas vero kaj honoro.*

*Kio al mi kontentas
se preferita de fingroelekto
mi la esperon perdas
serĉante tiun venton
kun mortozorgo, anksiante veron?*

*Ho river'! monta fonto!
Ho ĝuinda sekreta loko rava!
Tre proksima al rompo
Serĉas ŝip' helpon savan
Kontraŭ tempesto de kolero mara.*

Mi volas gajan tagon

*puran, liberan, sen rompita songo;
mi ne volas vizaĝon
kun severa elmonro
de kiuj laŭdas rangon kaj la monon.*

*Veku min gajaj birdoj
per via nelernita rava kanto,
kaj ne de la arbitro
de kiu fremda mano
devas atendi por ricevi amon.*

*Vivi sola mi volas,
ĝui bonon ŝuldata al ĉielo
mem vivante izola,
vivi ja en libero
sen am', malam', esperoj kaj sen celoj.
Sur deklivo de monto,
mia mano priplantis horton lindan;
ĝi en printempo floros
en promeso feliĉa
de abundaj rikoltoj fruktorigaj.*

*Kaj kvazaŭ vidavide,
por konstati la ĉarmon de la horto;
de monto freŝe briza
pura akvo de fonto*

malsupren kuras kun hastema volo.

*Kaj poste, kun trankvilo
zigzage trairante inter arboj,
de verdo vestas ĉion
kaj plenas ĉiujn padojn
de belaj floroj dise sur la kampo.*

*La horton briz' karesas
kaj ĉien portas mil plaĉajn odorojn,
skuas la branĉojn etajn
kun tiel mildaj sonoj,
ke or' kaj sceptro perdas sian logon.*

*Gardu sian trezoron
la homoj kiuj pri falsaĵoj fidas;
ne plaĉas min la ploro
de kiuj ne konfidas
kiam nordo kaj sudo prikonfliktas.*

*Antenoj streĉe krakas,
klara tago sin turnas nigra nokto,
ĝis la ĉielo klamas
konfuzaj fortaj voĉoj,
kaj la maron riĉigas bruaj sonoj.*

*Mi pensas, ke sufiĉas,
simpla manĝo sur tablo kaj en paco;
kaj manĝilaro riĉa
ĝi restu je la plaĉo
de kiu timas nek tempestan maron.*

*Kaj dum aliaj homoj
mizere sin konsumas en avido
por atingi la povon,
mi sentas la inklinon
kuŝante ombre kanti melodion.*

*Ĝuante plaĉan ombron
kronita de heder' kaj laŭroj pacaj,
atentante la sonojn
de melodioj ravaj
kiujn kun lerto plektro ĉerpas saĝa.*

Fray Luis de León estas unu el la poetoj plej elstaraj kaj admirindaj de la hispana Literaturo.

Fernando de Herrera (1534-1597)

Brila poeto jam nomita de siaj samtempuloj “la dia”. Naskiĝinta en Sevilo, kie li ĉiam loĝis, li dediĉis sian tutan vivon al studado kaj al la poezio. Prave oni rigardas lin kiel la plej fidelan reprezentanton de la sevila skolo, ĉar li sciis esprimi kiel neniu alia de sia epoko, la esencajn karakterizojn de la poezia esprimo andaluza: lumon, muzikon kaj koloron.

Liaj erotikaj poemoj-kanzonoj, elegioj, sonetoj pritraktas ĉiam amajn temojn, kiujn li idealigas, influita de sia platona amo al la grafino de Gelves, aperanta en liaj poemoj sub la nomoj: Aŭro⁹, Lumo, Fajro, Stelo, k.a. Jen soneto montranta la indikitajn karakterizojn:

*Ruĝ-flava sun', brilanta kiel flamo,
vi purpurigas bele la ĉielon;
ĉu trovis vi sur ter' pli grandan belon
similan al la Lum' de mia damo?*

*Tenera Aŭro, milda kiel amo,
Freŝdona flug' havanta kiel celon
nin luli, kiam kovras mian helon*

⁹ Aŭro: (El la latina auram)= milda karesanta vento. Nomo de la filinoj de Eolo, kiuj reprezentas la ventojn mildajn (ili aperas rajdantaj sur cignoj). En PIV: sensaĵo anoncanta al malsanulo lian baldaŭan atakon de epilepsio, k.a.

mallum', ĉu haroj vekis pli da famo?

*Luno, honoro nokta, moŝta ĥoro
da fajroj supre vagirantaj rave,
ĉu vi vin sentis inter tiuj Steloj?*

*Purega Aŭro, Suno, flam el oro
ĉu vi aŭskultis miajn plendojn prave
kaj vidis Lumon kun pli da krueloj?*

Herrera uzas en sia poezio ĉiujn kultismajn rimedojn por esprimi poezion nevulgaran; por atingi tion li poluras la lingvon, uzas latinismojn kaj belajn metaforojn, serĉas muzikajn vivkolorajn efektojn, kies onoma-topeajn akcentojn nuancas liaj versoj de sonora beleco. Resume, li celas kaj atingas la kreon de rafinita mondo regata de amo, kiel oni povas konstati en la sekvanta poemo:

*Nur de okuloj mildaj kaj serenaj
pleniĝas mia kor' kaj miaj pensoj,
nur pri beleco zorgas miaj sensoj
kaŭzo de miaj maltrankviloj ĝenaj.*

*Nur logas al mi helon el am' plena
al vent' ĵetitaj en orfaskaj densoj,
nur venas al mi el grandec' kompensoj*

al la turment' kaj am' riĉig-kortrenaj.

*Aŭskulti voĉon aŭ alian amon
mi tute ne intencas nek sopiras,
ĉar ne ekzistas gloro pli valora.*

*Se sciis mi, ke perdi mian damon
signifas perdi ŝin se mi foriras
lasu min Di' sen amo tiom vora!*

Poeto de la lirika amo kune kun aliaj rimarkindaj pripatriotismaj, li publikigis ankaŭ unu el la plej majstraj verkoj de tiu epoko pri la teorio de la beletra stilo. Kiel historiisto li ankaŭ elstaris: li estas aŭtoro de interesaj verkoj: “Laŭdo pri vivo kaj morto de Tomas Moro”, “Rakonto pri la Ĉipra milito” kaj “Batalo ĉe Lepanto”, “Historio pri faktoj ĝis Karlo la 5a”, k.a.

San Juan de la Cruz (1542-1591)

Johano de la Kruco estas la religia nomo de Juan de Yepes Alvarez. Li naskiĝis en Fontiveros, Ávila provinco. Kiam li aĝis 25 jarojn, li konatiĝis kun Teresa de Ávila, kaj ambaŭ akordis pri multaj aferoj koncernantaj la renovigon de la religia vivo, kaj pri la decido reformi siajn respektivajn karmelajn ordenojn. Tial ili ambaŭ suferis persekutojn.

Sentema kaj kun alta koncepto pri la dia amo, Johano de la Kruco ĝuis esprimante sian internan senton per la verkado, kiun li rigardis kiel la solan rimedon por dialogi kun Kristo. Rezulte de tiaj dialogoj sub formo de amemaj konfidencoj naskiĝis la mistika poezio de tiu ĉi monaĥo-poeto, kies majstra stilo kombinis la religian simbolismon origine bibliajn kun la tradicio de humanisma kulturo deveninta el la klasikuloj, kiun li posedis pro sia kleriĝo.

Tiuj elementoj, miksitaj kun certa petrarkismo, kaj la muzika kadenco de liaj versoj, evidente, altiras la legantojn.

La mistikaj pensoj de Johano de la Kruco, surbaze de Tomismaj doktrinoj, estas tiel bele esprimitaj, ke tiu poezio pri dia amo, konsistantan el belegaj simboloj kaj admirindaj alegorioj, legiĝas kvazaŭ temus pri profana amo. Laŭ opinio de Dámaso Alonso, talenta erudiciulo pri

hispana liriko, oni klare perceptas en tiuj versoj nuancojn de la stilo de Sebastiano de Kordovo. Jen unu el liaj poemoj:

Koploj de l' animo penanta Dion vidi

*Vivas mi, sen vivi mem
kaj anhelu tiel fortas
ke mortas mi, ĉar ne mortas.*

I

*En mi mem mi ne plu vivas,
vivi sen Li mi ne povas;
sen Li mi ja ne min trovas,
kion vivo ja signifas?
Mortoj mil en mi aktivas
el la viv' al mi komfortas
nur la mort', ĉar ne mi mortas.*

II

*Vivo kiun mi nun vivas
estas negativa vivo,
sekve daŭra morto-iro
ĝis Li, kies viv' edifas,
montras kion Di', signifas,
ke mi l' vivon ne elportas*

kaj mortas mi, ĉar ne mortas.

III

*For de Vi mi ne eltenas;
kia vivo min atendas
se pri ĝi mi tiom plendas
kaj nur morton mi bonvenas?
Pri mi mem mi abomenas,
sed mi pro persist' bonsortas
kaj mortas mi, ĉar ne mortas.*

IV

*Kiam fiŝ' elakvigatas,
al ĝi ne konsolo mankas,
ĉar per mort' ĝi nepre dankas
finon kiun ĝi avidas...
Kia mort' egalvalidas
vivon kiu tre malfortas
ju pli vivas mi, pli mortas.*

V

*Kiam mi konsolon celas
kaj Vin sakramente vidas,
mi fervore pli avidas
ĝui Vin, mi Vin anhelas!;
tio al mi ja turmentas,*

*ĉar doloro min elbordas
kaj mortas mi, ĉar ne mortas.*

VI

*Kaj se mi plezuron sentas,
ho Sinjor', kun la espero
vidi Vin, kaj la sufero
perdi Vin al mi desperas;
tio timon en mi vekas,
kaj l' esper' tiom fortas
ke mortas mi, ĉar ne mortas.*

VII

*Mia Di'!, el morto trista
min eligu, donu vivon,
forbaru la perspektivon
pri lig' tiel optimista,
sekve vidu min persista,
al mi tiom ĝi perfortas
kaj mortas mi, ĉar ne mortas.*

VIII

*Mian morton mi priploros
kaj la vivon mi bedaŭras,
dum pro pekoj ne plu daŭras
vivo kiu ne min gloros.*

*Ho Di'! kiam mort' min voros?,
diros mi: jam mi tre fortas!
vivas mi, car ne mi mortas.*

Neniu hispana poeto atingis til zenitan pinton en la hispana mistika poetiko. La poezio de Johano de la Kruco, riĉa je muzika ritmo kaj altaj pensoj mistikaj, multe influis postajn generaciojn de hispanaj poetoj, kiel tiuj de la nomata “generacio de la 27a”. Jen alia el liaj poemoj, tiu ĉi verkita sub la metrika versoformo nomata “liro” (strofo kvinversa aŭ sesversa ĉi-kaze: kvar sepsilaboj kaj du dekunusilaboj, en konsonanca rimo abBabB):

Amflamo viva

*Ho, ama flam' invita,
vi kiel mild-ulceras
kun milda ŝir' ĝis fund' de la animo!*

*Sed nun, ne plu evita,
enrompu se vi veras
l' am-tolon dolĉ-renkontan en intimo!*

*Ho, karcer-pun' miela!
Ho, dorlotita vundo!
Ho, mano milda!, tuŝo silk-velura*

*kun gust' de viv' ĉiela
kaj larĝa grac-abundo!*

*Promorte, morto ias vivo pura.
Ho fajro-lampa lumo
per kies klaraj heloj
la profundaj kavernoj de la senso,
iam en blindo-brumo,
kun strangaj brilaj beloĵ
apud l' amato varmas kun intenso!*

*Ho, kia milda spuro
en mia sin' postrestas,
kie sekrete nure vi solsolas!
Kaj via spir-susuro
en bon' kaj glor' majestas
dum vi, ho delikata! min amoras.*

Neniu verko de Sankta Johano de la Kruco estis publikigita dum lia vivo, kaj fakte forpasis 27 jaroj ĝis la unua publika apero de tri el liaj poemoj. Preskaŭ ĉiuj verkitaj en la prizono de la monaĥejo de Toledo.

Malfacile eksplikeblas la profunda mistera lirikismo de la versoj de tiu ĉi granda poeto. Post kvar jarcentoj, ili konservas viva la sorĉon kaj ĉarmon de la eterna beleco.

Lupercio Leonardo de Argensola (1559-1613)

L. L. de Argensola estis unu el la plej elstaraj poetoj el sia epoko. Fervora amanto de la klasikismo, lia poezio havas kiel plej gravan karakterizon krom la perfekta uzado de la lingvo, la firman volon poluri kiel eble plej skrupule, la puran stilon.

Li studis en la Universitatoj de Huesko kaj Zaragozo, kaj kun lia frato Bartolomé, ankaŭ elstara poeto, ambaŭ reagis kontraŭ la kultismo reganta dum ilia epoko, kaj laŭ tiu inklino li ĝisfunde studis la klasikulojn kaj rekomendis la legadon kaj spiriton de Horacio, Marcial, Juvenal kaj Persio.

Kiam Lupercio estis ankoraŭ tre juna, li jam estis laŭdata de Cervantes en la “Kanto al Kaliopo” de la verko “La Galateo” (1585), kune kun lia frato. Nur per du versoj Cervantes admirinde portretas la intelektan figuron de Lupercio:

*“Fruaĝa, pens’ matura, plaĉa trakto,
kun afablec’, modesta fantazio”*

Tiaj bonaj kvalitoj humana kaj intelekta ebligis lin okupi en 1586 la postenon kiel sekretarion de la duko

Villahermosa, Fernando de Aragón, kaj pli poste de la imperiestrino Maria; fine li estis elektita kronisto de la Aragona Regno.

La supre menciita poemo de Cervantes dediĉita al fratoj Argensola jenas:

Al ambaŭ fratoj Argensola

*Atestos vere pri l'afer', du fratoj,
du steloj, sunoj de la poezio,
kiujn ĉielo donis, krom genio,
talenton, arton, kun videbla sato.
Fruaĝa, pens' matura, plaĉa trakto,
kun afablec' modesta fantazio,
brodas figuron de la hom' pri scio:
el ambaŭ Lupercio Leonardo.
Per noblaj rivaleco kaj envio
ŝajnas aspiri la pli juna frato
superi la plej aĝan pri racio,
kies lirik' meritas kies flaton.*

*Sukcese verkas, kantas kun gracio,
li mastras liron kun aŭtenta arto,
ĉe Bartolomé indas ja pro tio
kion ĉe Lupercio estas fakto.*

L. L. de Argensola tradukis plurajn odojn de Horacio kaj verkis originale tri komediojn: “Filis”, “Isabela” kaj “Alejandra”. Temoj kiel la ruinoj, la vivo kaj la morto kune kun ideoj novstoikismaj ne estas malfacile trovi en liaj poemoj, inter ili elstaras tiu ĉi soneto dediĉita:

Al la morto

*Terura bildo de fatala morto,
ne plu obsedu min per song’ kruela!
per frustaciprem’ al esper’ ĉiela,
konsolo nur de mia fia sorto.*

*Elserĉu ĉe tiran’ en luksa korto,
kun jaspaj muroj kaj plafond’ juvela;
aŭ veku avarulon en dorm’ bela
per ŝvitotreme teroriga vorto.*

*L’ unua, la popolon kun agaco
vidu disbati liajn pordojn ferajn,
agreson kontraŭ liaj viv’ kaj paco.*

*L’ alia, siajn ŝtelriĉaĵojn terajn
publike malkovritajn sub minaco...
Sed lasu en la Am’ la glorojn verajn!*

Lupercio Leonardo de Argensola ne emis vidi eldonitaj siajn verkojn, kaj estis sia filo Gabriel Leonardo post lia morto, kiu savis de la malapero ĝis 94 poemojn, publikigitaj en 1634 kune kun aliaj de Bartolomé sub la titolo “Rimas de Lupercio kaj d-ro Bartolomé Leonardo de Argensola”. Vero estas, ke post longaj jaroj oni trovis aliajn poemojn en kelkaj manuskriptoj.

Luis de Góngora y Argote (1561-1627)

Genia poeto naskiĝinta en Kordovo en 1561, kreinto de la baroka stilo. Unu el la plej altaj pintoj de la hispana poetiko. En lia verkaro aperas, dum la unua periodo, kanzonoj kaj romancoj laŭ la plej tradicia stilo. Temas pri versoj popularaj vere admirindaj.

Poste, li, iom post iom evoluas al stilo pli rafinita, kiu fariĝas tute kultisma, saĝa kombino de muzikema leksikono, konstantaj mitologiaj aludoj, preciozismaj figuroj kaj vera eksplodo de metaforoj, metonimioj kaj sonoraj hiperbatoj. Tiel naskiĝis la “gongorismo”, poezio multe influanta plurajn generaciojn de hispanaj poetoj, eĉ nuntempaj.

Jen poemo de la unua periodo menciita, kvankam sen la preciozismo de tiu poezio kiu famigis lin, ne pro tio malpli bela:

Romanco

*Servis en Oran' al reĝo
hispanjuno kun du lancoj
kaj al bela Oranino
kun la kor' kaj amor-flamo;*

*tiel grandis l' amo lia
kiel logis ŝia ĉarmo,
kiam ambaŭ certa nokto
aŭdis bruon vokalarmon.*

*Temis pri tricent zenetoj ¹⁰
Kaŭzo de l' danĝersignalo,
kies ŝildoj lum' malkovris
lunradioj de lontano,
jen la ŝildoj alarmigis
ĉe la tur' soldat-gvatantojn,
de la turoj al la fajroj,
de l' fajroj al sonorado
kaj sekve al la amanto,
kiam estis li kuŝanta
ĉe la brakoj de la damo.*

*Aŭdis la amant' la bruon
de l' tambur' kaj trumpetaro;
pikis al li la honoron
kiu bremsis en li amon:
Malkuraĝ' ne iri estus
sed forlasi ŝin maldanko,
ŝi de lia kolo pendis*

¹⁰ zenetoj: gento berbera el Nord-Afriko parolanta la dialekton zenatiya. Ili estas grupigitaj de la Orienta al la Okcidenta Magrebo, inkludita la teritorioj de l' Aurés, la duonomadaj de la orienta Rif kaj certa parto el la orienta Maroko.

*kiam prenis li la glavon
kun plorego kaj sopiroj
diris al li jenan frazon:*

*“Eliru al kamp’, sinjoro,
mia plor’ la liton banos,
sen vi mia lito estos
ankaŭ por mi bataalkampo!*

*“Vestu vin kaj haste iru
atendas vin generalo;
vi ne urĝe min bezonas
kaj vi nepras al batalo!*

*“Nuda povas vi eliri,
mia plor’ ne estas baro,
ja vi havas via brusto
kiel la plej duran ŝtalon »
kaj vi tial ne bezonas
eĉ la uzon de la armoj”*

*Rimarkante la hispano
kiom tiu babilado
bremsas lian findecidon
diras al ŝi kun sagaco:*

*“Mia kara sinjorino,
(kun koler’ nun pli ol ĉarmo)*

*por ke mi kombinu saĝe
la honoron kun la amo:
mia korpo iru haste
kontraŭ maŭroj al batalo
kaj l' animo mia restu
kun vi, mia dolĉa ravo!*

*“Donu al mi nun permeson
iri tuj la batalkampon
por ke je la nomo via
mi respondu la alarmon
kaj mi tiel, kara mia!
batalos kun plena ardo”*

El la kultisma poezio de Gongoro elstaras liaj sonetoj. Al mi speciale ŝatas tiun dediĉitan al lia naskiĝurbo:

Kordovo

*Ho, gloraj muroj! turoj de l' genio
de digno, famo kaj majesto glora!
Ho, riĉaj bedoj kaj montar' sunora
el noblaj sabloj, sen orum-ebrio!
Ho, grandrivero de Andaluzio!
Privilegias sun', ĉiel' favora!
Ho, flor' el Hispanio! tre valora*

pri plumoj, glavoj kiel pri gracia!

*Se inter ruboj, musk', restaĵoj tristaj
frukta ĉar Darro kaj Genil' ĝin banas
ne nutris min pri via sorĉmemoro...
Ne indu ĉi-okuloj de vi distaj
vidon de l' turoj, mur', river', sunoro
kaj montoj, ho patrio, flor' hispana!*

Citindaj verkoj de Gongoro estas "Panegiro pri duko Lerma", "Solecoj", la teneraj versoj "Fratinet' Maria" k.a. krom multenombraj romanoj, sonetoj kaj trioletoj...

Koloro kaj lumo estas la esprimoj kiuj nuancas la versoj de Gongoro, kiu, kiel en aliaj aspektoj sekvas la petrarkisman heredon, tamen ĉar li uzis la metaforojn kaj metonimiojn tute senmezure kun la sola celo transformi la realon per beleco, li atingis eble ne la celitan efekton, ĉar la troa beleco impresas sed ne plu emociigas, ja mankas al ĝi tiun humanan varmon, kiu postulas la serenan ekvilibron inter la menso kaj homa koro, tial tiu poezio donas al ni la sensacon pri io sufiĉe frida...

Luis de Gongora y Argote forpasis en la jaro 1627, sed lia poezia stilo reaperos multaj jaroj poste de la mano de aliaj grandaj poetoj kiel Federico Garcia Lorca, Rafael Alberti, Miguel Hernández k.a.

Félix Lope de Vega y Carpio (1562-1635)

Félix Lope de Vega y Carpio naskiĝis en Madrido. Ankoraŭ tre juna, li komencis travivi ŝtorman vivon, kiu riĉigis lin per spertoj kaj plenigis liajn viverojn per ĝuoj kaj malfeliĉoj.

Kiam li estis 17-jara, li enamiĝis al Elena Osorio (Filis), filino de geaktorj, sed rompinte siajn amrilatojn kun ŝi pro malfideleco de la belulino, li ekverkis durajn satirojn kontraŭ ŝi kaj ŝia familio. Pro tio oni procesis kontraŭ li unue, kaj ekziligis lin de la kortego tuj poste (1588).

Baldaŭ, fuĝinte kun Isabel de Urbina (Belisa), li edziĝis kun ŝi per prokurora dokumento kaj post ne longe aniĝis en la mararmeo. Returne de lia aventuro, la geedzoj instaliĝis en Valencio, kaj du jarojn poste li foriris al Toledo, kie li servis kiel privata sekretario de la markizo de Malpica unue, kaj poste, de la kvina duko de Alba en Alba de Tormes. Tie forpasis lia edzino (1595) kaj, jam indultita, reiris denove al Madrido.

Kelkajn jarojn poste oni denove procesis kontraŭ li pro lia neleĝa kunvivado kun Antonia de Trillo, kaj iom pli poste li enamiĝis plian fojon kaj kunvivadis kun Micaela Luján (Camila Lucinda). El ĉi lasta longa amo naskiĝis du gefiloj, Marcela kaj Lope Félix. Tiu intensa amora vivado tute ne malhelpis reedziĝon de Lope kun Juana de

Guardo (1598). En 1612 forpasis lia filo Félix kaj en 1613 lia edzino Juana de Guardo.

Post tiuj forpasoj li vivis krizajn horojn, kiuj puŝis lin fariĝi pastro, sed en 1616 li denove enamiĝis al Marta de Nevares, (Marcia Leonarda), apenaŭ 26-jara, kiu plenigis la lastajn jarojn de lia sentimentala vivo.

Oni ne povas disigi la vivon de la homo disde tiu de la artisto: unu neeviteble influas la alian, per mizeroj, gloroj, suferoj kaj pasioj. Pri ĉiu el tiuj virinoj kaj iliaj dramaj aŭ ĝojaj viveroj, Lope abunde verkis, uzante la pseŭdonimojn, kiujn ni metis parenteze. Dum tiuj jaroj li iĝis nediskutebla majstro de beletro kaj teatroverkado en Hispanio kaj superis, kvante kaj kvalite, la ceterajn tiamajn verkistojn, kvankam en tiu epoko tute ne mankis bonaj aŭtoroj en nia lando. Lia populareco estis tiel granda, ke kiam oni volis laŭdi ion bonan oni kutimis proverbe diri: ĝi estas de Lope.

Tio pravigas la aserton de Cervantes, kiu nomis lin “monstro de la naturo”, ne nur pro la mirinda abundo de lia verkokreado -vere nenormala-, sed ankaŭ pro liaj genie altkvalitaj verkoj.

Lope de Vega okupiĝis pri ĉiaj ĝenroj literaturaj, de la pripaŝtistaj romanoj kiel “La Arkadio” ĝis la epikaj poemoj kiel “Jerusalemo konkerita”; de la prireligiaj teatraĵoj kiel

“La falçado” ĝis la komedioj historiaj kaj pri hispanaj legendoj kiel “La kavaliro de Olmedo”, “La plej bona urbestro, la reĝo”, k.a.; ankaŭ primoraj dramoj aŭ pri honoro kaj glavo kiel “La komandoro de Ocaña”, “Fuenteovejuna”, “Puno sen venĝo”, k. a., kaj kun la romanoj, dramoj, komedioj, religiaj teatroverkoj, samtempe ankaŭ multnombraj belaj sonetoj, paŝtistaj kaj primaŭraj romanoj, kanzonoj, mallongaj popolaj poemetoj plenaj de muziko kaj kadenco popularaj... tiom da, ke lia amiko Pérez Montalbán kalkulas ne malpli ol 1.800 komediojn, 400 prireligiajn teatraĵojn kaj multnombrajn ĉiaspecajn poemojn.

La aŭtoro mem deklaras 1.500 komediojn verkitajn. Nun oni konservas 468 komediojn kaj 42 prireligiajn teatraĵojn krom multaj poemoj. Ne unu solan fojon Lope verkis kompletan komedion en unu sola tago. Li mem diris:

*Vere, nur dum horoj dudek-kvaraj
pasis muzoj al scenej' teatra...*

Lope estis, antaŭ ĉio, lirika poeto kaj lia poezio aperas, precipe en jenaj verkoj: “Rimoj” (1602); “Sanktaj rimoj” (1614); “Spirita Romancaro” (1619); “Homaj kaj diaj rimoj de la licenciulo Tomé de Burguillos” (1634) kaj “La Parnaso-bedaro” (1637), sed ni diru tuj, ke en ĉiu verko de Lope oftas lirikaj fragmentoj. Ĉiujn metrojn li uzis kun

simila lerteco: romanco, soneto, terceto, kanzono, kristnaskaj kantetoj, glosa, epistolo, eklogo, elegio, epigramo...

Logis lin speciale, la popola liriko kaj la kultismo de Gongoro, kvankam li ĉiam defendis la "klaran version". Pri temoj, li neniam serĉis alies fontojn, ĉar lia propra vivo estis sufiĉe riĉa por tiu celo, en kelkaj kazoj eĉ sen difinita temo li sciis verki majstran poemon kaj tiel belan kiel tiu ĉi mondkonata:

Subit-soneto

(El la verko "L'arĝentinfanino")

*Soneton de mi Violanta petis,
Neniam tiel premis min dilemo!
Laŭ dir' ĝi estas dekkvar-versa skemo...
Jen ŝerce-ŝerce mi tri versojn metis!*

*Ke mi ne trovos rimojn, mi timetis,
Sed marŝas dua Kvaro de l' poemo!
Alveni ĝis la Trioj: jen problemo,
Post tio mi la zorgojn jam forĵetis.*

*L'unuan Trion marŝas mi, konjekte,
Ke mi eniris ĝin dekstrapiede.
Ĉar per ĉi vers' mi finos ĝin korekte.*

*La dua jam! Mi kredas, ke komplete
Mi faris dektri versojn, laŭprojekte.
Kalkulu nun! Ĉu dekkvar? Estas prete!*

La traduko estas de Kalocsay (“Lingvo, stilo, formo”, p. 111), sed sama poemo ankaŭ havas aliajn versiojn de hispanaj esperantistoj tiel brilaj kiel ĉi tiu. Belajn sonetojn de Lope abundas, jen unu el ili, kiun mi kuraĝe sed tute modeste volis traduki:

Variaj efikoj el Amo

*Kuraĝi, sveni, senti sin kolera,
acida, tolerema, milda, ĝena,
kontenta, morta, viva kaj ĉagrena,
fidela, fia, tima aŭ tenera.*

*Supozi nur en bon’ l’ ekziston vera,
aperi gaja, trista, fidoplena,
aŭdaca, ofendita, forta, svena,
ĵaluza, digna, simpla aŭ fiera...*

*Postulas ankaŭ tiu amosento:
venenon trinki kvazaŭ dolĉan vinon,
ĉielon ĝui en inferturmento,*

*por elreviĝo doni mem l' animon,
la vivon sen perfort' kaj violento..
jen am': laŭ homo spertis l' amfascinon.*

Samlinie ni povas taksu la lirikajn valorojn de tiu ĉi soneto,
kiun same mi mem tradukis:

Sur blanka mam'...

*Sur blanka mam' de ĉarma Leonoro
estaĵo eta pikis kaŝe-kreda
sur haŭta makulet' per mord' obseda,
ruben' ĉe perloj kaj akar' ĉe floro.
Ŝi zorge banis pro dezir' el koro
siajn du pintojn el ebur' blanketa
kaj per detru' de l' pul' agrese preta
duoble venĝas ŝia punrigoro.*

*Ho, ve! -mortante la pulet' protestis-
"Pro kulp' sengrava jen kruela sorto!"
kaj diris mi: "Feliĉa ja vi estis!,*

*Ne mortu, petu ŝin laŭ mia vorto,
ke mi ŝin piku, kie vi mem restis,
kaj tuj mi ŝanĝos vivon kontraŭ morto ».*

K. Kalocsay, F. de Diego, J. Grau Casas, V. Inglada, A. Grabowski, A. Núñez Dubús, k.a., plej elstaraj talentaj esperantistoj de nia Movado, estis logitaj de la poezio de Lope kaj tradukis poemojn de nia granda poeto. Pli dramaj versoj ol la antaŭe cititaj de Lope, estas jena soneto, jam antaŭ longe tradukita al Esperanto, sed miaopinie kun erara ritmo. Jen mia versio:

Judit

*Pendas de l'sango-lit' ĝis plank-kahelo
la dekstra brak' sovaĝa de l' tirano,
Betuljon volis venki li en vano
kaj tiris al si fulmojn el ĉielo.*

*Volvita ruĝtapeto pro anhelu,
de l' baldakeno al maldekstra mano,
malkovras makabraĵon, mort-rikano:
teruran trunkon kiel glaci-selo.*

*Versita Bakko sur kiraso-ŝildo,
la tablo, glasoj, renversita ĉio;
gardistoj dormas en senhonta bildo.*

*Kaj deĵoranta sur remparo, vigla,
kronita de l' popol', Israelio,
la ĉasta gloriĵo alte brilas.*

Sed, por perlabori sian ĉiutagan panon, Lope devis teatroverki, kaj ĝuste sur tiu kampo li montriĝis genia renoviganto. Li elmetis siajn priteatrajn teoriojn en la verko “Nova arto pri verkado de komedioj” (1609). En la 16a jc. kontrastas du malsamaj teatrosistemoj: tiu devenanta el la liturgia teatro de la mezepoko kaj la humanisma laŭ imito de la komedio de Plaŭto kaj Terencio.

Ankaŭ en la tuta Eŭropo oni debatis pri ambaŭ teatroformoj. En Hispanio triumfas la unue menciita sistemo, kvankam sufiĉe riĉigita per elementoj de la dua

Sed ni revenu al la liriko, celo plej grava de tiu ĉi biografieto, por emfazi la absolutan regadon de Lope de ĉiuj versoformoj tiam funkciantaj, ni metas kiel ekzemplon la romancon. En tiu versoformo ekzistas tre bela poemo perfekte tradukita de Fernando de Diego, kies unuaj versoj diras:

*Mi al miaj soloj iras,
kaj de l' soloj miaj venas,
ĉar, por mi, kompan' plej bona
nur la propraj pensoj estas [...]*

Ankaŭ la sepsilaban versoformon, hodiaŭ tre malofte uzatan en la nuna poetiko, li majstre regis.

Jen unu el tiuj poemoj:

Povra barketo mia...

*Povra barketo mia,
rompita kontraŭ rokoj,
sen mastoj kaj sen veloj,
tutsola inter ondoj.*

*Kien sencel' vi iras
kaj trovos bonan vojon?
Dezir' ne estas taŭga,
kiam frenezas voloĵ.*

*Kiel la grandaj ŝipoj,
forlasas vi marbordon
kaj l' altan maron serĉas
kun plej kuraĝa forto.*

*Pli bone en bonŝanco,
same en fortuntrovo,
negrave en defendo,
incitas vi la ondojn.*

*Rimarku, ke al klifoj,
Puŝata ja de ŝtormo,
oni vin puŝe portas,
simile la honoron*

*l' envio alfundigas,
kiam perfidas homo.*

*Kiam vi trairadis
de marbord' al marbordo,
vi timis ja neniam
ondegojn nek ciklonojn.*

*Sekura vi navigis,
kun la certeca movo
de tiu, kiu iras
tra propraj ter' kaj domo,
ĉe malprofund' de maro
malŝancas sink' aŭ drono.
Ja dubo ne ekzistas,
ke virt' sen riĉ' kaj mono
ne donas la feliĉon
kaj ankaŭ ne bonsorton,
oni ne taksas perlon
dum restas ĝi en konko.*

*Vi diras, ke barketoj,
favora vent' ĉe poŭpo,
post malfeliĉa starto
revenis kun riĉtrovo.*

*Rigardu ne l' aliajn,
ĉar certaj kantogloroj
signifis nur ruinon
de la vojaĝo-provo,
alies sirenkantoj
ne ĉiam donis sorton.*

*Por maraj entreprenoj
ne portas vi, kun zorgo,
blankajn mensogo-velojn
nek laŭdajn altajn topojn.*

*Honesta amo mia
devigu vian koron,
ne dignas dio surda
al plendoj de la homo.
Sed... vi ne min aŭskultas,
ho, dura malkonsolo!
ja vivo estas kurta:
ĝi estas tutbezono,
sed kiam oni mortas
malmankas ĉia volo!*

Félix Lope de Vega y Carpio forpasis en Madrido en 1635.

Bartolomé Leonardo de Argensola (1562-1631)

Elstara poeto naskiĝinta en Barbastro (Huesko) en 1562. Li studis en la Universitatoj de Zaragozo kaj Salamanko, kaj sufiĉe juna li fariĝis pastro. Baldaŭ li estis nomumita kapelpastro de la imperiestrino Maria de Aŭstrio kaj veturis al Italio, kie oficis kiel konsilanto de grafo Lemos, tiam vicreĝo de Napolo. Lia poezia talento kaj profunda ironio devenis de lia perfekta kompreno de la verkaro de klasikuloj kiel Horacio, Perso, Juvenalo kaj Marcial, krom de lia propra tendenco antaŭmeti inteligenton al fantazio, satiron al korsento.

En liaj verkoj oni konstatas lian celon al perfektigo, tial ili aperas en lingvo klara kaj polurita, kaj kiel signo karakteriza de liaj prozo kaj poezio, tekstojn sen la afekta kultisma stilo tiam uzata, precipe de Gongoro, kiun li neniam atakis, sed evitis lian metaforecan esprimmanieron.

Bartolomé L. de Argensola uzis tre ofte la beletran versan leteron, t.e. la epistolon, kaj majstris la tercetojn, kiel la jena poemeto:

*Mi sekvos la vojeton de raruloj;
la demagog-almozoj al la plebo
generas nur pli kaj pli da postuloj.*

*Kaj ĉar neniu klamas aŭ ribelos
mi sentas min satira Donkiĥoto
kontraŭ la fiverkistoj kun mem ŝvelo.*

*Milit-deklaracio kaj bojkoto
estas la justa pun' por kler-maskitoj
per batoj indaj kiel antidoto.*

Ankaŭ li majstris la soneton kaj bona ekzemplo pri tio
jenas tiu ĉi plena de filozofiemaj pensoj:

Mi al vi konfesas, Don Juan...

*Unue mi, Don Juan, al vi konfesas,
ke l' haŭto de Elvira blanka-roza
nur de ŝi havas, laŭ konjekt' supoza,
la monvaloron kiun ŝi elspezas.*

*Sed mi, post tio, diri ja necesas,
ke tiel belas la mensog' aldoza,
ke vanas konkurenc' tre serioza
eĉ kontraŭ bel' aŭtenta plej impresa.*

*Se oni scias ke Natur' ne restas
simile kiel fakte ĝi aperas
kiom mi perdis pro mensog' mucida?*

*Ĉielo blua kiun ni ja vidas
ne blua nek ĉielo vere estas,
ho, kial tiom da belec' ne veras!*

La aragona poeto verkis en prozo, inter aliaj, la daŭrigon de la prihistoria verko “Analoj de Aragono” (1630), de Zurita; “Konkero de insuloj Molukoj”, “Popularaj movadoj en Zaragozo” (1591); tri satirajn dialogojn “Menipo”, “Demokrito” kaj “Dedalo”, la unua kontraŭ la malbonaj juĝistoj kaj advokatoj, la dua kontraŭ la frenezaĵoj de la homo, kaj la tria pri la okazaĵoj de la sekretario de Filipo la 2a, Antonio Pérez.

Cetere li ankaŭ verkis multnombrajn sonetojn, primoralajn versojn, epistolojn, religiajn poemojn kun elementoj bibliaj kaj klasikaj k.a. Elektita Kronisto de Aragono, li forpasis en Zaragozo en 1631.

Francisco de Quevedo y Villegas (1580-1645)

Poeto, politikulo, eksterordinara figuro de la hispana beletro. Li studis en la universitatoj de Alcalá kaj Valladolid, kie li akiris grandajn sciojn pri sciencoj kaj artoj, kiujn li kompletigis per ampleksa kulturo akirita per obstina kaj pasia legado.

Li parolis plurajn lingvojn, el kiuj perfekte li scipovis la latinan la grekan kaj la hebrean, kio, aldonite al liaj profundaj scioj pri filozofio, teologio, historio kaj beletro, faras lin unu el la plej doktaj humanistoj el lia epoko.

Tiu ampleksa bazo de sciado ebligis lin verki, kaj verki sufiĉe aŭtoritate pri ĉiuj ĝenroj. Lian stilon karakterizas kontrastoj de la formoj kaj certa subtila satiro, kiu fariĝis terure morda kaj agresema, kiam li atakis siajn malamikojn. Lia penso estis tre influita de la stoikismo de Seneko, kiun li senlime admiris (ĝenerale la hispanoj nin sentas inklinaj al tiaj teorioj).

Kiel poeto, li estis kune kun Gongoro kaj Lope de Vega, plej alta pinto de la baroka liriko. Liaj poemoj temas pri ĉio: seriozaj aŭ festemaj, filozofiaj aŭ religiaj, politikaj aŭ satira-burleskaj, ĉi tiuj lastaj neniam superitaj de iu ajn alia poeto en la hispana beletro. Quevedo sin sentis inklinata ofte verki pri motivoj el la stoika filozofio, temoj, kiuj speciale akcentis, la efemerecon de la vivo kaj la

realecon kaj certecon de la morto. Bona ekzemplo pri tio estas jena “kantareto”:

Jam terure sonas...

*Jam tre korprema kaj terure sona
aŭdiĝas timprofunde l' fina tago,
la lasta horo, nigra en l' imago,
jam venas plena de timeg' impona.*

*Se plaĉas la ripozo pacodona,
sendita de la mort' per trompo-svago,
pli estas tio pruv' de aĉa ago
ol signo de dorlot' kompato-tona.*

*Kion intencas la Fatal' malsaĝa
pri l'hom', kiun ĝi eksavis pie,
spirito povra al mizer' domaĝa?*

*Nu, venu mort' en bona hor' gracie,
ektrovu min ne time malkuraĝa
kaj mian vivon finu plenkonscie.*

Famas ankaŭ la moraligaj kaj filozofiemaj poemoj de Quevedo, speciale kiam temas pri la virino, kiel tiu ĉi poemo aplikata al la ĉiutaga vivo:

La edzo virinserĉanta

*La edzo de virino juna, bela,
kion priserĉas ĉe virin' alia?
ĉu iun ja pli ĉarma ol la lia?
ĉu estas ĝi ne loga, malfidela?*

*Ĉu estas ŝi malmilda? Ne, miela!
Ĉu estas ŝi pli frida? Ne, pasia!
Ŝi estas rev', siren', Venus' gracia,
lilio blanka, roz' sovaĝe hela.*

*Do, kion viro serĉas kun obstino?
Ĉu trovi la virinon eskvizitan?
aŭ temas pri amuz' sen ludo-fino?*

*Ne, li ne celas inon pli incitan;
konsistas la plezuro, cel' sen limo:
serĉi, sen trovi la virinon mitan!*

La grandajn konceptojn li analizas kun akuta sentiveco, samkiel li faras, kiam temas pri Amo, per kio facile videblas lia vasta kulturo kaj talento. Jen kiel li difinas Amon:

Difinante amon

*Ĝi estas neĝ' kaj fajro, frida varmo,
glaci' kaj brulo, vundo ne dolora,
feliĉa rev' kaj tamen plej angora,
ripoz' laciga kaj ĉagren' kun ĉarmo...*

*Ĝi estas tim-kuraĝo, rid' kaj larmo,
profunda sent' en la silent' sonora,
senzorgo kun impulso tre fervora,
ja tio estas pura Am' sen garno.*

*Ĝi estas plenliber' en mallibero,
kaj kredas amikecon tute vana,
plezuron sentas ene de l' sufero...*

*Amor' ĝin skuas, ofte uragana,
ĝi estas Paradizo kaj Infero,
espero, vivo, mort' kaj flam' vulkana!*

La poemoj satira-burleskaj de Quevedo estas terure mordaj. Ni citu kiel ekzemplon kelkajn versojn de la poemo “Al unu viro granda-naza”, (admirinde tradukita al Esperanto de la majstro Fernando de Diego), eble plia moko verkita kontraŭ lia rivalo, la fama poeto Gongoro, kies nazo ja grandis kaj kies originon li suspektis juda.

La versoj diras:

*Pri viro temas, apendic' de nazo,
pri nazo temas, ja superlativa,
pri alambiko temas, duonviva,
pri spado-fiŝo de aĉ-barba klaso, ktp.*

Kiel prozisto, Quevedo estas aŭtoro, interalie, de la fama pikareska romano “Historio pri la vivo de El Buscón, Don Pablos”, unu el la plej elstaraj el tiu ĝenro iam ajn verkitaj en la hispana literaturo.

Kiel politikulo, li ĝuis feliĉajn horojn kiam li intervenis en diplomaciajn aferojn kun la duko de Osuna en Italio, sed ankaŭ vivis terurajn jarojn da ekzilo, karcero kaj suferoj.

Tre malsana li serĉas izolecon en aparta vilaĝo kaj fine forpasis en Villanueva de los Infantes en 1645.

Pedro Calderón de la Barca (1600-1681)

Pedro Calderón de la Barca naskiĝis en Madrido en la jaro 1600, kaj studadis, unue ĉe la jezuitoj kaj poste ĉe la Universitatoj de Alcalá kaj Salamanca. Li apartenas al tiu generacio de brilaj verkistoj de la tiel nomita “orjarcento de la hispana literaturo”.

Sufiĉe juna, li partoprenis samkiel Lope kaj aliaj grandaj tiuepokaj verkistoj en la famaj naciaj beletraj konkursoj pri la kanonizado de Sankta Isidro, Sankta Teresa kaj Sankta Ignacio, kio donis al li prestiĝon kaj lokis lin en la unua vico de la tiamaj hispanaj verkistoj.

Calderón havis tumulteman junecon, sed, malgraŭ tio, baldaŭ lia talento kiel verkisto altiris la atenton de la intelektaj rondoj, kaj en 1623 li verkis sian unuan komedion, “Amo, honoro kaj povo”, per kiu li komencis sukcesan etapon kiel teatro-verkisto, kiu daŭros ĝis lia vivofino.

Laŭlonge de sia vivo Calderón uzas du stilojn: la unua montras la teatron nacian realisman kaj tradician de Lope de Vega. La dua stilo malproksimiĝas de tiu realisma teatro kaj konstruas poeziajn komediojn kun elstarigo de lirikaj valoroj aŭ de aliaj kun ideologia enhavo kaj profundaj konceptoj religiaj aŭ filozofiaj, kiel “Vivo estas revo”.

El tiu interesa verko, ni prezentas mallongan pecon kies finon estas tre konata:

Vivo estas revo...

*Tio veras sed modero
Kontraŭ ambici' konvenas,
Ĉar se revo ĉe ni venas,
Ni ĝin ŝirmu de l' kolero;
Sen fier' ni faru provon
En ĉi mondo tre avara,
Kie sperto montras klara
Ke la viv' nur estas revo:
Ĉiu homo revas celon
Ĝis vekiĝo de l' deliro,
Kaj ĝi en la viv' reala
Rolas sian propran revon.*

*Revas reĝo esti reĝo
Kaj en tiu trompo vivas,
Regas li kun sent' jubila
Kaj en sia trompa rolo
Kredas aŭdi el popolo
Dankeprimon kaj aplaŭdon,
Tamen post vekiĝ' la laŭdon*

*Oni skribas sur la vento,
Ĉar en cindroj, ho fisorto!
Ĝin transformas fata morto.*

*Antaŭ tiu fideŝtino
Ŝajnas celo malprudenta
Voli povon, ne atenta
Al la vera homa fino;
Kia hom' en sia vivo
Pro aspir' al mon' kaj trono
Ne perceptas ĉe la fono
La mortrevon post vekigo.*

*Riĉa revas pri la riĉo
En la nokto kaj mateno,
Revas malriĉul' kun peno
Pri la propra mizervivo;
Revas kiu elriĉiĝas,
Revas kiu tro pretendas,
Revas kiu eĉ ofendas,*

*Kaj konklude ni difinas:
Ke la tuta mondo revas
Tion, kio ĉiu estas,
Kvankam por esprimi veron
Tion oni ne komprenas...*

Kio estas viv'? sopiro;
Kio estas viv'? fikcio,
Kvazaŭ ombro, iluzio,
Tute simpla homdeziro [...]

Malfeliĉe la traduko perdus la plej purajn esencojn de la originala teksto: certan fantazian kultismon plenan de lirikaj resonancoj kaj de la Calderon-a filozofio, kiujn mi konsideras tute netradukeblaj...

Liaj teatroverkoj nome “autos sacramentales” (dramoj pritraktantaj temojn el dogmo kaj eŭkaristio) atingis kvalitonivelon vere majstran ne facile supereblan.

En 1635 li verkis “La plej granda ĉarmo: la Amo”, tre sukcesan teatraĵon, kaj en 1637 li pasis je la servo de la duko Infantado kaj partoprenis en pluraj militkampanjoj kiel soldato. Sed li neniam forlasis la verkadon, kaj en 1651 li fariĝis pastro.

La teatro de Calderón devenas el tiu de Lope de Vega, kvankam li aldonas al ĝi gravajn modifojn, kiuj ne nur ŝanĝas ĝin teknike, sed perfektigas la formon, prezenton kaj profundecon. Se Lope reprezentis la kreaĵmomenton de la hispana teatroverkado kaj la genian spontanecon pri improvizo, Calderón signifas ja la sistemigon, la maturiĝon, la saĝan profundecon. Spirito rezonema kaj

logika, li konsideras ege grava doni filozofian signifon al siaj verkoj kaj potencigas la dramon per simpligo de la intrigoj forlasante ĉion akcesoran kaj akcentante la rolon de la protagonisto. Lia baroka lingvostilo montras la kulminon de la kultismo en la teatro per aŭdacaj metaforoj plenaj de certa konceptismo intelekta:

*El plej brila bel-dianto,
ĉarmo de plezurĝardeno,
eltiras vipur' venenon
kaj abel' miel-nutraĵon.*

Tiu inklino al troigo kaj kontrasto, pelas lin akcenti la psikologiajn trajtojn de la teatrorolantoj, kies violentaj pasioj ofte senhumanigas ilin. Calderón havas opinion tre favoran pri la uzo de la muziko en la teatro, sed ĝuste pro tiu lia koncepto baroka li enorme komplikas la teknikon pri la scenografio...

Calderón faras el la honoro (plej altan koncepton de la propra digno de la tiamaj hispanoj) ĉeftemon de multaj el liaj verkoj, kiel en “La urbestro de Zalamea”, kiam Don Pedro fiere respondas al la postuloj de la reĝo-representanto:

Doni ĉion al la reĝo,

*propran vivon kaj obeon,
estas postulebla devo,
sed neniam la honoron,
ĉar propraĵo de la animo
estas ĝi, nur je dispono
de la ĉiopova Dio,
mastro de ĉieltrezoroj.*

Dramojn mitologiajn, historiaj-legendajn, priĵaluzajn, religiajn, komediojn pri plej diversaj temoj, Calderón verkas senlace kaj li eĉ havas tempon verki belajn poemojn, kiel tiu ĉi:

La najtingalo

*Vi, najtingal' majeste nun fluganta,
iras prikanti amajn ĝentilaĵojn;
ho, kiom da dolor' kaj sent' malplaĉaj!*

*Sed ne! ĉar, se nun kantas vi amravojn,
vi, morgaŭ ploros pro ĵaluz' amara!
Ho, najtingalo ĉarma!
kiel vi dolĉe pepas,
kaj viajn amajn aventurojn kantas,
mergita ene de forges' forgesa,
kune kun vi la horoj ĝoje pasas,*

*ĉar vi vidiĝas vigla kaj kontenta;
sed, ĉar vi ĝentilaĵojn ja regalas,
ho, kiom da doloro mi korsentas!*

*Tamen, se nun pri am' vi kantas gaja,
Morgaŭ vi ploros pro ĵaluz' despera.*

Lia religia vivo estis preteksto pli ol sufiĉa, por ke li izoliĝu kaj verku, same teatroverkojn kiel belajn poemojn, plejofte kun la ĉarmo de tiu ĉi soneto:

Al la floroj...

*Ĉi tiuj, kiuj estis pomp' kaj belo,
kiam vekigis en l' aŭrora klaro,
vespere, kun domaĝo kaj amaro
dormiĝos nokte palaj en malhelo.*

*Tiu nuanc', defio al ĉielo,
aperis kun orstrioj kaj ruĝ-haro,
kaj taŭgos kiel sperto-akaparo:
ho! kiom grandas unu tag-rivelo!*

*Atingas rozoj ĉe florad' kulminon:
lulil' kaj ĉerk' en unu florburgono,
kun belo ili trovas tristan finon.*

*La propran vivon vidas mem persono:
naskiĝas, mortas, finas hom-destinon,
nur horoj post jarcentoj da voĉ-sono.*

Don Pedro Calderón, nomumita honora kapelpastro de la hispana reĝo, translokiĝis en 1663 al Madrido, kie li persiste verkadis. Antaŭ ol forpasi, li respondis leteron al duko Veragua, kiu interesiĝis pri la kvanto da verkoj de tiu ĉi aŭtoro, kaj li indikis: “110 komedioj, 80 dogmoverkoj kaj dramoj, zarzueloj ¹¹, komedietoj kaj multnombraj malpli gravaj verketoj kaj poemoj...

Pedro Calderón de la Barca, unu el la plej grandaj dramaturgoj en Hispanio, forpasis en Madrido en la jaro 1681.

¹¹ Zarzuelo: Drama hispana verko simila al la franca komika opero kaj al la germana “Singspiel”, en kiu alternas fragmentoj parolataj kaj aliaj kantataj.

Sor Juana Inés de la Cruz (1651-1695)

Poetino naskiĝinta en Meksikio en 1651, havanta delikatan sentivecon, subtilan penson kaj altan pripenseman spiriton. Ŝi sendube estis, la plej elstara figuro de la baroka liriko hispana-amerikana.

Ŝia poezio, inklina al racia pripensado, muzikema inspiro kaj eĉ scienca profundigo, reprezentas la estontan spiriton de la 18a jc., ja ŝi opiniis, ke la poezio, samkiel la muziko kaj scienco, konsistas el tuto ne disigebla de kultura koncepto pri arto-scienco.

Dum ŝia junaĝo ŝi montriĝis inklina strebi al plej altaj beletraj aspiroj kaj societa vivo ĉe altrangaj medioj, poste kaj ankoraŭ 18-jara fariĝis monaĥino kaj entreprenis la duran taskon atingi sian mem perfektigon sub asketa vidpunkto.

Unu el ŝiaj plej gravaj poemoj “Unue, sonĝo”, konsistanta el pli ol mil versoj, spegulis certan barokan stilon, ĝis tia punkto, ke la kritikistoj konsideras ĝin “imito de la verko Soleco de Gongoro”, tamen, temo kaj malvolvo de la poemo prezentas aspekton tute alia, ĉar oni povas percepti en ili kvazaŭ psikologian analizemon sufiĉe originala kaj kohera kun la karakterizoj de la poetino.

Jen unu el tiuj poemoj:

Kontenta fantazio pri honesta amo...

*Haltiĝu! ombr' de mia bon' evita,
figur' el sorĉ' kiun mi pli amas,
fikci' por kiu mortas mi, larmas,
kaj dolĉa iluzi' de mi vivita.*

*Se al magnet' de via ĉarm' ekscita
utilas mia kor' sentive flama,
kial vi enamigas min laŭdkalma
se poste vi min mokos forkurinta?*

*Sed fanfaroni certe vi ne povas
kiel venkant' de via tiranio
ĉar kvankam fimokanto mi ja trovas
ke malgraŭ mokoj, mia fantazio
superis sentojn kiujn vi primokas,
dum restas vi kaptita sen fikcio.*

Ŝi okupiĝis, iom diste, pri la homa amo-temo kaj dum epoko kiam la viro estis nediskutebla homa estaĵo de la socio, Sor Juana Inés publike atakis per siaj versoj tiun hegemonion, kiel oni konstatas en la poemo “Kiun maldanka al mi forlasas”... aŭ “Stultaj viroj”, al kiu apartenas jenaj versoj:

*Stultaj viroj, vi akuzas
la virinon tre malprave,
kiam kulpas vi, pli grave,
pro pek' kiu vin amuzas.*

*Se vi ŝin intigas pekon,
kial volas vi ŝin bona
se via intenc' demonas
celas pli divoĉo-vekon? ktp.*

Sor Juana Inés de la Cruz verkis teatroverkojn pritraktantaj temojn el dogmo kaj eŭkaristio (la tiel nomitaj en Hispanio “autos sacramentales”) laŭ la modelo el tiuj de Calderón, inter kiuj elstaras “El divino Narciso” (La Dia Narciso), “El cetro de José” (La scepro de Jozefo) kaj “EL mártir del Sacramento” (La martiro de l’ Sakramento), ankaŭ “La profanaj teatraĵoj”, “ Los empeños de una casa” (Streboj en mia domo) kaj “Amor es mas laberinto” (Amo estas plia labirinto). Ŝia kolekto de poemoj “Inundación castálida” (Kastalida inundo¹², eldonita en Madrido en 1689, enhavas, ĝenerale, krom la menciita baroka lirikismo, tiun spiriton pripenseman propra de tiu granda poetino. Ŝi forpasis en Meksiko en 1695

¹² Kastalia: Knabino el la greka urbo Delfos, kiu, por eskapi el la persekuto de Apolono sin jetis en fontanon tute proksima al la oraklodona Sanktejo de Delfos. La akvo de tiu fontano taŭgis por purigi la templon, kaj la grekoj atribuis al ĝi la kapablon inspiri la poetojn.

Gustavo Adolfo Bécquer (1836-1871)

Gustavo Adolfo Bécquer, filo de pentristo naskiĝis en Seviljo, kie li komenciĝis studi beletron kaj pentrarton, sed apenaŭ 18-jara li translokiĝis al Madrido celante fariĝi beletristo, laŭ estis lia vera inklino.

En la hispana ĉefurbo li penis perlabori sian panon verkante kronikojn en duavicaj ĵurnaloj, vivis malfeliĉajn horojn ĉar grave malsanis sed fine li okupis oficistan ŝtatan postenon, kiu donis al li ekonomian stabilon kaj ebligis lin sin dediĉi al beletra verkado, konsistanta same pri prozo kiel pri versoj.

Altoaguirre opiniis, ke Bécquer “prezentas la poezion plej humanan, plej nudan kaj intiman de la hispana romantikismo”. Temas pri voĉo el spirito aŭtente romantika, kies tono konfidenca kaj intima montriĝas simpla kaj natura, kaj tio sendube estas novaĵo rilate al tiu kutime uzita de romantikuloj superŝarĝita de metaforoj kaj topikoj.

Plej alta esprimo pri tiu aserto estas liaj "Rimoj", vera trezoro kun misteraj muzikaj resonoj, kies versoj sin lulas en niaj oreloj antaŭ ol eniri en la plej profundon de nia animo. Jen unu el ili kun la indikitaj karakterizoj:

VII

*En angulo de l' obskur-salono,
eble neglektatan de l' dom-mastro,
tutsilenta kun tavolo da polvo,
oni vidis harpon.*

*Tiel dormis sur la kordoj notoj,
kiel multaj birdoj sur la branĉoj,
atendante ilin ekeltiros
neĝo-blanka mano.*

*Ho! - mi pensis - multfoje genio
tiel dormas en l' animfundaĵo
atendanta same kiel Lazaro
vokordonon: « Levu vin kaj marŝu!*

En certa okazo, Bécquer eniris en eleganta salono, kie la ĉik-societo sin amuzis en tiu mondo banala, sed ankaŭ en tiu medio ekzistis scivoluloj kiuj deziris iom pli scii: belulino demandis al la poeto pri arto, amo, poezio. Li respondis al unu el tiuj demandoj en unu el siaj rimoj:

XXI

Vi demandas: - kio estas poezi'?
dum min rigardas via blupupil',

*ĉu difin' pri poezi' vi min demandas?
Poezi' estas vi!*

Romantike vibras la versoj de ĉi tiu alia rimo:

XXIII

*Por rigardo tutan mondon,
la ĉielon por rideto,
kaj por ama kiso via...
kion donus mi por kiso!*

Denove Bécquer revas en tiu ĉi rimo, kaj belege tradukas en versoj tiun ekstermondan penson:

XXXVIII

*La sopir' aero estas, tien iras;
larmoj estas akvo, iras al la maro;
Knabin', kiam ne plu amas niaj koroj,
kien iras Amo?*

La prozo de Bécquer aperas en liaj famaj “Legendoj”: 25 belaj rakontoj ĝisfunde romantikaj, ne nur pri temoj sed ankaŭ pri ideoj, sentoj kaj lingvo-esprimoj. Liaj versoj plej gravaj estas tiuj aperintaj sub la titolo “Rimoj”, plej alta eskvizita ekzemplo el nia moderna liriko.

Krom la legendoj kun hispana temo entrunkita en antikvaj rakontoj vilaĝaj pri mortintoj kaj amoj malfeliĉaj, li ankaŭ verkis orientan legendon, “La militestro de la ruĝaj manoj”, fakte kvazaŭ poemon en prozo. La vortoj kiujn li uzas en ĝi estas belsonaj, lirikaj, pasiaj, transportante la leganton en mondon emocian, allogan kaj revigan...

Ili estas, kvazaŭ sonoj de dia liro de antikva rapsodo, kiu taŭgas kiel muzika fono al la agado de la protagonistoj, tiamaniere, ke ĉiu vorto havas specialan kaj propran sonon, kun eĥoj de miljaroj, venantaj de tiu malproksima lando nomata Beleco. Kaj tiel la ĉapitroj fariĝas kantoj, kaj la kantoj parolas pri amoj kaj suferoj, gloroj kaj perfidoj, krimoj kaj punoj, ĉio kio konsistigas la kompleksan mondon de la homa sento.

Mi prezentas tiun verketon, apenaŭ konata, kaj tamen tiel bela:

La militestro de la ruĝaj manoj

(Hinda tradicio)

UNUA KANTO

/

Malaperis la suno post la pintoj de monto Jabwi, kaj la ombro de tiu monto envolas en krepvualo la perlon de la urboj de Oriso¹³, la ĝentilan Kattak, kiu dormas ĉe ĝiaj piedoj, inter arbaroj de cinamo kaj sikomoroj, simile al kolombo kiu ripozas sur flornesto.

II

La tago kiu mortas kaj la nokto naskiĝanta luktas momenton, dume, la dubeblua krepusknebulo etendas siajn diafanajn flugilojn super la valojn, ŝtelante en koloron kaj formojn al la objektoj, kiuj ŝajnas heziti agitate de blovo de ia spirito.

III

La neklaraj urbaj bruetoj kiuj vaporiĝas tremante; la melankoliaj noktaj suspiroj, kiuj plilongiĝas de eĥo al eĥo ripetate de la birdoj, la misteraj milbruoj kiujn kiel himno al la Dieco levas la kreaĵo je naskiĝo kaj morto de la astro kiu ĝin vivigas, kuniĝas al lirilo de Jawkior, kies ondojn kisas la vespera venteto aŭdigante dolĉan kanton, svagan kaj perdiĝantan kiel la lastaj notoj de improvizata bajadero.

¹³ Oriso, devenanta el Orissa aŭ Orissa, regiono aŭ ŝtato de la orienta strando de Hindujo. Ĝi akiris famon ĉar estis scenejo en 1857-1858 de la ribelo de cipajoj kontraŭ la koloniaj trupoj de la angla krono. La ribelo daŭris naŭ monatoj ĝis kiam sir Colin Campbell atingis en 1858 venki la ribelulojn.

IV

La nokto venkas; la ĉielo kronas sin je steloj, kaj la turoj de Kattak por rivali kontraŭ ĝi kronas sin per diademo el torĉoj. Kiu estas tiu militestro aperanta ĉe la piedo de ĝiaj muroj, samtempe kiam la luno leviĝas inter leĝeraj nuboj trans la montoj, ĉe kies bazo kuras Ganges kvazaŭ grandega blua serpento kun arĝentaj skvamoj?

V

Li estas. Kiu alia militisto el la flugantaj kiel sago al la batalo kaj al la morto, post la standardo de Schiwen, glormeteoro, povas ornami siajn harojn per la ruĝa birdovosto de la hindaj dioj, pendigi je sia kolo la oran testudon, aŭ pendigi sian ponardon de agata tenilo je la flava Kaŝemiro-ŝalo, ol Pulo-Dheli, rajao de Dekka, batalfulmo kaj frato de Tippot-Delhi, reĝa moŝto de Oriso, sinjoro de sinjoroj, ombro de Dio, kaj filo de la lunaj astroj?

VI

Li estas. Neniu alia scias doni al siaj okuloj ĉu la melankolian brilon de la ektagiĝa stelo, ĉu la minacan brilon de tigro-pupilo, komunikante al siaj lumaj trajtoj la brilegon de serena nokto aŭ la teruran aspekton de ŝtormo ĉe la aeraj pintoj de Dawalagiri. Li estas; sed kion li atendas?

VII

Ĉu vi aŭdas la foliojn suspiri sub la malpeza plando de virgulino? Ĉu vi vidas flirti inter ombroj la ekstremojn de ŝia diafana ŝalo kaj la orlojn de ŝia blanka tuniko? Ĉu vi sentas la bonodoron kiu antaŭas ŝin kiel heroldon de feo? Atendu, kaj vi rigardados ŝin sub la unua radio de la soleca vojaĝantino de la nokto; atendu kaj vi ekkonos Siannah, la fianĉinon de l' multpova Tippet-Dheli, la amatinon de lia frato, la virgulinon kiun ŝiaj landaj poetoj komparas al rideto de Bermach, kiu prilumis la mondon kiam tiu ĉi eliris el liaj manoj: ĉielo-rideto, unua aŭroro universa.

VIII

Pullo-Dheli ekaŭdas la brueton de ŝiaj paŝoj. Lia vizaĝo brilegas kiel montopinto kiu tuŝite de la unua sunradio renkontiras al ĝi. Lia koro, kiu ne batis en la batalfajro nek antaŭ tigro, batas nun fortege sub la mano kiu venas al ĝi, timante ke elbordiĝos la feliĉo kiun li ne plu kapablas enhavi. —Pullo! —Siannah!, ili ekkrias vidante sin reciproke kaj unu falas sur brakojn de la alia.

Dume Jawkior, surŝprucigante per siaj ondoj la zefirajn flugilojn, forfluas por morti al Ganges, kaj Ganges al Bengala golfo, kaj la golfo al Oceano. Ĉio forfluas: kun la akvoj, la horoj; kun la horoj, la feliĉo; kun la feliĉo, la vivo.

Ĉio forkuras al fandiĝo en la kapo de Chiwen, kies cerbo estas la ĥaoso, kies okuloj estas la detruo, kaj kies esenco estas la nenio.

IX

Jam la ektagiĝa stelo anoncas la tagon. La luno malleviĝas kiel iluzio disiĝanta, kaj la sonĝoj, filoj de la mallumo, fuĝas kun ĝi en fantastaj grupoj. Ambaŭ geamantoj ankoraŭ restas sub la verda ventumilo de palmo, muta atestanto pri ilia amo kaj iliaj ĵuroj, kiam leviĝas obtuza bruo malantaŭ ili. Pullo-Dheli turnas la vizaĝon, elspiras akran kaj facilan krion kiel tiu de ŝakalo, kaj retroiras dek futojn per unu sola salto, briligante samtempe la klingon de sia akra ponardo damaska.

X

Kio metis timegon en la animon de la kuraĝa militestro? Ĉu eble tiuj du okuloj brilantaj en la mallumo estas tiuj de l'makulita tigro, aŭ tiuj de terura serpento? Ne. Pullo-Dheli ne timas la ĝangalo-reĝon nek tiun de reptilioj: tiuj pupiloj elĵetantaj flamojn apartenas al homo, kaj tiu homo estas lia frato. Lia frato, al kiu li forrabis lian unikan amon; lia frato, pro kiu li estis ekzilita el Oriso; tiu, kiu fine ĵuris lian mortigon se li revenus al Kattak, kaj metus la manon sur la altaron de lia Dio.

XI

Siannah vidas lin ankaŭ; la sango koaguliĝas en ŝiaj vejnoj kaj ŝi restas senmove, kvazaŭ la mano de l' morto estus preninta ŝin per la hararo. Ambaŭ rivaloj sin rigardas unu la alian dum momento, de piedoj ĝis kapo; ili luktas per rigardoj kaj eligante raŭkan kaj sovaĝan krion, sin ĵetas unu kontraŭ la alian kiel du leopardoj kiuj kverelas por kaptaĵo...Ni etendu vualon super la krimoj de niaj antaŭuloj: ni etendu vualon super la funebraj kaj hororaj scenoj kies kaŭzo estis la pasioj de tiuj, kiuj jam estas en la sino de la Granda Spirito.

XII

La suno naskiĝas en Oriento; oni dirus vidante ĝin ke tiu lumgenio, venkinto de la ombroj, ebrie pro fiero kaj majesto, sin ĵetas triumfe sur sian ĉaron el diamantoj, lasante post si, kiel ŝipan spuron, la oran polvon kiun levas ĝiaj ĉevaloj sur la ĉiela pavimo. La akvoj, la arbaroj, la birdoj, la spaco, la mondoj havas unu solan voĉon, kaj tiu voĉo kantas la tagan himnon. Kiu ne sentas sian koron saltadi pro ĝojego laŭ la eĥoj de tiu solena kantiko?

XIII

Nur unu morteculo; vidu lin tie. Liaj elkaviĝintaj okuloj estas fiksitaj kaj stulte rigardas la sangon kiu makulas

liajn manojn. Vane, elirante el sia senmoveco kaj ĝenate timinda ekzaltiĝo, li kuras al la riverbordoj de Jawkior por lavi ilin: sub la kristalecaj ondoj, la makuloj malaperas, sed apenaŭ li fortiras la manojn, la fumanta kaj ruĝa sango retinkturas ilin. Kaj ree li iras al la ondoj, kaj ree aperas la makulo, ĝis fine per sono terure malespera: Siannah! Siannah! La ĉiela malbeno falis sur niajn kapojn! Ĉu vi konas tiun malfeliĉulon, ĉe kies piedoj estas kadavro, kaj kies genuojn ĉirkaŭbrakas virino? Li estas Pullo-Dheli, reĝo de Oriso, sinjora moŝto de sinjoroj, ombro de Dio, kaj filo de la lumaj astroj, pro morto de sia frato kaj antaŭulo.

DUA KANTO

I

Por kio taŭgas riĉeco kaj povo se vipuro sin plektanta ĉe la fundo de mia koro manĝegas ĝin, sen ia ebleco fortiri ĝin de tiu kaŝejo?

Mi estas reĝo, sinjoro de sinjoroj: vidi preterpasi antaŭ miaj okuloj, kiel revo-vizio; perlojn, oron, plezurojn kaj ĝojon; vidi ilin je la atingo de mia mano, kaj etendante ĝin por preni ilin konstati kion ĝi tuŝas, makulita de sango! Ho! tio estas ja terurega!!

II

Tiel ekkriis Pulo sin turnante sur la purpuro de lia lito kaj tordante siajn manojn sub impulsoj de terura malespero. Vane, la fumo de la parfumujoj plenigis la riĉegan ĉambron de delikataj bonodoroj. Vane, la brilkolora silko etendiĝis sur deko da tigro-feloj por ke liaj lacaj membroj ripozu! Vane, la bramanoj¹⁴ alvokis sepfoje la spiriton de la ripozo kaj al la genio de la perlamota dormo! Pentoĉagreno sidita apud lia lito forigas ilin per akra longa krio, krio kiu resonas senhalte ĉe la aŭdo de Pulo, kiu sin frapas la frunton dolore aŭskultante ĝin.

III

La genioj, kiuj trapasas en multenombraj karavanoj sur safiraj dromedaroj kaj inter opalaj nuboj. La ŝivoj verdokulaj kiel la marondoj, ebonharaj kaj sveltaj talioj kiel lagojunkoj; la kantoj de nevideblaj spiritoj kiuj refreŝiĝas per siaj flugiloj la lacajn palpebrojn de la justuloj, ne trapasas kiel trombo de lumo kaj koloro la sonĝon de tiu krimulo.

Gigantaj akvofaloj de nigra kaj ŝaŭmanta sango, kiu frakasiĝas muĝegante kontraŭ la obskuraj rokoj de terura abismo terorigaj kaj konfuzaj bildoj pri malfeliĉo kaj

¹⁴ Bramanoj: Individuoj apartenantaj al unu el la kvar kastoj en kiu dividiĝas la hinda socio: la bramanoj sin dediĉas kiel pastroj al la meditado kaj studado de la sanktaj libroj. Pro ilia naskiĝo estas konsiderataj kiel sanktaj personoj kaj la solaj kiuj povas sin okupi apliki la Vedon, komenti ĝian doktrinon kaj instrui pri tradicioj.

teroro. Tiaj estas la fantomoj kiujn naskigas lia menso dum la ripozhoroj.

IV

Pro tio la moŝta sinjoro de Oriso ne povas gustumi en pokalo la histiamon kiun la dioj prezentas al la elektitoj; pro tio apenaŭ la aŭroro malfermas la pordojn al la tago, li rapide ellitiĝas, senvestiĝas de liaj reĝaj vestoj kiujn briligas perloj kaj oro, kaj kisante surfrunte la amatinon, eliras el palaco vestita kiel simpla ĉasisto, por sin direkti al la supra parto el la urbo kiun regas la montopinto Jabwio...

V

Meze de tiu montaro, naskiĝas rivereto, kiu falas kiel arĝenta litotuko ĝis atingi la ebenaĵon, kie bremsita de ties impulso ŝteliras silente inter latiroj kaj floroj por iri al la kunfandiĝo de ties ondoj kun tiuj el Jawkior. Natura groto formita de grandaj rokoj, kiuj aspektas proksimaj al renversiĝo, taŭgas kiel taso de tiuj ondoj ĉe ĝia naskiĝloko. Tie, travideblaj kaj malhelaj ties akvoj, ŝajnas ke ili dormas sen alia interrompo ol la monotona bruo de la rivereto, kiun ili nutras, la sopiro de venteto kiu venas humidigi ties flugiloj sur la linfo, aŭ la sovaĝa krio de la kondoroj, kiuj sin ĵetas inter la nuboj kvazaŭ pafita sago.

VI

Pulo, jam ekster la muroj de la urbo, ordonas returni al tiuj kiuj selvas lin, kaj tutsola ekiras, en profunda medito, tra tiu vojo kiu serpentumas inter rokoj kaj profundaĵoj, al la groto kie naskiĝas la torento jam disgutante lian vizaĝon kun la polvo de ties akvoj.

Kien iras la sinjoro de Oriso? Kial senvestita de lia brokita tuniko, de la flava ŝalo, mistera emblemo, kaj de la reĝaj amuletoj, ŝanĝas sian veston per tiu alia vulgara de simpla ĉasisto?, ĉu li venas al la montaro por serĉi sovaĝajn bestojn ĉe ilia kaŝejo?, ĉu li venas serĉi avide la solecon, nura balzamo por liaj malĝojoj, kiujn la aliaj homoj tute ne komprenas?

VII

Ne!, kiam la reĝa loĝanto de Kattak forlasas lian palacon por persekuti la fieran leonon aŭ la strekitan tigron ĉe ties teritorio, cent eburaj trompetoj resendas la eĥon el la arbaroj, cent rapidaj sklavoĵoj anticipiĝas al li, purigante la vepron de ĉiuj padoj kaj tapiŝante la lokon kie li metos liajn plandojn, ok elefantoj kondukas lian tendon de oro kaj lino, kaj dudeko da raĵaoj sekvas lin disputante inter si la honoron kunporti lian opalan sagujon.

Ĉu li venas serĉante la solecon? Neeble!, soleco estas imperio de la konscienco.

VIII

La suno venas je la duono de ĝia vojaĝo, kaj Pulo je la fino de la sia, ĉe liaj piedoj saltas la torenton. Super la kapo estas la groto kie dormas la fonto kiu ĝin nutras, sankta fonto kiu ŝprucas el fendo de roko por mildigi la sojfon de Viĉnuo, kiam ekzilita de la ĉielo venis por ĉasadi ĉirkaŭ monto Jakwio dum nokto. Ekde tiu pratempo, bramano deĵoras konstante ĉe la fundo de la groto, preĝante al dio por konservi la mirindajn virtojn kiuj, laŭ venerinda tradicio, abundas en tiuj linjoj.

IX

La lasta el tiuj pastroj, kiuj brulante pro amo al la dieco oferis siaj tagoj por veneri ĝin en la kontemplado, estas maljunulo kies origino envolvas profundan misteron. Neniu scias la epoko kiam li alvenis al Kattak por ŝirmi sin en la groto de Viĉnuo. Venerindaj rajaoj, ĉe kies kapoj brilis pli ol kvardek mil sunoj, certigas ke dum ilia juneco tiu bramano de la torento jam estis blankhara kaj kliniĝinta frunto.

La popolo rigardas lin timeme kaj respektema kiam hazarde li venas en la ebenaĵon. Oni diras ke serpentoj dancas sub lia ordono, ke kondoroj alportas al li la nutraĵon, kaj la genio de tiuj akvoj, kiujn li ŝuldas la senmortecon, malkaŝas al li la sekretan estonton. Aliaj

certigas, ke li mem ne estas alio ol la spirito sub formo de bramano.

X

Kiu estas? El kie li venis kaj kion li faras? Oni ignoras ĉion, sed tiuj kiuj sin sentas kun la sufiĉa kuraĝo por alveni ĝis la groto kie li loĝas, iras tien por demandi al li rimedon kontraŭ senesperaj malbonoj, profetaĵon por ekkoni danĝerajn situaciojn, pentofaron sufiĉe por lavi krimon kiun eĉ la sango ne forigus.

Unu el tiuj estas Pulo, ĉar al la torenta groto li sin direktas, ĉar konstatante ke la negravaj kulpopagoj kiujn la flatemaj bramanoj de Kattak postulis de li, rezultis nesufiĉaj por forigi lian pentoĉagrenon, tial li supreniras tien por konsulti la solulon de Jabwio, tutsola kaj inkognite, por ke la reĝa pompo ne malserenigu la spiriton kaj sigelu la lipojn de la profeto.

XI

Pulo alvenas tra veproĵ kaj rubusujojn kiuj ĉirkaŭas kvazaŭ festono la bordojn de la torento ĝis la enirejo de la groto. Tie li vidas larĝan vazon el kupro pendanta de la branĉoj de palmarbo, por ke la vojaĝanto satu sian sojfon. La militestro tuŝas trifoje per la ingo de lia jatagano kaj la kupro klakas sonore laŭ mistera metala

sono, kiu perdiĝas vibranta kun la rumoro de la ondoj. Momento forpasas kaj la solulo aperas:

-Elektita de la granda Spirito- ekdiris vidante lin la militestro klinante la frunton.

-Ke la kolero de Sĉivo ne kuŝu sur via kapo, kiel brumo ĉe la supro de montopintoj.

-Filo de mortonto, respondis la maljunulo sen korespondi lian saluton, kion vi volas?

XII

-Konsulti vin.

-Parolu.

-Mi faris krimon. Teruran krimon, kies rememoro dolorigas mian animon kiel eterna nigra sonĝo. Vane mi konsultis la divenantoj de Bramo¹⁵. La pentofaroj kiujn ili altrudis min estis vanaj. Mia sento pri tiu kulpo vivas ankoraŭ en mia koro. La fantomo de la viktimo sekvas min ĉie, fariĝis kiel la ombro de mia korpo, la rumoroj de miaj paŝoj. Vi, kiun dioj sin dignas viziti; vi, kiu legas la estonton en la astroj kaj en la sabloj kiujn trenas la riveroj, diru al mi: -kiam restos lavita mia animo de mia krimo?

¹⁵ Laŭ la Bramanismo ekzistas tri grandaj dioj: Bramo, Viĉnuo kaj Sĉivo, kiuj formas la grandan dian Triopon. Bramo reprezentas la kreo-komencon; Viĉnuo la konservanton de la kreaĵo; kaj Sĉivo la detruon. Bramo estas l'absoluto, la universala animo, sed la bramanoj aldonis al tiu povo aliaj personaj trajtoj, transformante lin kiel la kreado de la Universo, ĉiopova kaj konscia potenco. La sola adoro kiun li ricevas estas pure beletra, esprimita sub formo de epitetoj, laŭdoj, ktp.

Malgraŭ lia alta dia kategorio, ne ekzistas en Hindujo temploj dediĉitaj al lia kulto, kaj estas tre malmultaj la hindaj religiuoj kiuj konsideras lin kiel suprema dio.

-Kiam la sango kiu makulas viajn manojn, kiujn vane vi min kaŝas, estu malaperinta, -respondas la terura bramano rigardante kolere la princon, kiu restas terorigita antaŭ tiu elmonro de saĝo de la solulo.

XIII

-Ĉu vi konas min? Ekdiras fine Pulo post momento de stuporo.

-Mi ne konas vin, sed mi scias kiu vi estas.

-Kiu mi estas?

-La murdisto de Tippot-Dheli.

La princo klinas la kapon antaŭ tiaj vortoj kvazaŭ mortvundita, kaj la bramano daŭrigas laŭ tiel:

-Dum la pasinta nokto, kiam la dormo estis alveninta ĉe la mortontaj palpebroj, mi sendorme pensis. Surda rumoro supreniris en kreskanta tono el fundo de la sankta akvo, konfuza rumoro kiel zumego de cent legioj da abeloj.

Trombo de malvarma kaj silenta aero venis el oriento, frizis la ondojn kaj tuŝis per la pinto de siaj malsekajflugiloj mian frunton. Je mia kontakto, miaj nervoj saltis kaj malvarmigis la medolon de miaj ostoj.

Tiu ventoblovo estis elspiro de Viĉnuo. Iom pli poste, mi sentis mian dekstran manon tiel peza, kvazaŭ la tuta mondo ripozus sur mia ŝultro, dum li rakontis al mi konfidence, en mia orelo, vian historion.

XIV

-Nu, ĉar vi jam konas mian krimon, diru al mi kiel pagi mian kJulpon kaj tiel malaperigi de miaj manoj tiujn terurajn makulojn.

La bramano silentas kaj la princo daŭrigas:

-Kio! ĉu mia tuta sango ne povas forviŝi tiun makulon?

-Mi ignoras tion, estas ja tred mallonga via vivo por pagi kulpon, kaj Sĉivo estas tre kolera kontraŭ vi, ĉar vi uzis de liaj povoj por detruo, kaj pri tio nur li kompetentas.

-Bone do, se vi ignoras tion mi konsultu Viĉnuon, certe li protektos min kontraŭ Lia frato.

-Ni eniru en la sanktan groton, ĉu vi fastis dum tri lunoj?

-Jes!

-Ĉu vi forlasis la geedzan liton dum sep noktoj?

-Jes!

-Ĉu vi ne ĉasis dum naŭ tagoj?

-Jes! ankaŭ jes.

-Tiukaze sekvu min.

lom post tiu mallonga dialogo, ambaŭ interparolantoj eniris en la fundon de la mistera groto.

XV

Kio okazis en la interno de tiu loko oni tute ne scias. La tradicio konservas konfuzan ideon pri ĝi, kaj la princo,

per kiu oni scias tion, parolis ne klare pri monstraj kaj flugilhavaj serpentoj kiuj sin ĵetis en la ondojn de la torento, por denove reaperi sub la formo de fantaziaj kaj nekonataj bestoj; pri sorĉoj tiel timindaj, ke ofte oni kovris la sunon kun grandaj makuloj, kaj la montoj tremis kiel kanoj kun veoj kaj ululoj tiel teruraj, ke la sango glaciigis aŭskultante ĝin.

XVI

La paroloj el dio kiujn oni gardas estas jenaj:

-Murdisto markita kun la sigelo de la eterna malhonoro, nur ekzistas pentofaro per kiu vi povas pagi vian krimon: supreniru apud la bordoj de rivero Gango trapasante sovaĝajn popolojn kiuj loĝas tie ĝis atingi ĝiajn fontojn.

La malproksima lando Tibeto kiun defendas per giganta muro la montaro Himalajo estas la fino de via vojaĝo. Kiam vi alvenos tie, lavu viajn manojn en la plej kaŝa el ties riveretoj je sama horo kiam la kuraĝa Tippet Dheli falis mortinta ĉe viaj plandoj. Se dum la traŭmo de via pilgrimado vi ne konos vian edzinon Siannah, kiu devos akompani vin, certe la sango malaperos de viaj manoj.

XVII

Kiu estas tiu pilgrimanto, kiu sin apogas sur rustika bastono el betulo, kun la sola akompano de bela virino tre modeste vestita, kiu eliras tra unu el la pordoj de Kattak

samtempe kiam la luno malaperas sub la radioj de la tago-astro?

Li, li estas, Pulo-Dheli, moŝta sinjoro de Oriso (), sinjoro de sinjoroj, ombro el Dio kaj filo el la helaj astroj.*

TRIA KANTO

I

La gepilgrimantoj jam alvenas je la fino de ilia vojaĝo: jam forlasis ĉe iliaj dorsoj la fruktodonajn kaj grandegajn ebenaĵojn de Nepaul. Jam ili vidis Benareson, fama pro ĝiaj alkazaroj, kies fundamentoj kisas la sanktan riveron kiu dividas Hinduojn de la imperio de la Birmanoj. Kiel kreaĵo el ĉiela vizio pasis antaŭ iliaj okuloj Palma, fama pro ĝiaj temploj, ĝiaj virinoj kaj tapiŝoj.

Dakka, la urbo kiu teksis vualon por la sanktejo de la dioj per ebonplektaĵoj de ties virgulinoj; Goalior, ŝildo de la regno el Sindiak, kies muroj haltigas la nubojn en sia flugado.

II

Ankaŭ li gustumis la ripozon ĉe la ombroj de la grandegaj platanoj de Delhi, konko kiu gardas la perlon de la reĝoj,

prezentante omaĝoferon el mielo kaj floroj al la protekgenio Allad-Abad¹⁶ urbo kiu ŝuldas sia nomo al la karavanoj de pilgrimantoj, kiuj el ĉiuj lokoj el Hindujo alvenas al ĝiaj preĝejoj, pli multenombraj ol la folioj de la arbaroj kaj la sablo de la Oceano.

III

Kvardek lunoj naskiĝis post la forlaso de ilia palaco, sed kiu povus nombri la landojn kiujn ili trapasis, la arbarojn ĉe kies ombroj ili ripozis, aŭ la riveroj ilian sojfon? Riveroj kiel El Kiangar, sufiĉe konata kiel tiu de la ruĝaj akvoj, aŭ Espuri kies trankvilaj akvoj trenas sufiĉe da oro por konstrui per ĝi splendiferan palacon; la arbaroj Senwads, malhelaj arbaroj kie la serpento boao ŝteliras kun la rumoro el pluvo; Lahoro, la patrino de la militistoj; Kaŝemiro la virgulino de la sep bestoŝaloj kaj centoj kaj centoj da aliaj landoj, urboj, arbaroj, torentoj, riveroj kaj montaroj kiuj ĝis atingi la Himalaja montaro etendiĝas sur la grandaj ebenaĵoj de Hindujo.

IV

Sed jam ili alvenas je la dezirata fino de tiel longa vojaĝo. Jam ili preterpasis la plej terurajn el la pruvoj trapasante

¹⁶ Urbo kiun situas en la konfluejoj de riveroj Gango kaj Yumma, kies origino tre antikva datas el la regado de Akkar (1542-1605) kiu rekonstruis ĝin.

Por indiĝenoj estas la plej sankta el la urboj, kaj al ĝi iras ĉiujare en decembro kaj januaro la religiemaj hindoj por purigi sin.

samtempe la riveron Gango kaj la valon Alcaro, tiel nomata ne nur pro la arboj kiuj tie kreskas, el kiuj oni eltiras tiun amaran likvoron, sed precipe pro la malĝojoj kiuj devas suferi la malfeliĉuloj kiuj devas ĝin trapasi. Kaj Pulo devis surpasi la rokojn kiuj ĝin hirtigas kunportante sur lia dorso sian edzinon Siannah.

V

La suno ĵetas siajn perpendiklajn radiojn sur la tero. La vojaĝantoj, lacaj pro tiu longa labortago, ripozas apud la rivero, ĉe kies fontoj jam ili alproksimiĝas. Vastkorpa kaj splendida baobado pruntedonas al ili ĝian ombron, kapabla ombrigi kompletan militistan tribon, inter la brumo de malproksima horizonto, Himalajo sin ĵetas al la malpleno, kaj elstara ĉe ĝiaj suproj, la Dawalagiri-monto promenas sian fieran rigardon tra duonmondo.

VI

Freŝa aŭro, lulas magnoliojn kaj tulipojn kiuj kreskas inter riverbordaj junkoj, kaj sekigas la ŝviton sur iliaj fruntoj. Bulbulo¹⁷, sur la branĉoj de hinda arbo talipot¹⁸ ekkantas

¹⁷ Bulbulo: vorto arabdevena in dikanta certan birdon de la familio piknotidoj. Kelkaj orientalistoj opinias ke temas pri persa vorto signifian ta najtingalo.

¹⁸ Talipot: arbo kun grandaj folioj ofte serĉata de la hin daj indiĝenoj kiel sunombrelo.

melankolie kaj mildege, kaj inter la lumradioj kiuj rebriligas la sablojn, trapasas diafanaj kiel ambro miriadoj da birdoj kaj insektoj vestitaj en oro kaj bluo, krepo kaj smeraldoj.

VII

Ĉio invitas al ripozo. Pulo kaj Siannah, post refreŝigi siajn lipojn per kelkaj bongustaj fruktoj de la arbaro, satas ilian sojfon en la kristalklaraj akvoj, kiuj kuras bruigante je la ekkiso kontraŭ la riverbordo melankolian kaj mildan sonon, simile kiel turta kareso.

Je tiu agraba sono el la akvoj kaj el la arbofolioj, kiuj sin agitas kvazaŭ smeraldaj ventumiloj super iliaj kapoj, ili rememoras en dolĉa kolokvo, kaj kun tiu kvazaŭ plaĉo kiun oni mencias la danĝeran pasinton, la milon da aventuroj kiujn ili travivis heroe dum ilia pilgrimado, la landojn kiujn ili trapasis, la mirindaĵojn kiujn kiel splendida panoramo prezentiĝis antaŭ iliaj okuloj.

Ili imagis projektojn por la estonto, kaj la feliĉon kiun al ili atendas post plenumi la pentofaron jam proksima al sia fino. Iliaj vortoj sin puŝas plenaj de fajro kaj vivegaj koloroj. Poste, iom post iom, langvoras ilia dialogo: oni

dirus ke ili pensas ion kaj parolas alion; laste, kelkaj konfuzaj kaj ne koheraj frazoj anstataŭas la silenton, kiu per fingro sur la lipo sidiĝas kune al la geamantoj senaverte.

VIII

La suno falas plumbe sur la grandan ebenon. La frunto de la princo ripozas sur genuoj de lia edzino. Ĉio ĉirkaŭ si silentas aŭ dormas. En la tropikaj landoj la tagmezo estas nokotomezo de la naturo. Nur interrompas tiun profundan trankvilon la akra kaj mallonga birdopepo de bengalioj¹⁹, la monotona zumado de la insektoj kiuj turnas en la aero brilantaj sub la sunlumo kiel el gemoj, kaj la akcelata spiro el Siannah, sonora kaj vivega spiro, kiel tiu kiu dormas ebria sub la efekto de opio. La gepilgrimantoj silentas... Kiaj ideoj vibras ĉe iliaj mensoj?

IX

Ekzistas momentoj kiam la animo elbordiĝas kiel vazo de mirgo kiu ne plu kapablas enhavi la tutan parfumon, momentoj kiam ŝvebas la objektoj, kies brilo vundas niajn okulojn, kaj kun tiuj ankaŭ ŝvebas nia imago. La spirito senligiĝas el la mateno kaj forflugas tra la spaco por sin

¹⁹ Bengalio: malgranda birdo loĝanta en intertropikaj regionoj de la Azia kontinento. Ĝi havas konusan bekon kaj ĝiaj flugiloj akrepintaj, maldikaj la kruroj kaj sin ornamas de vicaj koloroj.

kaŝi post la lum-ondoj, inter kiuj la malproksimaj horizontoj ŝancelas.

La menso ne sin trovas surtere nek surciele, trakuras senliman kaj senfundan spacon, oceano el nedifinebla volupto, kie siaj flugiloj ensorbas la sufiĉan energion por superflugi ĝis la regionoj kie loĝas nur amo.

La ideoj vagas konfuzaj kiel tiuj konceptoj senformaj kaj senkoloraj kiuj ŝvebas en la cerbo de poeto, kvazaŭ ombroj, idoj el deliro, kiuj vokas nin kaj preteras, proponas al ni amon kaj malaperas inter niaj brakoj.

bengalio: malgranda birdo loĝanta en intertropikaj regionoj de la Azia kontinento. Ĝi havas konusan bekon kaj ĝiaj flugiloj akrepintaj, maldikaj la kruroj kaj sin ornamas de vicaj koloroj.

X

Pulo estas la unua kiu rompas la silenton.

-Kiel dolĉa estas, li diras, percepti la elspiron de la virino kiun oni amas, tiu elspiro kiu skapas inter brulantaj lipoj, puŝante ilin kiel ondoj el ambrosio, kiu venas morti sur plaĝo de rubenoj!

-Se por mi estus ebla, ho mia bela Siannah!, klarigi tion kio la murmuro el cia elspiro diras min! Ĝi sonas en mia orelo kvazaŭ stranga flustro murmuranta nekonatajn

vortojn en ĉiela kaj mistera lingvo; rememoras al mi miajn infantagoj, tiujn sennomajn horojn, kiam la genioj, flugantaj ĉirkaŭ mia lulilo, rakontis al mi mirindajn fabelojn, kiu ravis mian spiriton kaj kreis la bazon de miaj ordeliroj.

Ĉu ne estas certa, mia belulino, ke eĉ la aromo kiu antaŭas la celon de nia amo, la eta kaj malforta brueto de la tuniko havas signifon, diras ion ke aliaj tute ne komprenas?

XI

Siannah silentas. ŝiaj ruĝaj lipoj malfermitaj, ellasas eskapi brulantajn sopirojn kaj en ŝiaj pupiloj malsekaj, bluaj kaj dilatitaj brilas lumpunktoj similaj al stelfulgoro sur lago.

-Pulo, ekdiras ŝi kvazaŭ revenante el ekstazo forportanta ŝin ekstertere, ĉu vere ekzistas arbo kies ombro mortigas?²⁰

-Certe jes, respondas la princo: la dio Sĉivo kreis ĝin por detruigi la homon, kaj lia frato Viĉnuo kompatinte nian malfeliĉon sciigis tion al Bramo, lia elektito.

Siannah denove sin sentas nervoza kaj mutiĝas: Ŝia edzo, dume, rigardas ŝin kun sento de nedifinebla amo.

²⁰ Aludas la aŭtoro al certa arbo menciita en la hindaj sanktaj libroj. En la libro "Mahabarata" aperas epizodo en kiu la protagonistoj, Nala kaj Damayanti, pilgrimantoj kaj amantoj vivas en arbaro similan scenon kiel tiu ĉi, kaj oni mencias tiun arbon.

XII

-Pulo, ekdiras denove post paŭzo la belulino, ĉu vere ekzistas arbo, kies ombro agitas la sangon en la vejnoj kaj ekflamas la amon?

-Jes!

-Ĉu ci ĝin konas?

-Mi ĝin konas, kvankam mi ne scias kiel ĝi nomas... sed kial ci direktas al mi tian strangan demandon?

-Mi ne scias... la ombro de tiu ĉi arbaro domaĝas min, ni daŭrigu do nian marŝadon.

-Daŭrigi nian marŝadon kiam la suno bruligas la sablon! Ni atendu ke la vesperventeton ekblovu el la golfo kaj la lumo ekpaliĝu.

-Ni atendu, murmuras Siannah, sed dume apartigu ciajn okulojn de la miaj, turnu ilin al la ĉielo aŭ dormu, ne metu ilin en la fundo de mia animo.

XIII

-Ci bone parolis, miaj okuloj en la ciaj trinkas amon, kaj nia amo, iam honesta kaj pura, nun estas krimo. Jes, estas necese ke mi ne vidu cin, Siannah, mi ekdormiĝas, kantu al mi ian himnon el nia patrio, kolombumu mian dormon kvazaŭ patrino kiam ne eblas kiel edzino.

La belulino ebonplekte kantas:

I

"Militistoj, la glavoj de la triboj soifas kaj la glavosoifo mildiĝas per sango.

Torento da fajro falas ekde monto Jakwio kaj tiuj trembriloj helantaj inter nuboj de polvo estas la feroj de niaj malamikoj.

Alportu al mi la ŝildon plifortigita per sep bubalo-feloj kaj ĉirkaŭmetu sur mian kaskon la flava ŝalo por ke oni ne konfuzu min dum la batalo".

"Militistoj, la glavoj de la tribo soifas kaj la glavosoifo mildiĝas per sango.

II

"Tien iras simile al...

Kaj alveninte tie, Pulo leviĝas, kaj Siannah haltas en sia kanto.

-Kial -ekdiras la princo- mi ne aŭskultas nun la kantojn de mia patrio kun sama iama plezuro? ĉu eble mi ne plu sentas en mia brusto la koron de unu el la Delhioj, aŭ eble la militistaj himnoj ne devus esti recitataj de belulino?

XIV

-Ekkantu kanzonon pri amo, unu el tiuj himnoj kiuj je la sono de cimbaloj kantas la virgulinoj kiam kondukas junan edzinon ĉe la altaron.

-Pulo!... Kantu, ne timu, mi dormos trankvila karesita de la eĥo de cia voĉo, la sopiro de brizo kaj la muziko el la akvoj...

Siannah kantas, ŝia voĉo tremas, ŝia brusto leviĝas ritme kiel ondo kiu ŝveliĝas ŝaŭme kronita:

*La reveno el la batalo
(Kanzono)*

I

La batalo finiĝis kun la tago kaj la militestro ĉeestas antaŭ la amatino.

LA VIRGULINO: "Militestro, klinu cian frunton sur mia sino, ĉar mi volas trinki el ĝi la ŝviton kaj la polvon de la gloro".

LA MILITESTRO: "Virgulino, apogu ciajn lipojn sur la miaj, ĉar mi volas trinki el ili la morton kiel en ruben-pokalo".

II

LA VIRGULINO: "Anim' el la kreo! Filo el Bermach! Genio Sepdekflugila! Amo, dia amo! Elvenu sur brakoj de la mistero kaj la nokto por kroni per cia aŭreolo al tiuj kiuj bruliĝas en cia flamo!

LA MILITESTRO: "Spirito nevidebla! Elspiro el sindonema animo, espero de la militisto! Amo, arda amo! Forlasu dum momento la alkazon de la dioj por meti roz-girlandon en la aŭrokronon de la militestro.

LA VIRGULINO: "Militisto, klinu cian frunton sur mia sino ja mi volas trinki la ŝviton kaj la polvon de la gloro.

LA MILITESTRO: Virgulino, apogu ciajn lipojn sur la miaj, ĉar mi volas trinki en ili la morton en ruben-pokalo.

III

LA VIRGULINO: "Via elspiro brulas en la interno de mi kiel vulkanspiro. La mano kiu serĉas la mian tremas kiel arbofolio. La sango alfluas sur mia koro, elbordiĝas el ĝi kaj bruligas la vangojn de mia vizaĝo, vualo el ombroj falas sur miajn palpebrojn. Ĉio forviŝiĝas kaj konfuziĝas antaŭ miaj okuloj, kiuj vidas nur alion el la fajro kiu brilas en la ciao. Militestro, kia nevidebla spirito plenigas la aeron el melodiaj akordoj kiuj tremigas min je ciao kontakto?

LA MILITESTRO: "Virgulino, estas la amo kiu preterpasas la limojn de simpla amo.

XV

La kanto de Siannah estingiĝis kaj kun ĝi, milda kaj harmonia, kisorumoron.

Kio estas la fantaziaj kasteloj kiuj levas la homa volo por kontraŭbatali fatalon? Montoj el sablo kiuj kiel tiuj de la granda ebenaĵo de Nepoul mirigas la vojaĝanton kaj uragana ventoblovo malaperigas.

KVARA KANTO

I

-Filo mia- diras Sĉivo al la Songo, malsupreniru al la tero kaj estu la mesaĝisto de miaj koleroj.

La Songo, filo de la tombo levas je tiu voko la frunton, malfermetas la duondormantajn okulojn kaj agitas sian naŭdekon da manoj, en ĉiu el ili subtenas pokalon plena ĝis la bordoj de dormiga likvoro.

-Por kio vi min vokas, realo de mia simbolo, patro kiu donis al mi la ekziston por ke mi taŭgu kiel nevidebla ĉenero inter finito kaj nefinito, inter la mondo de la homoj kaj tiu de la animoj, utila por descendigi la potencojn el la ĉielo kaj suprenigi tiujn de la tero ĝis kiam ili troviĝu en la malpleno, ja tiu estas la loko de mia suvereneco.

II

Sĉivo daŭrigas tiel rigardante sian propran bildon:

-Antaŭ kelkaj momentoj mi pensis detrui la princon kiu iun tagon uzurpis la sceptron de la morto, sed vane mi serĉis la okazon vundi lin, vane ĉar Viĉnuo, mia fiera antagonisto, defendis lin sub la grandega ŝildo per kiu li kaŝas la homojn antaŭ miaj okuloj kiam ĉi tiuj ardaĵoj pro kolero ĵetas fulmojn kiuj bruligas kaj mortigas. Subite mi aŭdis siblon ĉirkaŭ mi. Mi turnis la vizaĝon. Nova mondo, nova planedo venis al mi difinante cirklon en la malpleno, kaj mi restis allogita kiel birdo fare de boao.

III

“El sia sino ŝprucis konstanta fluo el harmoniaj sonoj kiuj plenigis la spacon sin dilatante kiel tiuj cirkloj de lago kiam oni ĵetas sur ĝi ŝtonon. Kovrita en fluidaĵo brila kaj lumiga, turnanta inter maroj el koloroj kaj sonoj, ĝia ĝojo kaj gloro ŝajnis insulti mian teruran povon. Mi levis mian manon (la aermovo elcentrigis ĝin de sia orbito) kaj vundis ĝin morte. Ekstaru kaj rigardu la grandegan ĉielebenajon kaj vi vidos Viĉnuon kuranta post ĝi, kun la intenco eltiri ĝin el la tombejo de astroj kaj realporti ĝin denove al la vivo.

IV

“Jen la oportuna momento por mia venĝo. La princo ne plenumis sian promeson kaj nun estas forlasita de mia malamiko. Refreŝigu lian varman frunton per viaj flugiloj

*kaj atendu la favoran okazon por verŝi sur liaj palpebroj
sonĝon antaŭan al la morto, sonĝo avida kaj agonias el tiuj
kiuj ĉirkaŭpremas la gorgon kun siaj ŝtalaj manoj pezanta
sur la koron kvazaŭ plumba montaro.*

V

*La Sonĝo etendas siajn tulflugilojn kaj forlasis la arbaron,
kie loĝas ĉe ebonalkazaro kaŝita inter la ŝvebanta ombro
de alooj.*

*La silento antaŭas ĝin kaj siaj fasonoj sekvas ĝin en
fantaziaj grupoj kiuj sin agitas kaj miksas inter si, kreante
novajn kaj rapidajn metamorfozojn, frenezajn delirojn
embriaj de konfuzaj ideoj, similaj al tiuj kiuj okazas dum
febros ĉe neforta menso superekscitita.*

VI

*La silentema karavano alvenas ĉe la bordoj de rivero
Gango kaj al la loko kie la princo ripozas. Tiu ĉi spertas
unue voluptan langvoron, poste ĝeneralan malviglecon,
kaj fine liaj palpebroj falas kiel plumbopezo sur liajn
pupilojn, kvazaŭ funebra platŝtono sur tombo. La Sonĝo
verŝis sur ili likvoran guton kiun gardas en mistera
opalvazo.*

VII

Kiam materio dormas, la spirito viglas. Dum la korpo de la militestro restas senmova kaj submetita en longa letargio, lia animo akiras fantazian formon kaj forkuras el la ligiloj kiuj ĝin kaptas por forflugi al etero: tie atendas ĝin tiuj kreaĵoj el sonĝo kiu prezentas mondon kie loĝas estaĵoj vivigitaj de la ideo, eksterordinara vizio profeta kaj reala funde, vana nur en la formo. Aŭdu, laŭ tradicio ĝin konservas, la vizion de la militestro.

VIII

La nokto estas obskura, la vento muĝas kaj siblas skuante la gigantajn branĉojn de boabaoj el la arbaro: la genioj svingas ĝiajn grizajn fajrglavojn inter la nuboj kiuj vidas ilin rajdantaj. La tondro eĥas en la abismoj de la montaroj saltante de eĥo al eĥo. La pluvo vipas la tufon de palmarboj kaj en la konfuzo kun la muĝo el ŝtormo la longa ventega plendo kaj la timinda murmuro el la arbarfolioj oni aŭskultas intertempe malproksiman muĝegon, raŭka kaj akra, kiu similas formiĝi en la interno de bronza brusto.

IX

Bramano, trapasante tiun nokton je tiu horo kaj tiun arbaron, estus devigata sendube prezenti siajn prĝojn al la detruema dio, kies triumfo, verŝajne, alproksimiĝis, konsiderante erare tiujn veojn el naturo kun la profetaĵoj

de la blankaj fantomoj el siaj antaŭuloj, kiuj rompis la sekreton de la tombo por montri al li la vojon de la morto.

X

El tiuj militistoj kiuj ĉirkaŭas la flavan ŝalon al siaj talioj dum festoj kaj dum la batalo, nur la militestro el Oriso havus la necesan kuraĝon por riski sin tra tiuj sovaĝaj kaj danĝeraj vojoj dum tiu tiel terura nokto.

XI

Pulo antaŭenpuŝas kun la pafarko streĉita, la sago preta kaj la ponardo inter siaj dentoj. Siannah sekvas lin, pala, hirta la hararo kaj timema la paŝo... ĉu ci aŭdacas? -diras al la princo-; ĉu ci aŭdas tiun voĉon resonanta en la densa arbaro?

-Estas la vento kiu vipas la palmarbojn- respondas la militestro traserĉante, malgraŭ lia volo per rigardo inter la multjaraj trunkoj de alooj kiuj profilas la limojn de la pado.

XII

La geedzoj persiste antaŭeniras kaj la ŝtormo fariĝas pli kaj pli terura. –ĉu ci aŭdas tiun rumoron kiu kreskiĝas iom post iom ĉe niaj dorsoj?, interrompas denove la belulino.

-Estas la pluvo kiu agitas la lianojn, aldonas la princo metante la sagon ĉe la arko kaj kovrante kun la propra korpo tiun de Siannah.

-Ĉu ci aŭdas?, ŝi denove interrompas, kaj aldonas: ĉu iu ajn spiras ĉirkaŭ ni?

-Metu cin surteren, ekkrias Pulo subite, tigro estas saltonta sur nin!

XIII

Du fosforaj flamoj brilas en la nigro.

La sago de la princo ekflugas.

Al ĝia aspra siblo respondas muĝo sufokita kaj profunda; la tigro saltas. Pulo forĵetas la arkon, sin kovras per la ŝildo, fleksas unu el siaj genuoj kaj kovrante sian vizaĝon atendas la sovaĝan beston kun la ponardo en sia dekstra mano. Siannah ĵusvenanta kuŝas ĉe la piedoj de la militisto kovrita de lia mantelo.

XIV

La lukto komenciĝas. Pulo enprofundigas unu kaj centfoje sian ponardon en la tigroventron, kiu en ĝia agonio penas ankoraŭ ataki ĝian malamikon. Sed la militisto ŝirmita post sia ŝildo evitis ĝian atakon dank' al liaj viglo kaj memrego, propraj de homo al kutimiĝinta al la danĝero kaj al la morto. Sed jam la timinda besto ellasis ĝian raŭkan stertoron rulfalanta sur la polvo kaj la sango kiu ŝprucas de ĝiaj vundoj. Tiam kiam la princo levas l' okulojn al ĉielo surprizita pro stranga fenomeno.

XV

La pluvo ĉesis, la uragano kaj la tondrobruo mutiĝis; al la brila kaj subita helo de la fulmoj sekvas lazuran klaron, certan hezitlumon simila al la unua ektagiĝa helo de iu tago sen suno kaj sen aŭroro. La birdoj kiuj sin kaŝis timeme de la fulmado sub la pavilonoj de la verda arbaro, plenaj de ĝojo volas ekflugi kaj trili, sed ilia kanto sufokiĝas ĉe iliaj gorĝoj kaj falas surteren mortvunditaj per nevidebla mano. La gigantaj arboj agitiĝas kaj sin tordantaj pro terura konvulsio komencas tapiŝi la teron per palaj folioj, kiuj falas de la branĉoj samkiel falas la haroj de la kapo de maljunulo.

La verdaj lianoj kiuj sin lulis pro ventoblovo pendantaj de la trunkoj de la antikvaj reĝoj de la arbaro, perdas la koloron kaj freŝecon, kaj iliaj floroj sekiĝas kiel pergameno proksima al la fajro. Oni dirus, rigardante tiun teruran spektaklon, ke mortiga veneno cirkulanta tra la aero, aŭ sin leviĝanta per nepercepteblaj efluvo ekde la interno de la tero estus veneniginta la atmosferon kaj kun ĝi al la mondo.

XVI

La militestro, surprizita, turnas sian rigardon; tra ĉie, persekutas lin tiuj afliktigaj bildoj, sed kio pli surprizigas lin estas, vidi la sangoplenan tigron ektemi unue, kaj iom

post iom, perdante ĝiajn primitivajn formojn ekakiri dank' al neimagebla transformiĝo tiujn de serpento.

-Jam ne plu restas al mi ia ajn dubo- klamas li- Sĉivo deziras mian morton, mi rekonas en tiu reptilio la ministron de lia kolero. Ho! ke mi ne estu dio por batali kontraŭ la dioj! Sed tio ne gravas, eĉ mizera mortonto kiel mi estas, mi vendos kara mian vivon!

XVII

La timinda reptilio kreskas laŭ fantazia rapideco; ĝia longeco jam estas la dekoblon de normala boao el tiuj kiuj vekigas po du lunfazoj sur la bordoj de rivero Sitpurio. Ĝiaj rondaj okuloj, fiksaj kaj sorĉaj, estas fiksaj en tiuj de la militestro. Tiu ĉi, kaptita de tiu impulso kaj kuraĝo kiu donas malesperon en supremaj momentoj, forĵetas de si la ŝildon, neutila por tiu batalo, kaj nudigas denove la ponardon.

XVIII

La giganta serpento retiriĝas en si mem eksiblante akute kaj sovaĝe. La princo, sen atendi ĝia atako sin ĵetas kontraŭ ĝia kolo, tiel dika kiel granda palmo, kaj klopodas vundi ĝin. Neeble! La ŝtalaj skvamoj kiuj ĝin kovras kaj defendas estas nepenetreblaj, kvazaŭ konko el testudo de rivero Jawkior.

Jam la reptilio kaptante la militestron kun ĝiaj bronzaĵaj ringoj streĉas ilin kaj mortvualo etendiĝas antaŭ liaj okuloj, kiam sago pafita ekde la nuboj venas sibilanta kaj trapasas la serpenton.

XIX

Terura furoro trafas la reptilion, kiu ellasante la preskaŭ senvivan korpon de Pulo serĉas blinde ĝian malamikon. La diamanta pinto de dua sago finigas ĝian agonion per la morto.

La militestro, forlasante sian surprizon, povas tiam vidi kun granda emocio kaj respektoplena dankemo tiun al kiu li ŝuldas sian vivon.

Viĉnuo, kovrita la dorso per mantelo el feloj, la arko ankoraŭ streĉa kaj la sagujo kun la diamantsagoj surŝultre, staras apud li. La frunto de la dio tuŝas la nubojn kaj lia ombro estas grandega kiel tiu de Himalajo sur la ebenaĵo kiam la suno sin kaŝas ĉe la limoj de la Oceano.

XX

-Militestro, ekdiras la antaŭulo de Sĉivo kun kolera akcento, kial vi supreniris ĝis la sankta groto de Jabwio? Por kio vi demandis al la puraj akvoj el ĝiaj fontoj ĉu la ĉielaj revelacioj estis neutilaj, se fine vi estos rompinta la

ĵuron kiel oni rompas la sagon sur la genuo, kiel pruvo pri paco inter du malamikoj?

Pulo mutiĝas, la hontoruĝo el sia kulpo kolorigas siajn bronzajn vangojn kaj sufokas lian voĉon. Viĉnuo daŭrigas laŭjene:

-Grandega, kiel la improvizo de la homoj estas la bono de la ĉielo: jen kial mi pardonas viajn kulpojn. Neutila estas jam ke vi serĉu la fontojn el rivero Gango, ĉiun sableron falantan sur via kulpo oni devas aldoni al la puno. Tiu kiu trudis vin la solulo de Jabwio estas jam nesufiĉa por lavi vian animon.

XXI

-Se unu sola momentoforgeso sufiĉis por vaporigi kvazaŭ fumo ĉion kiom mi atingis por meriti per mia pento, kion mi faros por lavi mian kulpon? -diris la princo.

-Leviĝu, daŭrigis la dio, prenu vian arkon, demetu viajn sandalojn kaj forlasante la riverbordojn de Gango returnu sur viajn paŝojn ĝis atingi Kattak. Inter la sabloj de ties strando dormas en la sino de la forgeso preĝejo, kiun honore al mi iam starigis via glora antaŭulo, kiam sub la protekto de mia ŝildo alportis ĝis tie liajn nevenkeblajn armeojn. Sur la rokoj kie rompiĝas la plej altaj ondoj nestas korvo; supreniru tie kaj demandu ĝin pri la loko kie

sin kaŝas tiu templo: vi rekonos ĝin per la fajroj kiuj dum nokte turniĝas super ties ruinoj, kaj tiun vi rekonos pro ĝia blanka kapo.

XXII

Viĉnuo malaperas: la arbaro reakiras sian freŝecon, la lianoj sian verdecon, la birdoj sian voĉon, kaj al la griza ĉiel-lumo sekvas la trankvila kaj milda helo de stelnokto plena de harmonio, parfumoj, sopiroj kaj kantoj.

La princo ekstaras kaj kuras tien kie Siannah restis sveniĝinta kaj kaŝita sub la faldoj de la mantelo de ŝia edzo. Li levas tiun kaj el liaj lipoj eskapas krio el surprizo kaj angoro.

Siannah ne plu estas tie. Siannah malaperis.

XXIII

En tiu punkto, la Songô etendas siajn flugilojn kaj forlasas la princon; tiu ĉi konvulsia kaj pala ankoraŭ, vekigatas de sia koŝmaro, serĉas lian edzinon ĉe kies sino li dormiĝis kaj ne ŝin trovas.

La suno, kuŝanta sur lito el purpuro kaj oro, kiel rajao sur kolortapiŝo, ĵetas al la tero sian lastan radion el siaj malfermitaj okuloj. La Naturo ekvekiĝas de ĝia tagmeza dormo. La vesperbrizo, plena je murmuroj kaj parfumoj, ludas kun la florkalikoj kiuj malfermiĝas je la ricevo de ĝiaj kisoj. La Gango-akvoj, kopiante en siaj travideblaj linfoj la

belajn vegetaĵojn de la riverbordoj, kantas melankolian himnon, al kiu kuniĝas la mildaj tonoj de la birdoj, kiuj adiaŭas la tagon per mildega kaj trista adiaŭo.

XXIV

*-Siannah- diras la militestro kun voĉo sufokita de la ploro.
-Siannah, edzino mia, kie ci estas ĉar ci ne min aŭdas? -
Siannah, neseparebla amikino antaŭ mia doloro kaj malfeliĉo, kiu elŝiris cin de mia flanko por ŝteli al mi la solan feliĉon ankoraŭ al mi restanta sur la tero?
Ho!, revenu, revenu, mia belulino, sen ci, mia vivo estos nokto sen aŭroro, ploro sen larmoj.*

XXV

Nur la eĥo respondas al la enamiĝinta Pulo, kiu kaptita de freneza avido kuras denove al la bordoj de Gango-rivero, serĉas sur la sablo la postsignojn de lia edzino kaj ree vokas ŝin per ĝia nomo cent kaj centfoje: sed ĉio estas vana. La nokto forviŝas el la ĉielo la kolorojn, kaj la nuboj, la steloj, mutaj atestantoj de la doloro kaj malfeliĉo de la geamantoj, aperas unu post alia ĉirkaŭitaj de nebulhelo, sed Siannah ne aperas.

XXVI

-Malsaĝa!, diras voĉo resonanta en la vento, sen la eblo vidi la buŝon el kie ĝi venas, kion vi intencas fari?

La militestro, kiu eksvingis sian ponardon por enpenetrigi ĝin en sia propra brusto, haltas surprizita kaj aŭdas jenajn vortojn:

-Se vi mortas, neniam vi revidos ŝin, se vi konservas vian vivon kaj plenumas ĉion kiom mi diris, la sangomakuloj de viaj manoj malaperos por ĉiam kaj vi trovos denove vian edzinon.

La songoj estas la spirito de la realo kun la formoj de la mensogo. La dioj malsuprenas kun ili ĝis la mortontoj kaj iliaj vizioj estas paŝoj el estonto aŭ rememoroj el pasinto! La voĉo kiu bremsas la princon estas tiu el Viĉnuo, aperinta en liaj songoj.

KVINA KANTO

I

La princo post unu pilgrimadjaro, alvenas je la fino indikita de la genio. Tiu ĉi, dum tiom da tagoj, fiksaj la okuloj sur sia protektito, deĵoris tage kaj nokte por gardi lian vivon ĝis lasi lin en Kattak.

II

La aŭroro ĝiras la noktovualon. De siaj orplektaĵoj falas la roson kiel pluvo da perloj sur la montetoj kaj ebenoj. La marhorizonto brulas kaj la ondokrestoj brilis kiel la skvamoj de militista kirasvesto dum bataltago. El la floroj, malsekaj ankoraŭ kun la larmoj el krepusko, leviĝas al ĉielo aromkolono, parfumitaj disvastigoj kiujn la genioj trairante inter ĉielaj kaj ambraj nuboj prenas kun la matenaj preĝoj de Bramanoj por surmeti antaŭ la piedoj de Bermach, aŭtoro de la mirinda maŝino de la mondoj.

III

Pulo sidiĝis sur unu el tiuj rokoj kiuj hirtigas la ampleksajn paŝojn de la regno Kattak ĝis la Oceano. Lia penso dividiĝas inter sia edzino kaj sia konscienco.

-Jam alproksimiĝas, li diras, la pardonhoro; iom pli da peno kaj mi estos antaŭ la ĉeesto de tiu mistera birdo kiun Viĉnuo elektis kiel interpretanto de liaj intencoj. Dio, kiu konservas kion ekzistas, separante ŝtormon kaj morton de la kapo de la homo, ne intermetu vian povon inter mia koro kaj la sago de la militistoj, inter mia vivo kaj la ungego de tigro aŭ la ringoj de giganta boao, sed defendu min kontraŭ mi mem, eltiru de mi amon kaj konsciencon, kies frapoj mortigas sen vidi la manon kiu direktas ilin.

IV

La suno ellitiĝas malrapide el la sino de la maro kaj leviĝas al la horizontopinto de la firmamento. La militestro, post lavi sin sepfoje la manojn kaj la sangantajn piedojn, recitas kelkajn misterajn preĝojn, komencas malfacilan ascendon por atingi la montopinton de la kolosaj rokoj kies fronto nigrigis la sunradiojn kaj tempestojn, kies plantoj kisas aŭ vipas la varmegajn ondojn de la oceano.

V

Post grimpi dum unu horo, sin alkroĉiĝante al arbustoj kaj herbaĵoj kreskantaj inter la rokoj, la princo troviĝas fine je la pinto de la monteto.

En unu el la granit-rokoj kiuj kronas la montopinton ekzistas fendo, kaj ĉe la fundo oni ŝajnas distingi la konfuzajn formojn de birdo, kiu fiksas ĝiaj okuloj en tiuj liaj, brilantaj en la obskureco per fantazia lumo.

VI

-Birdo de la dioj, diras Pulo genuante sin antaŭ la aera nesto de la blank-kapa korvo; mistera birdo sub kies nigra plumaro vivadis dum tri jarcentoj la ĉiopova Viĉnuo, atingante per tiu ruzeco eviti la morton, kiu la dio de la detruo pretigis lin. Jen al mi atendente viajn parolojn kiel tulipoj velkiĝintaj pro la fajro de la tago atendas la gutojn de la noktorosoj.

VII

La korvo forlasas ĝian ŝirmejon, flugas ĝis la elstaraj rokoj kaj, post agiti ĝiajn flugilojn trifoje diras al la militisto, kiu aŭskultis ĝin silente kaj kun la frunto fronte al la polvo: -Sinjoro de Oriso, ĉiopova descendanto de la Delhioj, konkerantoj de Hindujo kaj protektitoj de Viĉnuo, mi scias pri kio vi venas demandi min, tial estas neutila via demando. La templon kiun vi serĉas estas tre malproksime de ĉi tie; sekvu miajn paŝojn kaj mi montros al vi la lokon kie oni komencos la konstruon.

VIII

La blank-kapa korvo ascendas en la aeron lasante sin fali ĉe la piedo de la monteto, kie ĝi atendas ke la militisto descendu. Kiam tiu ĉi alvenas je la descendofino, la mistera birdo ekmarŝas laŭ malaltaj saltoj kaj sen forlasi la marbordon sur kie rompiĝas la or-krestaj ondoj. Daŭrigas survoje dum la tuta tago sen forlasi la strandon blankumita de la ŝaŭmo, kaj kiam jam la suno descendas al la sino de la ondoj, ĉirkaŭitaj de densaj kaj ruĝaj ĉielnuancoj, la fluganta gvidanto apartiĝas de la paŝoj kaj iranta tra ŝlima marĉo kovrita de verdaj kaj altegaj junkoj.

IX

La nuboj, grupiĝantaj ĉe Okcidento, envolvas la kadavron de la suno per mortotuko de brumoj antaŭ ol ĝi descendos al ĝia tombo.

La nokto anticipiĝas, nokto sen astroj kaj sen travideblaĵoj. La brizo murmuras preĝon al la morto, plorante melankolie inter la densaj junkoj. La florparfumoj kiuj malfermiĝas en la ombrospaco, la krio de ŝakalo kaj la siblo de la noktaj birdoj resonas simile al tiuj sinistraj kaj misteraj rumoroj kiuj naskiĝas, tremas kaj etendiĝas en la obskureco, sen ke ni divenu el kie ili devenas.

-Senmorta birdo, diris Pulo haltiĝante en sia irado, jen la nokto kiu konkeris la teron kaj vane mi pretendas sekvi vin, ĉar la ombro forprenis al mi la vidon.

La ŝakalokrion oni aŭdas ĉiufoje pli proksima: vi scias ke mi ne ĝin timas, sed mi estas sen armiloj kaj tial tute ne preta por defendi min de ĝiaj perfidaj atakoj.

-Ni reiru malantaŭen kaj ni atendu la tagon por daŭrigi nian marŝadon. Timinda kuraĝo mi konsideras tiun de kiu riskas sian vivon kontraŭ malamikoj kiujn ne povas venki; se almenaŭ la luno brilus en la ĉielo, ĝia lumo gvidus nin tra tiu ĉi marŝo, kie ĉiupaŝe mi timas trovi la morton, restanta en ĝiaj ŝlimaj kaj senmovaj akvoj.

X

-Ne timu, respondas la korvo, la dio kiu nin gvidas zorgos nin ekde ĝia alta posteno. Jen la maniero bone eliri de tiu

ĉi danĝero: la ebenaĵoj kiujn ni tuj traĭros vidis la malvenkon de via patro. Sĉivo, ĵaluza de la kulto kiun tiu ĉi oferis ĉe la templo kien ni iras, al la genio kiu al vi protektas, arigis kontraŭ li la militistojn de Kattak kaj Lahoro, kiuj venĝosoifantaj kontraŭ ilia venkinto, unuiĝis en la noktoombroj por pretigi iliajn glavojn kiuj vundos al la preferatoj de Viĉnuo.

XI

“Iun tagon, via patro forlasis la templon por iri al la arbaroj kiuj etendiĝas ĉe la piedo de la monteto kies pinto estas nevidebla; subite, nubego de blanka polvo venanta el la Orienta parto obskurigis la sunolumon kaj altiris lian scivolemon. Kia nova kaj multnombra karavano da pilgrimantoj estas tiu kiu alproksimiĝas al la templo de mia dio?, li diris sin turnanta al unu el la perfidaj rajĵoj portantoj de liaj ŝildo kaj sagujo...

XII

“Tiu ĉi, fiksante al siaj kolegoj inteligentan rigardon, respondis al la venkanta reĝo kun liporideto: "Kiu scias kia malproksima lando kiu sendas tia svarmo da pilgrimantoj? La famo de la mirinda templo de Kattak iras de buŝo al buŝo ĝis la plej malproksimaj ekstremoj de la tero". -Via patro, post fiksrigardi denove en tiu blanka

nubego de polvo kiu alproksimiĝis, kaj el kiu ŝprucis multnombraj fajreroj, diris kun terura voĉo:

XIII

“-Kio estas tio? La rustikaj armiloj de la pilgrimantoj flamas je la ricevo de la sunradioj samkiel la kirasoj de la militistoj de Lahoro. Ĉu vi aŭskultas? Tra la flugiloj de l' vento alvenas konfuza la eĥo de terura kaj sovaĝa harmonio de militkornoj. Ho! jam ne plu restas al mi ia ajn dubo; la malamiko kiun mi piedpremis restariĝas denove kiel vipero preta min mordi. Sed ne gravas: ni konstatos ĉu la militestroj de Lahoro lernis denove venki, post multaj jaroj alkutimiĝintaj al forkuro...

XIV

”Kuraĝuloj -daŭrigas parolante al siaj akompanantoj -donu al mi la arkon kaj mian ŝildon, pretigu viajn glavojn kaj ke la raŭkaj arĝentokornoj kunvoku mian militistaron per ĝiaj trumpetsonoj. El di' Salek, unu el la perfidaj kapitanoj, enpenetrigis kiel respondo sian glavon en la bruston, kaj poste svingante ties glavo krias en triumfa sinteno: Kuraĝu! kompanoj de nia sklaveco! Kuraĝu, iamaj mastrumitaj armeoj de Kattak kaj Lahoro, malaperintaj iun tagon pro la blovo de l'tirano kiel fumo per uragano! Antaŭen! nia lando estas libera!

XV

“Dume, la malfeliĉa reĝo, rulturniĝanta sur sia propra sango, pretendas vane peti helpon, lia voĉo sufokiĝas en la propra gorĝo, provas fari lastan klopodon por restariĝi, kaj falas teren morta kun spasmaj pugnoj indikantaj al la barbaraj militistoj, kiuj avancis laŭ la aspra ritmo de iliaj bronzaĵ instrumentoj...

XVI

“La pastroj de Viĉnuo konstatas kun surprizo kio okazas, kaj suprenante al la altaj turoj de la Pagodo plenigas la aeron per teruraj krioj de la sankta heliko, kiun respondas de la ebenaĵo la eburkornoj de la militistoj de via patro...

XVII

“-Kie estas nia militestro ĉar li ne kuras kiel leono al la batalo? Kial ne flugas ĉe la unua vico lia purpurmantelo kaj la flava ŝalo kiu ĉirkaŭas lian frunton? “Mia mastro! diras la kuraĝaj konkerantoj de Kattak, kaj neniuj scias kie troviĝas la sinjoro de Oriso, ĉar li ne respondas al la batalrumoro per la militkrio...

XVIII

“La malamiko avancis, la ebenaĵo ĝemas sub la pezo de elefantoj kaj militĉaroj, kaj la eĥo de de la malproksimaj montoj ripetas la sovaĝajn kriojn. Sonas la indiko de

ekbatalo kaj de la morto. La defendantoj de Viĉnuo agonias unu post alia sub la rigoro de la malamika ŝtalo. La templo de dio ekflamas kaj kun ĝi la urbo naskiĝinta ĉirkaŭ ĝi konstruita de la reĝo de Oriso honore al la bonfara genio de Allah-abad...

XIX

“Kiam venis la nokto, la agonianta flamo de la brulo, forĵetante tremantajn cirklojn de lumo kaj ombro sur la ebenaĵo, sin reflektis sur la kaskoj de la kuraĝuloj kiuj mortis per la batoj de Sĉivo, kiuj etendiĝis sur la polvo kovritaj de sango kaj gloro. Profunda silento regis en la kampoj kie okazis la sanga lukto, silento kiun nur interrompis la impona bruo de la muroj falantaj, bruligitaj pro la sibilantaj flamoj, aŭ la raŭka krio de ŝakalo, kiu blindumita de la arda helo de la fajro blekis en la interno de ĝia kaverno timema ekpaŝi al la batalkampo por formanĝi la neseputitajn kadavrojn. La venkintoj forlasis antaŭ ol noktiĝo la ebenaĵon, kie de tiu tempo neniu kuraĝis iri ĉar timis la ĝenon de Sĉivo, kiu volis havi en tiuj lokoj templon de ruinoj, loĝata nur de soleco kaj teruro.

XX

Pulo aŭskultis, terurigita pro religia timo, la historion de la sanga batalo en kiu sia patro perdis la vivon; historio ke

en sia lando kantis la bajaderoj laŭ sono de cimbaloj, sed kies terura simpleco neniam eltiris unu solan larmon el liaj okuloj kiel tiuj kiuj ŝprucis nun bruligante liajn vangojn.

XXI

La korvo daŭrigis laŭjene:

-Ĉu vi vidas tie, inter la densaj kanejoj, sin kaŝante violkoloran flameton kiu hezitas kaj kuras surface de la fetoraj marĉoakvoĵoj? Pli malproksime, ĉe monteto kie la ombro de sombra arbaro staras simpla tombo konsistanta el nepoluritaj ŝtonoj, ĉu vi vidas kiel tiuj flametoj flugas super la tombo kaj haltiĝas ĝuste apud la trunkoj de la arboj kaj multobliĝas en mil aliaj fantaziaj flametoj, leĝeraj kaj bluhelaj?

XXII

"Tiuj estas la spiritoj de la kuraĝuloj kiuj defendante la genion al vi protektanta, falis sub la batoj de la hakiloj de Kattak. Fleksu vian genuon surteren, ĉar via patro lasas nun la sinon de la tombo por gvidi nin, tra la nokto, de la marĉo-ombroj de la kuraĝuloj al la loko kie kovrita de la musko kaj kaŝita inter altaj kaj silentemaj herboj ni trovos la mortajn restaĵojn, unika relikvo de la altaro de Viĉnuo.

XXIII

Pulo klinas sian genuon, kaj el la modesta tombo leviĝas ruĝa flamo, kiu sin ĵetante al la malpleno komencas iri al okcidento.

La korvo sekvas la flamon kaj la princo al la korvo. Subite, la flamo haltiĝas sur la pinto de la monteto, ĉe kies piedo dormas la vento de la nokto sopirante inter la arbofolioj.

La birdo de la blanka kapo ekflugas, kaj balanciĝanta en la aero super la ruinoj de la Pagodo, vokas al la militestro: tiu ĉi, mirigita kaj ekstaza, suprenas la mildan deklivon kiu kondukas al la fino de sia pilgrimado.

SESA KANTO

I

-Reiru al via regno, disigu viajn trezorojn kaj alportu ĉi tie kun vi la artistojn plej gravajn kiujn en ĝi vi trovos. Je la sunlumo dum la tago, kaj je la lumo de torĉoj dum nokte, ke oni ne donu ripozon al la senaktiveco, lacigante la eĥon de ĉi tiuj lokoj per la ĝoja kaj tumultema rumoro de la laboristoj frapante sonore per martelbatoj...

II

“Ses jarojn vi disponas por rekonstrui la Pagodon, kiu altiros la admiron de la tuta mondo, kaj ĉirkaŭ ties altegaj

turoj grupiĝos la nuboj kaj eksplodos tempestoj simile kiel ĉe la montopintoj. Silkoj ekzistas en Kaŝemiro, oro en Siam, cedroj en Kataj, elefantoj en Lahoro kaj perloj ĉe la golfo de Ormuz. Trairu tiujn landojn, kaj per iliaj oferdonoj kaj viaj akiroj, la Pagodo de nia hodiaŭo helos kiel la astroj, ŝvebantaj hejmoj de la genioj.

-Kaj kiel oni reprezentos Viĉnuon- interrompis la princo: kun vesto de ĉasisto kiel emblemo de liaj atributoj, aŭ en la figuro kiun vi havas kaj estis la sia dum jarcentoj?

La korvo daŭrigas: -Kiam vi metos sur la plej altaj el la turoj la lastan el la ŝtonoj kiu kronos ĝin ĉe la Orienta parto, kaj kondukitaj de la ondoj, alvenos al tiu ĉi strando la giganta trunko de tute nekonata arbo de la mortontoj. Kun la noktoombro kiu anstataŭos la tagon kiam vi ĝin trovos, venos al la pordo de via palaco pilgrimanto. Akceptu lin en via hejmo, lavu lin la piedojn kaj sidu lin apud vi ĉe via tablo...

III

“Tiu pilgrimanto diros al vi, ke vi petu al li ion kiel pago de via gastoprezo. Petu lin, nome de nia komuna protektanto, ke li skulptu sian figuron sur la trunko de la nekonata arbo. Se li akceptas al via peto, indiku al li apartan ĉambbron de via palaco kie li metos sian ilaron kaj zorgu ne spioni liajn laborojn dum la silenta nokto, eĉ ne per unu sola rigardo. Tiu ĉi sufiĉus por ke la

eksterlandano malaperu de via hejmo, kaj estu neutila vian penadon por dormi vian konsciencon kaj lavi la sangon de viaj manoj.

IV

-Viaj paroloj, diris la militestro, restos gravuritaj en mia memoro kiel restis la lasta adiaŭo de mia forpasinta patrino, kiel la unua amopromeso al mia karega Siannah, sed antaŭ ol separi nin, eble por ĉiam, antaŭ ol vi reflugos por vin kaŝi de la okuloj de la homoj ĉe la pinto de via tutsola roko, diru al mi, se tio eblas, aŭ se la sekreto de via ekzisto povas esti konata de simpla mortonto, kiu estas vi?

Kia dia spirito vin gvidas? Kial posedanta vi la inteligenton, ne de homo, sed de la dioj, vi restas sub la formo de birdo? ĉu eble la genio kiu vin favoras ne havas la sufiĉan povon por doni al vi ĉion kiom vi deziras aŭ ambicias?

V

La kapblanka birdo respondas: Mi estis tio kio mi estas, korvo; tio de antaŭ ses aŭ ok mil jaroj. Viĉnuo, venkita de sia antagonisto Sĉivo, forkuris de astro al astro tra la ĉielo. Post vagadi sencele tra la senlima malpleno serĉis rifuĝon en la tero. Eĉ tie persekutis al li sian malamikon. Jam estis proksima la momento kiam li devis esti

malkovrita, kiam la genio de la konservado, vidante lin ĉe la supro de aloo, elprenis la esencon kiu donis la vivon al mia formo, kaj enkarniĝis en ĝi, trompante tiel la persekuton de sia antagonisto.

VI

“Tri jarcentoj forpasis kaj je la fino de ili mi retrovis mian antikvan formon, kaj la dio demandis min: Kion vi volas – ĉu la senmortecon? Kaj kion alian, la supreman inteligenton? Kaj krom tio, ĉu ankaŭ esti homo? De hodiaŭ kaj estonte, viaj deziroj realiĝos. Kaj mi estis senmorta kaj neerarebla homo: mi vivis en la mondo, regeneris sociojn, skribis leĝojn, plibonigis la homan kunvivadon kaj... la pago de mia penado, de miaj aspiroj kaj de mia amo estis tiaj, ke mi petis esti denove korvo, kaj kvankam post tombojuĝo la homoj rekonis miajn meritojn, jen al mi ĉi tie ja mi estos korvo ĝis la finiĝo de la tempo.

VII

*-Sed, kiu vi estas aŭ kiu vi estis? -demandas la princo al la birdo, kiu forflugas movante siajn gagatajn flugilojn?
-Legu skribaĵon kiun mi gravuris per mia beko sur la ronĝita altaro kaj vi tion scios -diras sen haltigi en sia flugo.*

Pulo kuras al la loko kiun oni ĵus indikis al li, kaj efektive li legas sur la muska ŝtono jenan legaĵon: "Tiu ĉi estas la altaro de la templo de Jaganata, laŭ inspiro de Viĉnuo, Bramo lasis la rokon, kie vivas malproksime de la tumulto de la homoj, por montri ĝin al Pulo Delhi, reĝo de Oriso, sinjoro de sinjoroj, ombro de Dio, kaj filo de la tutlumaj astroj.

SEPA KANTO

I

Du jaroj jam forpasis. La templon de Jaganata, aŭ "sinjoro de la mondo", oni rekonstruis sur la antikvaj ruinoj. Samtage kiam oni metis la lastan ŝtonon en la giganta turo de la pagodo, la maro ĵetis sur la sabloj de siaj bordoj trunkon el arbo, kiun la bramanoj alportis surŝultre, envolvante ĝin je purpuro ĝis la loĝejo de la princo.

Tiu ĉi, sidanta sur tapiŝo el Persio, atendas senpacience la horon kiam la suno descendanta el sia orĉaro kaŝiĝos post la lumstrio kiun brodas la Oceano.

II

La krepusknebullo leviĝas el la fundo de la silentaj lagoj, kaj la patro de la tago kaŝiĝas post la nuboj grupiĝantaj

ĉe Okcidento, kiam Pulo, fiksaj la okuloj sur la pado kondukanta ĝis sia palaco, kaj sur kiu neniu aperas, klamas venkita de profunda senpacienco:

- La tago forkuras, la nokto venkas kaj la pilgrimanto malfruas. Ĉu eble mi ofendis denove al Dio pro mia senpacienco? Mia senpacienco! Ho! Kiam de lia alveno dependas tiu de mia edzino, kaj de la fino de la tasko la kulmino de miaj suferoj kaj la pardono de miaj kulpoj, ĉu eblas ke li ne aspiru estingi la lastan lumradion brilanta en sunsubiro, kaj alporti la nokton sur la ebenaĵoj por ke kun ĝi venu la dia mesaĝisto?

III

-Jen al mi ĉi tie.

La princo surprizita kiam ekaŭdas la antaŭajn vortojn, turnas sian vizaĝon kaj rigardas ĝuplene kaj avide tiun kiu ilin prononcis.

La pilgrimanto, kiu ne estas alia ol tiu, kiu tuŝante la dorson de Pulo, respondis al la ideoj kiuj nestis en sia menso, daŭrigis laŭjene rigardante la princon:

-La nokto avancas, skribite estas en la sanktaj Vedioj, ke la mondo estas la patrujo de la pia pilgrimanto; la modestaj kabanoj kaj la mirindaj palacoj devas rezervi lokon al li ĉe la hejmo, ĉe la tablo kaj ĉe la lito. Sinjoro de Oriso, ĉu vi volas doni al mi azilon en via hejmo?

IV

La militestro respondas:

-La edzo tremanta de ĝojo kaj amo ne kondukas sian edzinon kun pli da ĝojo al la virino kiun li amas al la nupta lito, ornamita de purpuro kaj lino, kiel mi vin kunportos sidi vin en mia propra hejmo, ĉe mia tablo kaj en mia lito.

V

La pilgrimanto, akompanata de la senpacienca sinjoro de Oriso, eniras en la palacon. La torĉoj dislumas. La hejmofajro plu viglas, kaj sur du splendidaj kaŝemiraj ŝaloj, la bramanoj servas delikatajn manĝaĵojn en orpladoj al la gasto sendita de la ĉielo. Kiam finiĝas la bankedo kaj la ambropokaloj, ruĝkoloraj kun aromaj likvoroj, cirkulas ĉirkaŭe verŝante la ĝojon kaj la ebrion, la pilgrimanto diras al Pulo, kiun jam ekperturbigas la vinvaporoj kaj la varmega etoso de la bankedo:

VI

-Sinjoro de sinjoroj, diras al li, via pokalo estis la mia, kiel mi povos pagi la gastamecon kiun vi donis al mi? Parolu, viaj deziroj plenumiĝos.

La princo petas al li, laŭ instruoj de Bramo, ke li skulptu sur la trunko kiun ĵetis la marondoj la figuron de Viĉnuo. La pilgrimanto obeas kaj ricevas la ilaron kiun li deziras, kaj la izolitan lokon kiun li postulas.

VII

La luno, pala reĝino de la nokto supreniras serena tra la ampleksa ĉielo, disvastigante mildan melankolian helon, kiu rompiĝas po arĝentaj eroj sur la ondopintoj. Ĉio estas submetita en la plej profunda silento kiam la militestro vekigigas skuimpresa el la sonĝo, kiu malgraŭ li mem gajnas sian spiriton. Pasas siaj manoj sian varman frunton por separi el ĝi la brumon de la ebrieco.

VIII

Li rememoras ĉion kio okazis tiu nokto en sia palaco, kaj puŝita de lia scivolemo kaj senpacienco atentigas por konstati ĉu en la silenta nokto oni perceptas la martelfrapojn kaj ĉizilon de la skulptisto. Eĉ ne unu sola rumoro rompas la majestatan trankvilon de la ombroj.

IX

“Ĉu eble ebria pro la likvoro-vaporoj la pilgrimanto dormiĝis forlasante sian skulptadon? -pensas Pulo en si mem.

Tiam komencas lukto en la animo de la militestro, lukto inter la scivolemo kaj la timo kiu finiĝas kun la triumfo de tiu genio de malbono kiu gvidas liajn paŝojn tra la nokto

kaj ĉi tiuj iras impulsitaj de nevenkebla forto al la loko kie troviĝas la pilgrimanto.

X

-Atentu denove; nenion oni aŭskultas, kion li faras? Se eblus malkovri ian arkanon!

Tion dirante, la militestro de la ruĝaj manoj separas la silkajn orajn kurtenojn kiuj kovras la pordon de la ĉambro okupata de la mistera vojaĝanto: fulmo falanta antaŭ liaj piedoj tute ne mirigus lin tiel kiel la sceno sin prezentanta antaŭ liaj okuloj.

XI

La pilgrimanto malaperis. Meze de la ĉambro kaj je la eta lumo de alabastra lampo oni vidas la grandan buston de horora idolo.

La frenezo de ties fantaziaj kreaĵoj, la sonĝo en siaj angoraj koŝmaroj, la dormomanko kun sia premega deliro neniam forĝis imagon tiel teruran kaj abomenindan:

XII

Ne estas lia vizaĝo tiu de la bonfara genio kiu protektas la princon. Tiu vizaĝo kies trajtoj oni vidas gravuritaj en harmoniaj lineoj kaj kuraĝaj aspektoj la noblan kuraĝecon, la sovaĝan kaj viran belon de la arbara dio, ne, la fizionomio de tiu nepolurita skulptaĵo, kiu nefinita

ankoraŭ sin prezentas antaŭ la okuloj de la terurigita Pulo, havas ion inferan kaj timegan: de siaj rondaj pupiloj ŝajnas tuj ŝpruci mortofulmo; sia ampleksa buŝo nuancas kruelan rideton; ĉio en ĝi spegulas la genion de malbono. Estas la figuro de Sĉivo kaj ne tiu de Viĉnuo. La senpacienco perdigis por ĉiam la malfeliĉan militestron.

XIII

Tiu ĉi, kaptita de forta impulso kaj elirante de sia pasiveco diras:

-Bramanoj, laŭtdiras, vekigu el via sonĝo; la espero pri feliĉo ankoraŭ en ni restanta malaperis kiel la parfumo de lilio kiun kisas samumo. Sĉivo venkis en la batalo, levu la idolon kiu lin reprezentas; alportu ĝin ĝis la altaro sur viaj ŝultroj je ritmo de cimbaloj; lia estos la templo de sia frato kaj kun li mia vivo.

XIV

La bramanoj kaj la servistoj de la princo kiuj respondis al lia voko, rapidis plenumi ties ordonojn. La estingitaj torĉoj relumis lumtorenton; la militistoj vundas siajn ŝildojn per la respektivaj glavoj; la raŭkaj eburkornoj forigas la dormon de la loĝantoj de Kattak, kaj la trista kaj impona sekvantaro kondukanta al la morto-dio kaj detruo iras al la giganta Pagodo, el kies sino oni aŭdis naskiĝi, kreski

kaj morti tremante en la malpleno, timemaj lamentoj kaj teruraj ridegoj. Estas la genioj de la detruo kiuj solenigas ilian venkon.

XV

La tago eklumas. La luno malaperas kaj la maro koloriĝas kun la unua lumo de la ektagiĝo. La templo helas lumigita en ĝia interno de centoj kaj centoj da bronzaĵoj kaj oraj lampoj. La blankaj nuboj kiuj leviĝas el altaroj dissendas la esencon de la mirho kaj aloo tra la ampleksa interno de la Pagodo. La princo ĉirkaŭis sian fronton per la flava ŝalo, emblemo de la suverena povo kaj kovrita de siaj plej riĉaj vestoj genuiĝis antaŭ la altaro.

La ceremonio per kiu la bramanoj petante la piecon de la genioj, donis la posedon al tiu de la morto ĉe la templo de Jaganata, finiĝis.

XVI

-Pastroj, militestroj, servistoj! diras fine la sinjoro de Oriso, la kolero de la dioj ŝvebas super niaj kapoj kvazaŭ glavo pendanta de haro; miaj manoj, kiuj de la terura horo kiam mi suprenis al la trono neniu mortonto vidis nudaj, estas sangomakulitaj. Vidu ilin; tiu ĉi sango estas tiu de mia antaŭulo, tiu de mia frato, kiun mi deprenis la vivon kaj la kronon. Sĉivo, la dio de la pento kaj de la purigo, postulas al mi okulon po okulo, kronon po krono, vivon po

vivo. Plenumiĝu lia volo. Pastroj, militestroj, servistoj: preĝu por la lasta el la Dhelioj, kies raso malaperas de la tero.

La homamaso, terurigita kaj plena de teroro restas en silento. Pulo sin turnanta al la altaro kie oni situis dion, daŭrigas laŭjene rigardante al la senforma idolo, kiu ŝajnas streĉi siajn lipojn per muta kaj infera rideto:

XVII

-Ŝĉivo, malamiko kaj ekstermanto de mia raso: se la sango povas forviŝi miajn kulpojn kaj apartigi vian koleron de la frunto de Siannah, akceptu ŝin kiel mia lasta ofero; sed ebligu al mi almenaŭ, ke antaŭ ol foriri el tiu ĉi mondo, mi vidu ŝin dum momento lastfoje; ke ŝia buŝo ricevu la fridan kaj estingitan spiron de la mia, ke ŝiaj kisoj fermu miajn palpebrojn al la eterna nokto de la tombo.

XVIII

La homamaso kiu okupas la templonavojn fiksas ŝiajn okulojn sur la princo kaj ekkrias kun hororo.

Pulo sin trapasis per sia glavo, kaj la varma bobelo da sango kiu ŝprucis de sia vundo saltis fumumante la vizaĝon de la genio.

En tiu momento, virino trapasas la atrion de la Pagodo, kaj avancis ĝis la interno kie situas la altaro de Ŝĉivo.

-Siannah! -murmuras la princo rekonante ŝin. -Siannah, finfine mi vidas vin antaŭ ol morti- kaj forpasas.

XIX

Siannah, la perlo de Ormuz, la violo de Oriso, la simbolo de la beleco kaj la amo, tiu kiu kreis Bermach dum plezura delirmomento, kombinante la ĝentilecon de la palmoj de Nepalo, la flekseblecon de la Gangojunkoj, la smeraldon de la okuloj de iu ŝĉivo, la lumon de diamanto de Golkondo²¹, la harmonion de somernokto kaj la esencon de sovaĝa lilio de Himalajo; Siannah, belulino el la belulinoj, sekvis al Pulo tra lia pilgrimado al tiuj nekonataj regionoj de kie neniu vojaĝanto revenas.

Siannah estis la unua hinda vidvino kiu sin ĵetis en la fajron kun la kadavro de ŝia edzo.

Gustavo Adolfo Bécquer forpasis en Madrido en 1870. Post lia forpaso siaj plej intimaj amikoj kolektis liajn manuskriptojn kaj unu jaro poste publikigis liajn duvolumajn “Verkoj”-n.

La amantoj de la pura Poezio revalorigis la prestiĝon de tiu ĉi granda poeto.

²¹ Golkondo: urbo preskaŭ en kompleta ruino, antikva fortikaĵo iam ĉefurbo de la regno Golkondo, vizitinda ĉar krom interesaj antikvaj artaj vidindaĵoj oni povas viziti la historiajn tombojn de antikvaj reĝoj.

La famaj diamantoj de Golkondo estis en tiu historia urbo tajlitaj.

Rosalía de Castro (1837-1885)

Brila poetino naskiĝinta en Santiago de Compostela en 1837. Ŝi estas sendube unu el la figuroj plej elstaraj de la Romantikismo en la galega kaj kastilia lingvoj, kies sentimentala lirikismo esprimas la persiston en Hispanio de la romantikisma skolo dum la dua duono de la 19a jc.

Ŝi edziniĝis al galega historiisto, Manuel Murgía, kaj la paro vivis tre ofte ekonomiajn hejmajn krizojn, eble pli penigaj ol la absoluta mizero. Aldoniĝis al tiu cirkonstanco nekalkuleblajn malfeliĉojn kaj malsanojn al membroj de la familio: la forpaso de la patrino kaj unu el la filoj de la poetino, kaj kiel sekvo propra malsano de Rosalía. Tio enorme influis en ŝia poezio, kiu mirinde sciis esprimi la intiman doloron de tiom da malfeliĉoj kaj la melankolion de pasintaj amaj rememoroj.

Cetere, ŝi havis tre akutan sentivecon, kaj tial, ŝi sentis kiel propran la problemojn de la galega gento: la mizeron de la malriĉaj kamparanoj kaj fiŝokaptistoj, por kiuj ŝi ĉiam montriĝis speciale solidara. Tiu privata dolora vivo, tristeco al sia gento kaj la ofta griza galega pejzaĝo, aperas konstante en la versoj de Rosalía, kiel oni povas konstati en jenaj versoj:

Spleno kaj mildec' baraktis

*dum tago de grizaj tonoj,
dorme pluvis kaj pluvadis
kun trankvila monotono...
Kaj dum larmoj mi ellasis,
mia bebo, freŝa rozo,
dorme pace li forpasis.*

Ofte, ŝiaj rememoroj venis al ŝi neelteneble kaj la sentoj
akompanataj de dolĉa nostalgio sin tradukis en amaj
versoĵ:

*Ci por mi, mi por ci...
Ci por mi, mi por ci, amo mia!,
Ni flustradis unu la alian:
-Amo estas ja esenc' de vivo,
"viv' sen amo ne ekzistas"...
Kiaj ĝojaj plenpasiaj horoj!
Kiel brilis suno en la koro!
Kiel nokt' susuris pro am-emocio,
belis tiuj horoj niaj!*

*Kiel dolĉaromas per gracio
ĉion kio saĝe kreis Dio,
ĝoje ni flustradis ardajn amajn dirojn:
"viv' sen amo ne ekzistas"...*

II

*Poste kiel efemera fulmo,
kiel tre rapida ventoflugo,
pasis amo...pura ĝu-esenc' de vivo,
sed sen am' ni ambaŭ vivas!*

*Mi de vir', ci de virin' alia,
ho, la viv' ja trompas revon nian!
Jam ne plu serenajn noktojn kaj pasion
ĝuos ni, dum vivo nia...*

*Ĉu ci, centa kverk' ankoraŭ tenas,
aŭ ci, rev-virin' la amon daŭre sentas?
Ne plu estas hor' de am' kaj idilioj.
Ne venas, kio ne vivas!*

*Ho, ne sentu ci melankolia
ĉar ekvenis griza vintr' humida.
Kantu ci kun forta voĉ' kaj harmonio,
kaj la neĝon tretu firma.*

*Amo, flam' senmorta, reĝ' de l'mond' fascina!
Mia adiaŭ' por ĉiam!*

Rosalía de Castro publikigis admirindajn verkojn: “La floro” (La flor, 1857), unua verko de poemoj; “Filino de l’

maro” (La hija del mar) kaj “Flavio” (Flavio, 1867) ambaŭ noveloj; “A mi madre” (Al mia patrino, 1863), libro de poemoj plene dediĉita al ŝia patrino; “Cantos gallegos” (Galegaj Kantoj) popularaj kanzonoj elvokante Galegion; “Ruinas” (Ruinoj, 1866) kaj “El caballero de las botas azules”(La kavaliro de la bluaj botoj, 1867), ambaŭ en prozo; “Hojas Nuevas” (Novaj Folioj, 1880), poemoj esprimantaj ŝian intimecon; ” (La unua frenezulo, 1881).

Fine, ankaŭ verkis libron en la kastilia lingvo “A orillas del rio Sar” (Ĉe l’ bordoj de rivero Sar, 1885), en kiu ŝi, en brilaj versoj konfirmas la turmenton de ŝia privata vivo, montrante klaran religian inklinon. Jen poemo el ĉi lasta menciita verko, en saĝa kombino de versoj dekunu kaj sepsilabaj, en kiuj ŝi esprimas ŝian galegan senton pri la Naturo: la verdaj pinoj kaj la maro en ŝia koro kaj en la pejzaĝo:

Ĉe l’ bordoj de rivero Sar

*La cindr-koloraj akvoj, nudaj arboj
kaj altaj montoj ankaŭ grizaspektaj;
ruĝbruna brumo kio ĉion kovras
kaj la nubar’ fluganta tra l’ ĉielo;
tristec’ kaj grizo sur la tero regas...
Kolor’ de maljuneco!*

*De temp' al tempo pluvo monotona
kaj branĉ-rumoro sonas;
tra l'arboj siblas vento
kvazaŭ tenera plendo
tiel profunda kiel kordolora,
ŝajne vokante triste la mortintojn.*

*Sekvata de l' ĉashundo frid-tremanta,
plugist', mantelo griza,
trairas la montar' per paŝo firma;
silentas la dezerto,
nur nigras la marcĉetoj inter herboj
de la ampleksa paŝtej' verd-intensa,
kie la blankaj mevoj halte knaras,
dum nigraj korvoj grakas.*

*De mia domfenestro,
Skurgĉita de senbribaj elementoj,
mi, ĝoja kaj pensema, plaĉe aŭdas
la aĉan brukoncerton
al mia kor' agraba...
Ho, plaĉa vintro-beno!*

*Milfoje estu vi bonvena, kara,
mia severa, sombra kamarado,
ĉu vi ne estas antaŭul' feliĉa*

de milda majo kaj april' festena?

*Ha! se la trista vintro de la vivo,
kiel vi de florar' kaj cefiroj,
anticipiĝus al printemp' eterna
de miaj revoj kaj plej bel-aspiroj!*

Rosalía de Castro signifas la renaskiĝon de la moderna galega liriko. Ŝi forpasis en 1885.

Manuel Machado Ruiz (1874-1947)

Manuel Machado naskiĝis en Sevilo kaj studis en la Lernejo pri Libera Instruado. Dum pluraj jaroj li loĝis en Parizo, kie li kontaktis kun la plej famaj poetoj de sia epoko, kaj ricevis la influon de parnasanoj kaj simbolistoj. Elstara poeto, li regas la koloron gracian kaj popularan de Andaluzio, kiun li majstre pentras per esprimoj elegantaj propraj en la modernisma skolo, sen artifikaj pitorekismoj, laŭ la tradicio de la plej antikva andaluza poezio. Tiu rafinata andaluzismo brilas en siaj verkoj “Cante hondo” kaj “Ars moriendi”.

Kunlabore kun sia frato Antonio, la delikata poeto de la intimaj "sonoraj solecoj" ambaŭ verkis ankaŭ teatron. Temas pri teatroverkoj kiuj pli elstaras per la lirikaj valoroj ol per la teatraj meritoj; el ili ni citu “La Lola se va a los puertos”, “Las Adelfas”, “Juan de Mañara”, k.a.

Li ankaŭ verkis belajn poemojn, unu el la plej interesaj estas tiu kiu priskribas la marŝadon de Don Rodrigo Díaz de Vivar, la fama “Cid Kampeador”, tra la kastilia stepo, kiam ekzilita de la reĝo forlasis Kastili-on kun siaj fideluloj, ĉar li mortigis nobelulon, ĝuste la patro de sia amatino Ximena, kiu dubis pri lia honoro. La reĝo Alfonso ordonis al siaj regatoj ne helpi Don Rodrigon...

Jen la poemo, kies versio aldonas lirikismon al tiu originala plena de dramaj nuancoj:

Kastilio

*Blindiga sun' rompiĝas
kontraŭ la duraj randoj de la armoj,
vundas per lum' la helmojn kaj kirasojn
kaj brule flamas sur la pint' de l' lancoj.*

*Blindiga suno, soifeg' kaj laco...
tra la terura stepo kastilia
al la ekzilo kun dudek kompanoj
-ŝvitego, polvo, fero- Cido rajdas.*

*Fermita estas la gastej', tutmuta.
Silent' respondas. Per la puŝ' de l' glavoj
kaj pinto de la lancoj la pordaĉon
ekcedas... Suno flamas. Vento ardas!*

*Al la teruraj batoj
kun raŭkaj eĥoj, pura voĉ' respondas
arĝenta kaj kristala...
Knabino tre fragila kaj tre blanka
aperas sur la sojlo.
Ŝi estas bluokula kaj eklarmas.*

*Orpalaj haroj nimbas
la dolĉan timvizaĝeton infanan.*

*“Eniru, bona Cid’. La reĝ’ nin buĉos,
detruos nian domon,
la kampon salos, kiun patro plugas
kaj faros ĝin senfruktan...
Foriru Cid’, vin benu la Ĉielo,
per nia perdo vi nenion gajnas”!*

*Silentas la knabin’...kaj milde ploras.
Infan-singulto l’ skadron korpremskuas
el bravaj kavaliroj,
kaj voĉo nefleksebla: “Marŝu!”, bruas.*

*Blindiga suno, soifeg’ kaj laco
tra la terura stepo kastilia
al la ekzilo kun dudek kompanoj
-ŝvitego, polvo, fero— Cido rajdas.*

Ne tiel okulfrape bela, sed certe delikate ĉarma, estas tiu
ĉi poemeto plena de logaj rebriloj:

Diras la fontano...

Ne, ne silentis la fontano,

*ne silentiĝis...
Ĝi ridis,
saltis,
babilis... Kaj neniuj sciis
kion ĝi diris...*

*Klara, gaja, polifonia,
salomona koloneto
traboris
la silenton de okcidento,
kaj, babilema, erektiĝis
por vidi la sunon forpasantan.*

*Ne, ne silentis la fontano,
ne silentiĝis...
Kiel noktovejnoj
traborilo,
frida arĝento,
longiĝis
kaj mallongiĝis...*

*suprenis
kaj malsuprenis,
babilis... kaj neniuj sciis
kion ĝi diris...*

Kiam la aŭroro revenis.

La lumo milda kaj la koloro de la poezio de Manuel Machado kaj lia stilo kolokva kiun li iniciatis, vivos eterne en la koro de ĉiu amanto de la Poezio!

Antonio Machado Ruiz (1875-1939)

Naskiĝis tiu ĉi granda poeto en Sevilo en la jaro 1875, sed translokiĝis baldaŭ al Madrido kun la tuta familio, kiam li estis nur okjara, tuj post lia avo estis akceptita kiel katedra profesoro en la Centra Universitato.

Li edukiĝis en la Institucio pri Libera Instruado, prestiĝa pedagogia lernejo fondita en Hispanio (1876-1939) de kraŭsismaj profesoroj, kontraŭaj al la instrumentoj uzitaj tiam en la oficialaj medioj. La nova ne-ŝtata lernejo celis modernigi la hispanan socion per la edukado.

Baldaŭ la juna Antonio montris sian inklinon pri beletro, specialan kapablon por literaturi kaj komencis kunlabori en fakaj revuoj. Lia poezio estas, esence simpla, kaj lia metriko spegulas preferon por la rimo asonanca. Li penetrigas siajn versojn per ĉarma melankolio kaj profunda emocio, kaj forigas el ili ĉiajn ornamajn elementojn kaj brilajn metaforojn. Oni povas diri, ke li atingas idealon pri poezio, konsistantan en ĝia prezento nuda je pitoreskaj rebriloj, montrantan per apenaŭ percepteblaj rimo kaj ritmo la belecon de la konceptoj, kiujn li volas esprimi.

Jen unu el la poemoj klare montranta la karakterizojn menciitajn:

*Nokte, kiam mi dormadis,
Songîs mi, ĵho iluzi!
ke fontan' akvo ŝprucis
en la korintern' de mi.*

*Tra kiu sekret-kanalo
akv', vi venas tien ĉi,
font' de nova ekzistado
ne gustumita de mi?*

*Nokte, kiam mi dormadis,
Songîs mi, ho iluzi!
ke abelaron mi havis
en la korintern' de mi;
kaj l' abeloj orkoloraj
tie faris kun kontent'
vakson kaj mielojn dolĉajn
el malnova kortristec'.*

*Nokte, kiam mi dormadis,
songîs mi, ho iluzi!
ke ardanta suno flamis
en la korintern' de mi.
Ĝi brulumis ĉar ricevis
varmon el amora vibr',
estis suno ĉar lumegis*

kaj incitis al fascin'.

*Nokte, kiam mi dormadis,
songis mi, ho iluzi'!
ke la propra Di' sin kaŝis
en la korintern' de mi.*

La poemoj sen retoriko de Machado montras ankaŭ intimisman poezion; li konfesas: "mi ĉiam konversacias kun la homo en mi mem akompananta", cetere, li filozofias pri si mem kaj konstante dialogas kun sia epoko, kun ĉiuj elementoj kiuj lin ĉirkaŭas: kun la fontano, kun la aŭroro, kun la vento, kun la nokto, kun la ulmoj kaj precipe kun sia koro... kiel en tiu ĉi poemo:

*Estis certa nokt' de Majo
obskurblua kaj serena...
Sur l' akuta cipresalto
brilis luno beloplana
lumigante la fontanon
sola en la nigro densa,
el ĝi ŝprucis kristalakvo
kun sonado tre kadenca.*

*Poste, kanton oni aŭdis
el kaŝita najtingalo...*

*Skue rompis forta vento
l' akvokurbon de l' fontano.*

*Kaj mildega melodio
vagis tra l' ĝarden' de l' parko,
kiun muzikist' eltiris
per la violon' kaj arto.
Estis tiu son' lamento
el juneco kaj el amo,
el la luno, el la vento,
el l' akv' kaj el najtingalo...*

*Havas la ĝarden' fontanon,
kaj fontan' sonorhimeron,
voĉ' aŭdigis dolorkanton,
naskesprimo el printempo.
Voĉ' lamenta ekmutiĝis.
El la violon' silenta
restis nur melankolio
en la noktonigr' senstela.*

*Nur aŭdiĝis melodio
el fontano kapricema.*

Cetere, li ne emis frekventi kunvenojn, nek la bruon
societan vivon de la tiamaj poetoj, bohemianoj kaj artistoj:

modesta, sincera kaj ĝisfunde honesta, li sentis la belecon de la longaj silentoj, la emociion de la intimaj solecoj, la profundan alrigardon de interna mondo plena de lirikaj eĥoj, kiuj pli bone respondis al lia koncepto pri poezio, kiun li difinis kiel “profundan tremetblovon de la spirito”...

Kiam A. Machado estis 34-jara, li alvenis unuafoje al Parizo, kie li laboris dum kelkaj monatoj en la eldonejo Garnier, tempo, kiun li profitis por interkonatiĝi kun elstaraj intelektuloj tiuepokaj: Pio Baroja, Gómez Carrillo, Oscar Wilde, Jean Moreas, k.a., sed post kelkaj monatoj li revenis al Hispanio por daŭrigi siajn studojn, kaj ne post longe publikigis siajn poemojn en la modernisma revuo “Electra” apenaŭ ĵusfondita.

En 1902 Antonio Machado vizitas duafoje Parizon, kie li konatiĝis kun la fama sudamerika poeto Ruben Dario. Ambaŭ poetoj tuj sentas reciprokan simpatian, kaj Antonio verkas belan poemon omaĝe al Ruben esprimante sian admiron “al tiu nobla poeto, kiu aŭskultis la vesperajn eĥojn kaj la aŭtunajn violonojn de Verlaine”...

Ruben respondis la omaĝon pentrante per neimiteblaj versoj fidelan portreton de Antonio. Mi ne povas eviti la tenton reprodukti por niaj legantoj la poemon, ĉar per tiaj versoj vi perceptos pli trafan bildon pri Antonio, ol se mi

skribus paĝojn kaj paĝojn. Ruben desegnis tiel la portreton:

*Silentema kaj mistera,
li ekiris kaj revenis,
lia rigardad' serena,
tiel penetrema estis,
ke ĝi iĝis nevidebla...*

*Li parolis kun akcento
de timema hom' fiero,
kaj la hel' de lia penso
lumis tiel perceptebla,
ke sensacon oni sentis
vidi en la mens' pensema
bruli sian idearon
el talenta hom' bonega.*

*Certe paŝtus li leonojn
kun ŝafidoj harmonie.
Same li kondukus ŝtormojn
ĝis pacigi ilin fine.
La sekretojn el la amo
kaj plezurojn el la viv',
kantis li per helaj versoj,
kies art' nur mastras li!*

*Rajde sur Pegazo rara
venis li el infinit'.*

*Mi preĝas por Antonio
ja la dioj gardu lin!*

Je la fino de la ĵus indikita jaro, nia poeto publikigas sian unuan verkon “Soledades” (Solecoj), pri kiu Juan Ramón Jlménez diris:

“Libro de aprilo, amara kaj blua, plena de karesantaj brizoj, de fontomuzikoj kaj aromoj el lilioj. Por ke nia spirito alproksimiĝu al Okcidento karesata de tiu ĉi liro, kiu havas la tutan antikvan melankolion kastilian de la koploj de Don Jorge Manrique kaj la belan riĉan ritmon diamantan de la romancoj de Gongoro”.

La vivo de Antonio vibras en la intima kolokvo de siaj versoj: pri ĉiu momento kiun li vivis oni trovas signifoplenan versaĵon kantanta ĝin...

*En mia infanaĝo estas kort' en Seviljo
kaj klara horto, kie la citron' maturiĝas.
En mia junec', dudek jaroj en Kastilio
kaj mia viv': kazoj kiujn mi ne eksplikas.*

Kaj kiam forpasis lia profesoro, la fama pedagogo Francisco Giner de los Rios, gvidanto de la Institucio pri

Libera Instruado, kie li studis, Machado dediĉas al li kortuŝajn versojn:

*Forpasis en l' ektagiĝa lumo
nia kara, la Majstro amata.
kiu imagis por Hispanujo
kleriĝon kaj reflorigon grandan.*

*Alportu lian korpon al suno!,
amikoj, al la montaro alta,
al la montoj kun verdoj kaj bluoj
de l' ampleksega Guadarrama,
kie en la abismoj sen fundoj
la verdaj pinaroj rave kantas... ktp.*

Eminentaj esperantistoj tradukis la poemojn de Machado, inter ili mi elstarigas la tradukojn de Fernando de Diego: “Memportreto”, “Kiam mi dum nokto kuŝis”, “Pri nia propra koro”, “Proverboj kaj koploj” k.a.

El ĉiuj ili al mi speciale plaĉas jenan tradukaĵon:

Al seka ulmo

*Al ulmo duonputra kaj maljuna
kiun la fulmo vundis,*

*l' aprilo pluva kaj la majo suna
iomon da folioj verdaj pruntis.*

*La multejara ulmo sur ter-ŝvelo,
kiun Duero lekas! Musko flava
makule kuŝas sur la griza ŝelo
de l' polvo-plena trunko preskaŭ kava.
Malsame ol en poploj bird-jubilaj
starantaj ĉe la vojoj, ĉe l' rivero
en l' ulmo mankas najtingaloj trilaj. Ktp.*

Pri la travivaĵoj de Antonio Machado en Soria, la plej intense vivitaj en la ekzistado de la poeto, li verkis multnombrajn poemojn, kiuj plenigas ĉiujn Antologiojn de la moderna hispana Poezio, sed la forpaso de la amata edzino, la juna Leonor, estis terura bato por li, tiel drame sentita, ke li eĉ intencis mortigi sin, kiel letere li konfesis al sia amiko Juan Ramón Jiménez, sed en sama letero li aldonis: “se ian forton mi havas, mi deziras profiti ĝin, estas ja necese defendi tiun Hispanion ŝprucantan kontraŭ la mortinta maro de tiu alia Hispanio inerte kaj pasiva, kiu minacas dronigi ĉion...”, sed li ne povis eviti rememori dolorajn scenojn de l' pasinto kaj la amatan edzinon, kaj denove la versoj esprimis tiujn suferojn, kiam li skribis:

*lun somernokton varman
estis la balkon' aperta
same kiel la domopordo,
ĉar la nokto estis reva.*

*Venis ĉe mi ja la Morto
sen dediĉi min rigardo
ion rompĉis ŝin ĉe l' koro
per terura fata mano.*

*Sen apenaŭ pri mi zorgi,
pasis antaŭ mi la Morto,
kion faras vi?, mi diris.
Morto donis nek respondon.
Mia kara pace restis,
mi kun akra kordoloro,
ho, ve! kion Morto rompĉis
estis lig' de niaj koroj...*

Scivola pri ĉio, kio koncernas la scion, Machado studis filozofion kiel lernanto en Parizo de la famaj profesoroj Bergson kaj Bedier, kaj en Hispanio doktoriĝis pri beletro kaj filozofio. Dum multaj jaroj li instruis la francan lingvon kiel gimnazia instruisto. Li ne nur teoriis sed pragmata homo li filozofieme konkludis ke la vera vojo ne estas tiu kiun ni projektas, sed tiu kiun ni mem realigas per nia

propra agado, kaj li tion diris per siaj versoj en ĉiu cirkonstanco pli aŭ malpli malfacila kiun li vivis:

*Padiranto, viaj spuroj
estas ja la nura pado.
Ne ekzistas pad', marŝanto,
iĝas ĝi dum ekmarŝado.*

*El ekmarŝo iĝas vojo
kaj tuj ĉe retrorigardo
padon oni jam perceptas,
kiun ni ne plu repaŝos.*

*Ne ekzistas pad', marŝanto,
nur helstrioj sur la maro.*

Fidela al la idealo demokrata, kiun li ensuĉis infanaĝe en la Lernejo pri Libera Instruado, li neniam ĉesis strebadi al popolaj aspiroj: li estis unu el la malmultaj respublikanoj kiuj hisis la trikoloran flagon en la urbodomo de Segovia ĉe la alveno de la Dua Respubliko en 1931. Li kunlaboris efike en la fondo de la Popola Universitato de Segovia, organismo neoficiala kreita por eduki nur laboristojn, kaj fine, dum la intercivitana milito li batalis per sia plumo defendante demokration en Madrido, en Valencio, en Barcelono, ĝis la fino.

Antonio Machado estis proklamita akademiano de la hispana lingvo, sed neniam li legis sian protokolanan diskurson, kiu devus investi lin kiel membron de la Akademio. Kunlabore kun lia frato Manuel li verkis plurajn teatraĵojn, dramojn kiuj sukcesis, kian ili estis publike prezentitaj.

Li estas ankaŭ aŭtoro krom de la menciita “Solecoj”, de “Kompleta Poemaro”, “Elektitaj Paĝoj”, “Novaj Kanzonoj”, “La Milito”, “Antologio lirika” k.a.

La poeto de “la sonora soleco” kaj la “intimismaj kolokvoj” estis modesta sincera homo neŝatanta de pompoj aŭ solenaĵoj. Li forpasis en Collioure, en 1939, sola antaŭ la maro, kune kun tiu hispana popolo ekzilita, kiu batalis kontraŭ la reakcio ĝis la fino.

Kaj kiel li profetis en sia poemo “Memportreto” li renkontiĝis kun la morto kiel li deziris:

*Kaj kiam venos la lasta vojaĝotago,
kaj la ŝip' senreturna estu jam preta,
vi trovos min samkiel filojn de l'maro:
decidoplena, preskaŭ nuda, leĝera...*

Ne estas facile forgesi tian eksterordinaran grandan poeton!

Ricardo León y Román (1877-1943)

Akademiano de la hispana lingvo. Elstara verkisto naskiĝinta en Barcelono, aŭtoro de poemoj, eseoj kaj noveloj. Liaj unuaj romanoj “Casta de hidalgos” (Kasto de hidalgos, 1908), “Alcalá de los Zegries” (Alcalá de Zegrioj, 1909), “El amor de los amores” (L’amo el l’ amoj”, 1910) jam senerare esprimas la tendencon de la verkisto por temoj historiaj kaj formale tradiciaj de la hispana beletro, sen tro alta eskvizita nivelo kaj konstatebla arkaika leksiko. Li ofte uzas okulfrapajn bildojn, kiuj momente impresas, sed kiam ĝi daŭras lacigas kaj ĝenas la leganton.

Lia poezio rangas inter la unuaj de la fino de la pasintjarcento kaj komenco de la nuna. Jen bela soneto en kiu montras lian talenton:

Ŝi havis bluajn okulojn

*L’ okuloj bluaj de l’ ĉiel’ envio,
La blondaj bukloj brilaj kiel oro,
Rideto dolĉa kiel anĝelploro,
Lipetoj fajraj kaj ĉe l’ kor’ glacio.*

Ŝi estis ĉe mi ĝojo kaj gracio,

*Afabla katinet' kaj gajtintilo,
Dum nokto estis ŝi sorĉmuzikilo,
Najtingalkant' printempa, lunradio.*

*Ombroj kaj dornoj, fine amarsentoj,
Ungegoj akcipitraj, inferflamo,
De sango ruĝa la eburaj dentoj.
Ŝiaj logbukloj, kaptoŝnur' de amo,
Kun l'okulblu' penetris en silentoj
Kaj mian koron vundis por ĉiamo.*

Liaj versoj esprimas plejofte tiujn reagojn temperamentajn kaj primitive pasiajn de la popola homo nialanda antaŭ certaj krizocirkonstancoj, en kiuj la koro fortas pli ol racio, kaj la sentoj kreas situaciojn violentajn en kiuj streĉaj scenoj de amo kaj morto fariĝas neelteneblaj, simile kiel en jena poemo:

Ĝojoj kaj malĝojoj el Amo

*Vidu hirtan mian haŭton
nur je via ekelvoko...*

*Supren tra la gorĝo mia
Venas, freŝan, sango-rojon
el la vundo trapasanta*

*mian tutan ardan korpon.
Vundas najloj miajn manojn
kaj la fingrojn akraj dornoj
gratas miajn temporalojn
nigraj pingloj kvazaŭ krono.*

*Vidu mian haŭton hirtan
tuj post mia ekmemoro
ke mi estas edziĝinta
sed mi amos vin ĝis morto.*

*Inter ambaŭ domoj niaj
staras mur' el muta sono,
de urtikoj, opuntioj
kaj tre agresemaj dornoj,
de kalk-blanko, vent' kaj sablo,
lonicerroj el verd-frondo
kaj disitaj vitro-pecoj
sub la brilo el sunoro.*

*Muro tute nesaltebla
pro decid' de nia volo
kontraŭ homoj scivolemaj
kaj murmuroj el popolo.*

Kaj mi scias l' amon vian

*kaj vi mian am-fervoron,
kaj ni tutkore nin amas
sed neniŭ ĝin scipovos.*

*Ho puno, puneto nia
de nia silent-amoro!
Ho, kiom al mi doloras
ami vin kun ĝoj-malĝoj!*

*Kiam mi tutsola restas
pensanta pri vi dum nokto,
saltus mi la altajn murojn
separantaj niajn dormojn,
rompus mi per miaj manoj
vian feran antaŭpordon,
nur por resti kune al vi,
ho, turment' el turmentformoj
kaj mi kiskus vin senlace
ĝis forpren' el spiro-movo,
kaj poste... mi ne bedaŭrus
eĉ trovi kun vi la morton!*

*Nia amo estas timo,
agoni', dolor' kaj ploro,
vivo, morto kaj sufero,
suno, luno kaj ventoblovo.*

*Estas ĉiupase morti
kaj plu vivi la angoron
de pendanta glavo-klango
minacante de l' plafono.*

*Mi el mia dom' eliras
tutsola al verda horto
nur kun la obseda celo
palpi kun sentiva ĝojo
la naztukon tuŝo-dolĉan
kiun perdis vi dum nokto
kaj mi diris vin neniam,
ke mi trovis ĝin kun sorto!*

*Kaj mi ĝin manpremas plaĉa
kiel flavan nov-citronon,
palpas la inicialojn
kaj ripetas vian nomon
en silento absoluta
por ke sciu eĉ ne l' horto
kiom mi vin ege amas,
ho vi, mia am-trezoro!*

*Hieraŭ ĉe "Placo Nova",
zorgu pri ne plua fojo!*

*mi vin vidis arde kisi
mian filon kun ambolo,
kaj kiel vi tion faris,
ho, Virgino de l' Konsolo!
ke la unua kis' ĝi estis
de nia frenez-amoro.*

*Mi tuj kuris mian hejmon
kun impet' kaj firma volo,
mian filon levis alten
kaj sen ies hom-riproco,
kvazaŭ firabist' dum rabo,
vian kison kun fervoro
de la papavet-vizaĝo
mordis mi kun franda voro.*

*Nu, ne gravas l' okazaĵo!
eĉ se falus la terglobon!
kvankam en abism' senfina
falos mia am-trezoro,
kaj mem se insidaj homoj
tretos aĉe niajn nomojn
aŭ prezentos l' amon nian
samkiel am' el monstroj...
vi, volu min ami ĉiam,
ho turment' el turment-ĝojoj!*

*Ho, kiom al mi doloras
ami vin kun ĝoj-malĝojo!!*

Verkisto kun profundaj konvinkoj konservativaj, post la intercivitana hispana milito, li verkis denove pri temoj laŭdantaj la historion kaj hispanajn tradiciojn kun karakterizoj tre similaj al tiuj noveloj, kiujn li verkis en siaj unuaj tempoj, ni citu inter ili “Cristo en los infiernos” (1943) (Kristo en l’ inferoj), sed en tiuj noveloj malaperas lia lirikismo kaj temperamentaj pasiaj esprimoj kaj eĉ certa kultismo, kiuj, miaopinie, estis liaj plej valoraj beletraj kvalitoj.

Li forpasis en Madrido en 1943.

Francisco Villaespesa (1877-1936)

Teatroverkisto kaj poeto naskiĝinta en 1877 en Laujar de Andarax (Almerio), vilaĝo sur deklivo de Sierra Nevada, ne tro malproksima de la bela Granado. Kiam apenaŭ li estis 20-jara translokiĝis al Madrido, kie post unu jaro publikigis sian unuan verkon "Intimidad" (Intimeco).

Bona amiko de Juan Ramón Jiménez en la hispana ĉefurbo, li senkondiĉe admiris Ruben Dario-n, kies estetikajn ideojn li disvastigis en Hispanio kaj Ameriko. En 1911 li komencis sian sukcesan taskon kiel teatroverkisto per "El alcazar de las perlas" (La alkaŝaro de la perloj), verkante prefere per versoj kaj pri historiaj temoj, aktivado kiun li alternigis kun la verkado de poezio. En 1917 li vojaĝis al Ameriko, kie li vigle aktivis kun Sud-Amerikaj verkistoj kaj poetoj.

Lia stilo modernisma ankoraŭ havis tiun romantikisman, ĉar en ĝi aperis la influo klara de la sonoraj esprimoj kaj inklino de Zorrilla por la orientalismaj kaj prihispanaj temoj. Famigis lin rapide liaj poeziaj verkoj:

"La Musa enferma" (La Muzo malsana, 1901); "El jardin de las quimeras" (La ĝardeno de la ĥimeroj, 1909); "Los remansos del crepúsculo" (La krepusko-stagnoj, 1911); "Ajimeces de ensueño" (Revoaĥimezoj, 1914); "Bajo la sombra de los cipreses" (Sub la ombro de la cipresoj,

1917); “La gruta azul” (Blua groto, 1918); “Tierra de encanto y maravilla” (Mirinda kaj ĉarma tero, 1921), kaj multaj aliaj, kiuj logis pro la brilo de la muzika esprimo de iliaj romantikemaj enhavoj, kvalito konstatebla ankaŭ en liaj poemoj. Jen unu el ili:

*Leviĝas preĝo el izol-ĝardeno...
Forflugas paŝoeĥoj ĉe la padoj,
kaj l' arbo-ombroj laŭ fantom-ondado
sur kristal-lagon falas kun ekstremo.*

*Ĉe l' parko-fon' en romantika spleno
kaj ŝancelanta skalo da korbatoj,
fontan' disĵetas polv' el diamantoj
sub pala lunolum' en milda sveno.*

*L' animo de Chopin' solec-inklina
esprimas triston per lirika ploro,
malsana pro tro da kares' virina.*

*Dormiĝas lasta pian-not' sen gloro.
Ĉe l' parkofrondo mortas kant' proksima,
ja najtingal' tremkantas kun langvoro.*

Villaespesa spegulis per sia konduto tute fremda al societaj konvencioj, la bildon de certa mita bohemia

modernisna vivmaniero, kaj dum jaroj abunde verkadis ne nur originale, sed ankaŭ malvolvis gravan tradukan taskon.

Logita de la brila stilo de tiu ĉi verkisto, J. Grau Casas tradukis al Esperanto pecojn de unu el la plej karakterizaj verkoj pri orientstila temo de la verko Aben Humeja (Ibn Omajo). Jen unu el ili, situante la scenon ĉe la Alhambra palaco de Granado:

La fontoj de Granada

Alhamar: Mia poet', kion portas?

Abü-I-Beka: Sinjor', floron kaj kasidon.

La flor' el viaj ardenoj

kie ĝi tremis feliĉa,

kun la granda fierec'

povi ravi vian vidon.

Kaj se vi donas permeson,

kiun ŝi petas humila,

Sobeya, ja la plej bela

el Granadaj sinjorinoj

antaŭ via bril-kortego

recitos mian kasidon...

Kasidon al la fontanoj

de via urb' favorata.

Alhamar: Mi danke la floron prenas
sed ni aŭdu la kasidon.

Sobeya: La fontoj de Granado...
Ho, admiro!

En la nokto, kun steloparfumado,
ĉu io pli doloras ol ilia ĝem-spiro?
Ĉio ripozas kun plej rava sento
en l'arĝento fluida de la luno.

Ĉe l'odoro je nardoj sentebla tra la vento
akvo-freŝeco estas kiel unu
mano refreŝiganta tempioj por momento.

La akvo estas kvazaŭ urbo-anim'. Ĝi viglas
dum ĝia dorm', kaj flustre
rakontas de l'silento
la legendojn vivantajn malgraŭ forges-doloro,
kaj sub la brilaj steloj de la nokto trankvila
ĝi havas ja pulsadojn de disŝirita koro.

La akvo-voĉo sanktas!
Kiu trafas l'akcenton, fundan muzikon ĝian,

iam povos kompreni ankaŭ parolon dian...
Di' per la akvo-guzlo siajn misterojn kantas!

La fontoj de Granado...

Ho, admiro!

En la nokto, kun stelo-parfumado,

Ĉu io pli doloras ol ilia ĝem-spiro? ktp.

Francisco Villaespesa krom traduki multnombrajn verkojn kaj abunde originale teatroverki, ankaŭ publikigis multajn interesajn rakontojn, el ili ni citu: “Los suaves milagros” (Mildaj mirakloj); “La tela de Penélope” (La Penelopa ŝtofo); “Zarza florida” (La floranta rubusujo); k.a. Bedaŭrinde li ne montriĝis tro rigora pri siaj verkoj, sendube tre abundaj, kaj tial li verkis kune kun belegaj poemoj aliajn ne tiel bonajn, pri kies kvalito oni povus postuli pli altan nivelon. Vere profundo-senca kaj samtempe lirika estas jena poemo de Villaespesa:

Finiĝo

Perdiĝis mi en nigra kaj korprem-silento.

Envolvas la mistera nokto mian vojon,

la ombroj ne ricevas gapon aŭ hund-bojon

nek oni aŭdas et-murmuron el la gento.

*La kor' ne batas, ne perceptas, sen aŭd-sento
la lant-pasadon sur la padoj plian fojon...
Kiu ja scias ĉu finiĝ' signifas ĝojon
kaj l' obskureco propra forges-evidento!*

*Sen senti kaj sen pensi... estas mi pli morta
ol tiuj kiuj kuŝas en marmora tombo.
Kaj estas mi en ĉi arida sabl-dezerto
la revo el anim' for de ĉi tiu mondo,
kiu, tre laca marŝi sur la ter' sen lerto
revenas al mistera mond' nenio-forma.*

Francisco Villaespesa forpasis en Madrido en la jaro
1936.

Fernando Villalón (1881-1930)

Fernando Villalón, grafo Miraflores de los Angeles, naskiĝis en la jaro 1881, en la bela Seviljo. Kiel poeto, elstara kaj sentiva, li sciis majstre kanti la belecon kaj pitoreskecon de sia tero, kaj enprofundiĝis en la andaluzajn temojn kaj folklorajn motivojn.

Komence, li estis forte influita de la tiama gongorismo, stilo reganta dum lia unua epoko de poeto, sed iom post iom li evoluis al plej modernecaj kaj avangardaj kriterioj, kies rezulto estas poezio malpli efekta kaj brilkolora, esprimo pli intima kaj delikata, kaj stilo pli rafinita kaj propra. Li estis intime ligata al la tiel nomata “generacio de 27a” kun kies figuroj li tre ofte kontaktis kaj sin sentis identigita.

Jen poemeto en kiu oni povas admiri tiujn menciitajn delikatajn kvalitojn:

Seviljana kaprico

*La strateto estas vundo
kalke-lume kuracita...
ludas kun rozuj’ la suno
en fenestro florvestita.*

*Invitas al preĝ' siesto,
l' akv' preĝante eterniĝas,
en silenta kort' surprize
kriis rozo eskvizita,
kaj sur kristalpura fonto
rave bela roz' sin klinas...*

Fernando Villalón publikigis plurajn verkojn, el kiuj ni substrekas kiel plej gravajn: “La malsupra Andaluzio” kaj “Romancoj de la 19a jarcento”.

Li forpasis en Madrido en la jaro 1930 kaj elstaris kiel granda poeto en sia eksterordinara generacio de bonegaj poetoj.

Juan Ramón Jiménez (1881-1956)

Nakiĝis tiu ĉi granda poeto en Palos de Moguer, en 1881 kaj studis Juron en Sevilo, sed baldaŭ li lasis tiujn studojn por plene sin dediĉi al beletro. En la jaro 1900 li vojaĝis unuafoje al Madrido, kie li konatiĝis kun la elstara poeto Ruben Dario kaj la verkistoj Valle Inclán, Villaespesa, fratoj Machado, Martinez Sierra k.a.

Baldaŭ li publikigis siajn unuajn lirikajn provojn...Siaj unuaj verkoj “Rimoj” (1902), “Tristaj Arioj” (1903) kaj “Lontanaj ĝardenoj” jam estas esprimo pri granda sentiveco kaj anoncas la aperon de eksterordinara poeto

En li konverĝas la plej purajn esencojn de la Romantikismo kaj la Modernismo, sed li sentis tiel nebremseble la alvokon por la poezio, ke li vivigis ĝin ene de si mem en konstanta evoluo kaj perfektigo, ĝis atingi unu el la ekzemploj pri lirika kreado plej altaj de ĉi epoko: la poezio pure emocia de siaj komencoj, kiel tiu pli intelekta kaj abstrakta de sia matura aĝo oni povas konsideri kiel rezulto de lia konstanta strebado por trovi la absolutan belecon kiun li aspiris... Ni speciale devas substreki lian lirikan prozon en “Platero kaj mi”. Libro de poemoj profunde humanaj, naivaj kaj emocie lirikaj, antaŭ longe mondfama.

La poezio de Juan Ramón estas delikata, luma kaj simpla samtempe. Li perceptas kaj scias esprimi la plej subtilajn nuancojn el koloro kaj la sono, la aromon de la kampoj kaj la varian lumon de ĉiu momento. Li kantas la internajn sentojn de l' homo, kaj la pejzaĝon, tiamaniere bele, ke legante tiajn priskribojn oni sentas nedifineblan sensacon kvazaŭ temus pri beleco netuŝebla, tiel ideale kaj ĉarme li esprimas tiujn sentojn.

Mi elektis kiel ekzemplon unu el tiuj poemoj, per kies versoj oni tuj perceptas tiujn ecojn kiujn mi ĵus indikis:

*Kantis la paŝtist' revema
kun surŝultra hokbastono
kaj la pinojn rigardadis
ĉe l' lontana horizonto.*

*La brutar' duondormanta
levas nubojn da denspolvo
kaj kolsonoriloj ploras
sub brilanta lum' el oro.*

*Dista valvilaĝo ŝvebas
kvazaŭ blanka nuboformo,
ĉio revas sub la suno
kaj inklinas al langvoro.*

*Absorvita en la brumo
malaperas ĉarma roĵo,
paca blinda sent' profunda
vibras en la fund' el koro.*

*Blanka nuboj milde ŝvebas.
Restas val' en pacizolo.
Sub l' arĝent' de sorĉa luno
sonas sonorila ploro...*

En ĉiu granda poeto aperas la ideo pri morto pli-malpli intense, Juan Ramón verkis plurajn poemojn pri tiu temo kun granda beleco, kiel ĉi tiuj:

*Kion al muzik' okazas
kiam ne plu sonas?
Kion al la milda brizo
kiam ne plu blovas?
Kion al la lum' se nigro
helojn tuj envolvas?*

*Diru Morto, ĉu ne estas
resti tutsenmova,
en eterna nigra premo,
en silent' angora?*

Al tiuj belegaj lirikaj versoj oni povas aldoni tiuj de "La definitiva vojaĝo" tiel belaj kiel la antaŭaj versoj, el lia libro neeldonita "Poemas Agrestes" -1910-1911- ("Ruraj poemoj"):

*Kaj mi foriros... kaj restos la birdoj kantantaj!
Kaj restos mia horto, kun sia verda arbo kaj sia puto
blanka.*

*Ĉiuj vesperoj la ĉielo estos blua kaj plaĉa,
kaj sonoros kiel sonoras ĉi-vespere
la sonoriloj de la sonorilturo...*

*Mortos la homoj min amantaj,
kaj la vilaĝo iĝos nova ĉiujare.
Kaj en tiu flora kaj kalkita angulo de mia horto,
mia spirito vagos nostalgie...*

*Kaj mi foriros, kaj mi solos, sen hejmo,
sen arbo verda, sen puto blanka,
sen ĉielo blua kaj plaĉa...
malproksima de la vilaĝa tumulto,
surda kaj rara de la finita dimanĉo...*

Kaj restos la birdoj kantantaj!

Kiam eksplodis la intercivitana hispana milito en 1936, Juan Ramón Jiménez forlasis Madridon kaj forveturis al Ameriko, kie li definitive loĝos. Tie li deklaris: “Mi ne estas politikulo, mi estas ja poeto, sed miaj simpatioj favoras la personojn kiuj reprezentas la kulturon kaj la hispanan spiriton; ili estas tiuj kiuj proklamis la respublikon en Hispanio. La registaro ekzistanta kiam mi eliris el Madrido, rajtis/as regi nian landon kaj esti respektataj kaj helpataj, ĉar ĝi estis leĝe balotita kaj reprezentas la popolan volon”.

Juan Ramón Jiménez neniam revenis en Hispanion, kaj forpasis ekzilita en Puerto-Rico. En 1956, du jaroj antaŭ lia forpaso li ricevis la Nobelpremion.

Pedro Salinas Serrano (1891-1951)

Li naskiĝis en Madrido la jaro 1891, kaj laŭlonge de sia vivo montriĝis kiel talenta homo: elstara poeto, eseisto kaj kompetenta docento en gravaj Universitatoj.

Li studis Juro kaj Filozofio-Beletro, kaj kiam finis tiujn karierojn doktoriĝis en la Sorbono de Parizo pri Beletro kaj tie funkciis kiel lektoro de la hispana lingvo, kaj ankaŭ faris meritoplenan profundan studon kaj tradukon de la verkaro de Marcel Proust.

En 1918 gajnis la katedron pri Lingvo kaj Literaturo en la Universitato de Sevilo, kie li instruis, kaj poste pasis kiel docento al la Universitato de Murcio.

Dum longa periodo li multe vojaĝis tra Eŭropo kaj Nord-Afriko kaj dum la jaroj 1922-1923 li estis lektoro de la hispana lingvo en la Universitato de Cambridge, kaj ekde 1926 instruis en la Madrida Universitato, kie li fondis la revuon "Indice Literario" (Literatura Indico).

Malgraŭ tiu intensa aktivado kiel docento kaj esplorado pri klasika liriko, li komencis verkadi poezion kaj eseojn, kaj en la jaro 1923 publikigis sian unuan libron "Presagios" (Aŭguroj), en kiu estas konstatebla la influo de la stilo de Juan Ramón Jiménez: poezio emociiga envolvita en intelektaj nuancoj vere laŭdindaj, kiuj ankaŭ

aperas en sia sekvanta libro "Vispera del gozo" (Hieraŭ de la ĝuo) verko pri rakontoj redaktita en poetika prozo. Estis dum tiuj tagoj kiam li komencis kunlabori en la prestiĝa "Revista de Occidente" (Revuo de Okcidento). De 1925 estis lia versio "Poema del Cid en romance moderno" (Poemo de Mio Cid' en moderna romano). Lia alta nivelo kiel poeto dum tiu epoko oni konsideras lin kiel unu plia de la "Generacio 27a".

De la jaro 1929 ĝis la intercivilitana hispana milito aperis liaj kvar libroj plej gravaj el lia poetika verkado: "Seguro azar" (Certa Hazardo) -1929), "Fábula y signo" (Fablo kaj signo)-1931), "La voz a ti debida" (La voĉo kiun ni ŝuldas al vi) -1934) y "Razón de Amor" (Amorezono) -1936), verkoj kiuj famigis lin kiel unu el la plej gravaj hispanaj poetoj de tiuj jaroj pri amaj temoj, montrante per tiu ekzalto de la amo la "plej pura poezio kaj delikata esprimo". Jen unu el tiuj priamaj poemoj:

Hieraŭ mi kisis vin surlipe

*Mi kisis vin surlipe... streĉaj,
ruĝaj. Estis kiso tiel mallonga
ke ĝi daŭris pli ol fulm' blindeca,
pli ol mirakle, plie*

La tempo

*post kisi vin, mi ne ĝin volis,
ja por nenio,
mi estus dezirinda ĝin antaŭ;
ĝi komenciĝis kaj finiĝis en si mem.*

*Hodiaŭ mi estas kisata kison,
kaj estas sola kun miaj lipoj,
kaj metas ilin
ne en via buŝo, ne, ne plu,
-kien eskapis mia kiso!*

*Mi metas ĝin
sur la kiso kiun mi donis vin
hieraŭ, sur ambaŭ buŝoj kunaj,
sur la kiso kiun ni ambaŭ kisis.*

*Kaj daŭras pli tiu kiso
ol la silento, ol la lumo,
ĉar ne plu estas karno
kion ni kisas, nek buŝo
kiu eskapas, kiu forkuras...*

Ne!

Mi estas kisante vin pli malproksime.

Dum certa tempo li aktivis kiel esplorstudanto en la Centro pri Historiaj Studoj, kie li pritraktis la Modernan

Literaturon, kaj ankaŭ en la Centra Lernejo pri Lingvoj, kaj ankaŭ li estis ĝenerala sektretario de la Internacia Universitato sunsomera" en Santander. En tiuj taskoj surprizis lin la intercivitana hispana milito, tial li veturis al Usono kie li aktivis kiel docento en la Universitatoj de Wellesley College kaj Johns Hopkins, kaj iom poste ankau en la Universitato de Puerto Rico.

Interesa anekdoto estas, ke dum la unuaj jaroj de lia edziĝo kun Margarita Bonmati, li adresis ĉiutage aman leteron al sia edzino, kio taŭgis por ke multaj jaroj poste, sia filino Soledad, kompilis ĉiujn tiujn leterojn kaj eldonis libron titolitan "Cartas de amor a Margarita" (Priamaj leteroj al Margarita).

Pedro Salinas Serrano, poeto, eseisto, docento en pluraj naciaj kaj eksterlandaj Universitatoj, membro de la "Generacio de 27a" forpasis en Boston la 4an de decembro de 1951.

Jorge Guillén Alvarez (1893-1984)

Hispana poeto naskiĝinta en Valladolid en la jaro 1893, kaj en ties urbo li komencis siajn studojn kiujn li finis pri Filozofio kaj Beletro en Svizio kaj en la Universitatoj de Madrido kaj Granada.

Li komencis sian profesion kiel "Leganto de la hispana lingvo" en la Sorbono de Parizo (1917-1923), kaj estis en la franca ĉefurbo kie li komencis verki poezion sub la influo de la francaj poetoj de tiu epoko.

En la jaro 1925 li okupis la katedron pri Literaturo en la Universitato de Murcio, kaj pro simpla afineco oni konsideris lin kiel unu plia de la elita grupo de poetoj nomata "Generacio de 27a". Kun du el liaj kolegoj fondis la revuon "Verso y Prosa" (Verso kaj Prozo).

Dum tiuj jaroj li estis "Leganto de la hispana lingvo" en la Universitato de Oxford, kaj en la jaro 1928 oni eldonis sian unuan libron "Cántico" (75 poemoj) en kiu li jam esprimas sian poetikan koncepton, tiu libro estis reeldonita en Buenos Aires kun atentindaj aldonoj (ĝis 334 poemoj); jen frazo montranta sian poluritan kultismon, sen ia ajn ornamo, nur sia penso neta kaj samtempe filozofiema:

"Ĉu iam ekzistos sciofino? Neniam, neniam. Oni estas ĉiam je la komenco de neestingebla scivolemo kontraŭ la senfina vivo"...

Kiel ni jam menciis, pro liaj poetikaj karakterizoj kaj amikaj rilatoj kun membroj de la "Generacio de 27a" oni konsideris lin kiel plia membro de tiu grupo, ja lia poezio koincidis en kelkaj aspektoj kun tiu de la citita grupo: metriko kaj ritmo ne-regula, sen devigaj briloj, esprimanta nur la parolon ĝustan kaj precizan, racia stilo kiun li transformis en "pura poezio"; jen poemo en kiu vi povas konstati ĉi tiun difinon:

ALVENO

*Ho luno, kiom da aprilo,
kiom vasta kaj milda aero!
Ĉion kion mi perdis
revenos ja kun la birdoj.*

*Jes, kun la birdetoj
en aŭrora ĥoro
pepi, pepi, pepi
sen gracia intenco.*

La luno estas tre proksima,

*kvieta en la aero nia.
Tiu kiu mi estis min atendas
sub mia penso lirika.*

*Kaj kantos el mi sinjor'
sur la altopint' el mia aspiro.
Ĉiel-ruĝ', ĉiel-ruĝ',
Inter la ĉiel' kaj l' aŭroj.*

*Ĉu perdiĝis tiu tempo
kiun mi perdis? La mano
disponas, leĝera dio
de tiu luno senjara...*

Bonkora kaj kompetenta pri beletra kritiko, Guillen, kutimis ekzalti la personojn elstarajn pri Arto kaj Beletro, kaj en tiu kazo, lia poezio fariĝas pli densa, ĉiu strofo forgesas la anekdoton por priskribi nur la esencon kiun li celas, jen poemeto dediĉita al la verkisto Miguel Delibes:

*Ni admiru la veran aŭtentikan homon,
kiu scias organizi sian vivon kaj librojn,
atenta pri ĉio, kaj sen koleri pri tio
kion ne koncernas al sia inspira fonto.
Aŭtenta vivo konsistanta en la priskribo
klara, majstra kaj tial tre konvinkema,*

*priskriba arto kiu rekreas
la urbon, la kampon, ĝian lumon kaj idearon,
profundaj la pejzaĝoj eĉ detale,
homoj, bestoj, vegetaĵoj,
kaj inter ĉio: la ĉasisto...*

Kiel vi povas konstati nur la esenco de lia priskribo, en tiu ĉi kazo la bildo de Delibes li atentis, jen kial ne estas facila tiu poezio por esti... poezio.

En la jaro 1936, kiam li oficis kiel katedra profesoro en la Universitato de Sevilo eksplodis la intercivitana hispana milito. Enkarcerigita pro sia progresema idearo li vivis nigrajn tagojn ĝis la jaro 1938 kiam li ekziliĝis en Usono, kie li okupis docentajn postenojn: en la Universitatoj de Middlebury, Mc Gill (Montreal) kaj en la Kolegio Wellesley.

Kiam li emeritiĝis li multe vojaĝis tra Eŭropo kaj Ameriko, li prelegis en la Universitato de Harvard, en 1962 publikigis en Hispanio sian libron "Lenguaje kaj Poesia" (Lingvo kaj Poezio), kiu meritis ĝeneralan laŭdon, kaj en la jaro 1976 li ricevis la prestiĝan premion "Miguel de Cervantes" de Literaturo kaj la Internacia Premio "Alfonso Reyes". Jorge Guillen verkis multajn interesajn librojn, (pli ol cent), kaj estis elektita honora membro de la Reĝa Hispana Akademio. Forpasis en Malago en la jaro 1984.

Gerardo Diego (1896-1987)

Poeto, katedra profesoro pri Lingvo kaj Literaturo, naskiĝinta en Santander en 1896. Akademiano de la Hispana Lingvo, li estas unu el la plej elstaraj poetoj de la tiel nomata “Generacio 27a”, konsiderata kiel la estetikisto de tiu prestiĝa grupo de poetoj, pro sia konstanta serĉado de novaj poeziaj formoj. En 1925 li ricevis la Literaturan Nacian Premion pro sia verko “Versos humanos” (Humanaj Versoj), kaj poste, laŭlonge de sia vivo, multajn aliajn premiojn: “Ciudad de Barcelona”, “Larragoiti”, “Cervantes”, k.a.

Li speciale profundigis en tri tendencojn de la Poezio: la tradicia, la kreisma kaj la absolute libera, kaj en ĉiu el ili li montris sian talenton kaj delikatan sentivecon. Inter liaj priamaj verkoj elstaras “Surprizo” kaj “Izola Amo”, kaj inter la primuzikaj “Nokturnoj de Chopin”, “Preludoj” kaj “Ario al Gabriel Faure”.

Jen peco de unu el liaj poemoj, plena de muzikaj resonoj:

Nokturno 12-a

*Ŝoviĝas la nokto
kun mildeco plaĉa.
La blankaj lilioj*

*kun neĝa tuniko,
naivas liriko
kaj la luno palas...*

*Sian mutan kanton
la steloj lulkantas,
la pejzaĝo revas
en la brum'dormanta.*

*Kiel ĉi kvietas!
Kiel sorĉe pacas!
La mildaj kadencoj
de lulkanto rava,
izolaj rumoroj
silentojn sulkantaj
tremigis l' arbaron;
la briz' susuradas
kaj ĉe l' rojo ĉarma
preĝe ŝaŭmoj kantas.*

*Nur du gejunuloj,
ŝi - blonda, li forta-,
ĝuis la plezuron
sur la val' silenta
de la nokto-lumo,
rura nokt' revanta...*

Gerardo Diego tre simpatiis al Esperanto, kaj plaĉe akceptis personan viziton de nia Esperanto-akademiano Fernando de Diego, tradukinto de kelkaj el liaj poemoj, el kiuj citindas: “La cipresoj de Siloj” kaj “Romanco pri la rivero Duero”.

Li fekunde verkadis, kaj publikigis multnombrajn verkojn, unue tiuj kun tradicia stilo, poste multaj aliaj kun formo, stilo kaj enhavo profunde avangarda, el kiuj elstaras: “Soria” (Soria), “Versos humanos” (Humanaj Versoj), “Alondra de verdad” (Vera alaŭdo), “Romances” (Romancoj), “La luna en el desierto” (Luno en la dezerto), “Hasta siempre” (Ĝis ĉiam), “El cerezo y la palmera” (La cerezujo kaj la palmo), kaj multaj aliaj.

Gerardo Diego forpasis en la jaro 1987 kaj estas ja unu el la plej gravaj lirikistoj de la moderna hispana poezio, aŭtoro ankaŭ de pluraj antologioj.

Federico García Lorca (1898-1936)

Vere indas esti konsiderata la popolstilo en la poezio de Federico García Lorca²².

Oni ne bezonas tro esplori por komenti certajn karakterizojn pri la poezio kaj teatro de Federico García Lorca, ja en la kerno de sia verkaro ĉiam vibras substrekindaj aspektoj, kiuj ebligas ne nur al simplaj komentoj, sed ankaŭ al profundaj studoj. Hodiaŭ mi enfazos tiujn elstarindajn nuancojn de la populareco, lia popolstilo, kiujn li ofte uzas sen perdo de lirika nivelo kaj eĉ donante al tiuj esprimoj muzikajn resonancojn. Federico posedis certan magion, kiu ebligis al li transformi la plej simplan kaj modestan vorton en muzika sono, kaj tio estas sendube privilegio de elektitoj de la genio.

García Lorca estas unu el la plej grandaj figuroj de la liriko de sia epoko, li estis krom poeto, ankaŭ grava teatroverkisto, muzikisto kaj sorĉa prelegisto. Li ricevis lecionojn pri muziko de la fama Manuel de Falla, kiu aŭguris al li brilan estonton kiel muzikisto, sed Lorca, kvankam lertege ludis gitaron kaj pianon, ne sekvis la konsilon de la majstro daŭrigi siajn studojn en Parizo. Li

²² Tiu ĉi prelego okazis en Pineda de Mar en la jaro 2009 en speciala omaĝo al Federico García Lorca, organizita de la Internacia Esperanto-Semajno.

estis ja en tiu momento unu el tiuj eksterordinaraj homoj, kapabla krei belecon, vekti entuziasmon kaj mirinde ĉarme transformi ĉion kion li tuŝis...

En 1919, Lorca translokiĝis de Granado al Madrido por ekstudi en la Madrida Universitato. Profunde sentanta la allogon de la poezio, li sin dediĉis plene al ĝi, kaj en 1921 li publikigis sian unuan verkon "Poemlibro", ricevita kun varia opinio de la tiamaj rezencistoj.

En tiu tempo, Lorca jam verkis siajn poemojn per oksilabaj versoj, laŭ la modelo de la antikvaj romanoj: la poezio de la antikva hispana popolo oni esprimis dum la 16a kaj 17a jarcentoj, ne nur per la dokta esprimo de poetoj senkomparaj kiel Garcilaso, Gongoro, San Juan de la Cruz, Lope de Vega, Calderón, Quevedo k.a. sed ankaŭ kaj precipe per la popola poezio de la Romancaro kaj Kanzonaro devenanta el la profundo de la mezepoko: riĉa trezoro de koploj kaj kanzonoj tre popularaj, el kies esencoj suĉis tiuj grandaj poetoj. Lorca, ne nur uzis la romancon por vesti sian poezion sed li admiris la spontanajn kaj popularajn antikvajjn koplojn. Jen kion li pensis kaj skribis pri tiu versoformo:

"De la jaro 1919, en la periodo de miaj unuaj paŝoj en la poezio, mi studadis pri la formo de la mezepoka romano kiel la plej taŭga kaj adekvata por esprimi miajn sentojn. La tradicia romano estis ĉiam rakonta, kaj tio donis

popolan karakteron kaj popularecon al la poezio. Mia celo estis kunfandi la romancon rakontan al la lirika, kaj por atingi tiun karakteron mi multe strebis”.

La plej gravaj kritikistoj koncidis en la opinio, ke li, García Lorca, efektive sukcesis atingi la indikitan celon per tiuj du elementoj: tradicio kaj avangardismo.

En 1927, kelkaj el la plej bonaj hispanaj poetoj, V.Aleixandre, Alberti, Gerardo Diego, Dámaso Alonso, Pedro Salinas, Jorge Guillén, Cernuda, Altoaguirre, García Lorca k.a. decidis omaĝi la tricentjaran datrevenon de la forpaso de la granda poeto de la 17a jarcento Luis de Góngora y Argote (Gongoro). Tiu grupo ricevas la nomon “Generacio de 27a”, ĉar estas tiam kiam montriĝas ilia maturiĝo en poezio, kies plej alta celo estis krei puran belecon per imagopovo, bildoj kaj metaforoj, uzante la tradician metron popolan aŭ kultan.

Tiuj poetoj kontribuis al tiu atingo per ilia respektiva verkoj. Lorca atingis altan pinton per sia verko “El Romancero Gitano” (t.e.”La cigana Romancaro”-1928), kiu, kun siaj teatro-verkoj donis al li tutmondan famon kaj grandan popularecon, tiom da, ke eĉ la plej malklera homo de la sudhispana socio de la jaroj dudekaj (precipe la andaluza), en oftaj kazoj, eĉ analfabetoj, fieris reciti parkere kelkajn el tiuj poemoj.

Mi ne povas forgesi anekdoton kiun mi mem vivis en Granado, kiam mi loĝis en tiu bela urbo ankoraŭ sub la diktatora reĝimo de Franco, dum tiuj tristaj tagoj kiam mizero ŝvebis en ĉiuj anguloj de nia socio. Nu, certa tago, mi vizitis kvartalon Albajcin, kaj en unu el tiuj dometoj kie oni kantis kaj dancis andaluzan folkloron al la tiamaj malabundaj turistoj, modesta homo, kun mizera aspekto, recitis poemojn de Federico. Speciale impresis al mi jenan romancon, kiun mi jam de antaŭ longe konis, sed neniam mi aŭskultis tiel muzike kaj pasie recitata, temas pri la poemo:

La malfidela edzino

*Ĉar mi kredis ŝin fraŭlino
al river' mi kun ŝi iris,
sed ŝi estis jam edzino.*

*Estis en Jakoba nokto
kaj pro kvazaŭ kompromiso
la lanternoj estingiĝis
kaj ekĉirpis arde griloj.*

*Ŝiajn mamojn mem dormintajn
palpis mi ĉe stratofino
kaj subite ili floris*

kvazaŭ hiacinta spiko.

*La subjupo amelita
sonis kiel pec' da silko
same kiel sonas ŝtofon
kiun ŝirus dek tranĉiloj.*

*Sen arĝentolumaj ludoj
arboj kreskis en fikcio
kaj hundar-horizonto bojis
ĉe la transrivera nigro.*

*Preter la rubusoj, junkoj,
dormoplantoj kaj vepr-pikoj
faris mi sub ŝiaj haroj
etan foston sur la ŝlimo.*

*Mi demetis la kravaton,
ŝi la bluzon de virino,
mi la revolvero-zonon,
ŝi gajnojn el pur-silko.*

*Ne troveblas fajnan haŭton,
nek konketoj, nek lilioj,
nek kristaloj kun lunlumo
helas kun pli granda brilo:*

*Ŝiaj kruroj el mi fuĝis
kiel fiŝo je surprizo,
la duono ŝajne brulis
plena la duon' de frido...*

*Mi trakuris tiun nokton
per brilperla ĉevalino
la plej belan el la vojoj
sen la selo kaj sen bridoj.*

*Mi, ĉar viro, ne konfesos
kiaj estis ŝiaj diroj,
lum' el saĝ' kaj diskretemo
diktas al mi prudentiĝon.*

*Ni forlasis la riveron,
ŝin malpuris sabl' kaj kisoj,
ja batalis kontraŭ l' vento
blankaj glavoj de l' iridoj.*

*Mi kondukis laŭ mi estas:
kiel vera ciganido,
silkan kudrilujon flavan
donis mi al ŝi kun digno.*

Kaj ne volis mi ŝin ami,

*ĉar estante jam edzino
ŝi survoje al rivero
ŝin deklaris tuj fraŭlino.*

Sed mi tuj diru, ke tiu ne estis escepta kazo, dum mia plurjara restado en Andaluzio mi povis konstati, ke la adoro de andaluzoj al la persono kaj poezio de Federico ne nur oni sentis en Granado sed ankaŭ ĉe la tuta sudo de Hispanio. Ne unu sola fojo mi vizitis kafejojn en pluraj gravaj andaluzaj urboj, kie sur modesta estrado oni prezentis je tiu horo de la postmanĝo kaj post la vespermanĝo mallongajn teatraĵojn, tipajn dancojn kaj kantojn aŭ deklamo de poemoj, el kiuj la plej aplaŭdataj estis tiuj de García Lorca.

Federico uzas tre ofte ordinarajn vortojn kutime uzitaj nur de la popolo, kiuj tuŝitaj de lia magia plumo transformiĝas en ĉarmaj esprimoj. Ekzemple, kiam en la ĵus recitata poemo li povus uzi la vorton “soltera” t.e. fraŭlino, li elektas “mozuela”, kaj en la sekvanta verso anstataŭ “esposo” t.e. edzo, li uzas “marío”, kies prononco flugas en la aero kun muzikaj resonoj, nuanco tute ne rara ja li ankaŭ krom poeto estis bona muzikisto.

La poezio de Lorca, apertaj al ĉiuj postuloj de la modernismaj fluoj, venas tamen tra la vojo de la klasikismo kaj de la kultismo: aperas ĉiam en liaj versoj

certaj resonancoj de la klasikismo de Lope kaj kultismo de Gongoro. Oni povus citi multenombrajn ekzemplojn de okulfrapaj metaforoj, kiel tiuj versoj ĵus recitataj:

*Mi trakuris tiu nokto
per brilperla ĉevalino
la plej belan el la vojoj
sen la selo kaj sen bridoj...*

aŭ tiuj aliaj kun lirikaj akcentoj kiuj kantas:

*Sen arĝentolumaj ludoj
arboj kreskis en fikcio
kaj hundar-horizonto bojis
ĉe la transrivera nigro.*

Kvankam se ni bone analizas la poemon, ĝi estas plena de tiuj mirindaj metaforoj. tiel trafaj ke en neniu momento lacigas la aŭskultanton.

Vero estas, ke la “Cigana Romancaro” estas riĉa trezoro konsistanta el interesaj popolaj rakontoj en kiuj ne mankas tiuj kiuj pli enfazas la lirikan detalon ol la emocio de la rakonta priskribo. Unu el tiuj estas sendube tiu poemo titolita

La monaĥino-ciganino

*Silento el kalk' kaj mirto.
Inter herboj fajnaj malvoj.
Monaĥin' sur ŝtofo flava
brodas bele keirantojn.*

*La sep birdoj de la prismo
flugas el la kandelabro.
La preĝejo diste grumblas
kiel urs' sur dorso-staro.*

*Kiel bele ŝi ja brodas!
Kiom lindas la brokaĵoj!
Volas ŝi sur ŝtofo flava
brodi florojn el la ravo,
kiujn ŝia fantazio
revas per la flor-ornamoj.*

*Kiaj fajnaj sunofloroj,
magnolioj kun bunt-strasoj!
Kiaj lunoj por mes-tukoj!
Kiom belaj la safranoj!
Kvin citronoj sukr-dolĉiĝas
Tie, en kuirej-parto.*

*La kvin vundoj de Jesuo
el la Almeria kampo.
En la monaĥin-okuloj
galopadas du rajdantoj,
kaj rumoro lasta surda
levas de ŝi la korsaĵo.*

*Ŝi rigardas krutajn montojn,
horizonton kaj nubaron,
ekrompiĝas ŝia koro
el suker' kaj herb-balzamo.
El la dudek-suna revo
kiel vidas ŝi la valon!
Kiom staraj la riveroj
belaj kiel viziaĵoj!*

*Sed ŝi daŭre brodas
ŝiajn florojn kun ĉarmo,
dum la brizo milde staras
kaj taglumo ludas ŝakon
alte tra la ĵaluzio
kie svenas milde tago.*

La “Cigana Romancaro” estas la verko kiu pli famigis al tiu ĉi granda poeto. La kritikon kiun ricevis tiu libro estis tiel varia kaj ampleksa, ke oni povas paroli pri ĝi dum

horoj kaj horoj, sed mi ne tion faros, nur mi konsideras oportuna konigi al vi kelkajn frazojn de la propra opinio de la aŭtoro pri sia verko, gravaj deklaroj kiel vi tuj konstatos. Lorca skribis:

“La libro, en sia tuto, kvankam ricevis la nomon cigana, estas la poemo de Andaluzio, kaj mi nomas ĝin cigana, ĉar la ciganoj estas plej altaj, plej profundaj, plej aristokratecaj de mia lando, plej reprezentaj de sia propra karakteriza maniero, kaj gardantoj de la fajro, la sango kaj la alfabeto de la vero andaluza kaj universala. Do la libro spegulas Andaluzion kun ties ciganoj, ĉevaloj, ĉefanĝeloj, planedoj, brizoj juda kaj romia, riveroj, murdoj, apud la vulgara noto de kontrabandistoj kaj la noto ĉiela de nudaj infanoj de Kordovo, kiuj mokas Sanktan Rafaelon. Libro, kie apenaŭ aperas la Andaluzio, kiun oni vidas, sed kie tremas la Andaluzio nevidata. Libro, mi jam diru, nepitoreska, nefolkloro, nekonvencia, kie ne troviĝas tipaj kostumoj, nek toreadoraj vestoj, nek aliaj tipaĵoj... kie la figuroj moviĝas ĉe fonoj miljare oldaj”.

Tiel parolis pri sia verko García Lorca. Sed tiu libro de poemoj estas ja tio kion opiniis Lorca kaj ankoraŭ multon pli, ĉar ne nur en tiu verko estas la plej selekta poezio de nia granadano, sed en ĉiu verso de li verkita, ne gravas pri kia temo ĝi estu, inkluzive en lia teatro, aperas ĉiam lia lirikismo senegala kaj lia popolstilo tre klare difinita. Lia

speciala vizio pri la homa socio estas instinkte kontraŭa al ĝia normo starigita de leĝoj, kiuj, iamaniere limigu la homan liberon. El tio lia simpatio por ciganoj, homoj kun liberecanaj inklinoj, kiuj malfacile akceptas la konvenciojn kaj formalizaĵojn de rigora socio...

“Esti naskiĝinta en Granado -li iam diris- inklinas min al simpatio de ĉiu kiu sin sentas persekutata: ciganoj, judoj kaj negroj”. Ĉiujn ili li defendis, kaj ni povas konstati tion ne nur en la romanoj, aŭ en la poemo “Poeto en Novjorko”, sed en multaj aliaj versaĵoj.

Lorca verkis ankaŭ “Poemoj pri Cante Jondo”, kiuj brile esprimas la animon de Andaluzio adoptante la formojn kaj stilon popolajn de la andaluzaj kanzonoj, sed la granadano tute ne forlasis sian kutiman teknikon kaj modernan vidpunkton pri poezio.

Rimarkinde, en lia poezio ankaŭ estas certa tragedia sento kiu, verŝajne, obsedis lin kaj puŝis al li verki kun obstino pri fatalo, fekundeco vivo, amo, morto... Pri tiu ĉi lasta temo, ni citu kiel elstaran, elegion kiun li verkis omaĝe al lia amiko, la toreadoro Sánchez Mejías. Al lia mortinta amiko, li dediĉis dramajn lirikajn versojn. Ni citu nur pecon el tiu bela poemo, sendube la plej bona elegio de la hispana liriko dum pluraj jarcentoj, enhavanta ne nur lian kutiman rakontan stilon, sed ankaŭ certan muzikan tonon tute originalan, nur propra de genioj, mi

aludas al la poemo “Funebra Kanto por Ignacio Sánchez Mejías”, unu el la plej eksterordinaraj ĉijarcentaj toreadoroj, amiko de la renoma “Generacio de 27a” kaj mem aŭtoro de teatraĵoj, jen la unua el la kvar poemoj titolita

La korno-vundo kaj la morto

*Je la kvina posttagmeze.
Ĝuste batis la kvina posttagmeze.
Infan’ alportis la littukon blankan,
je la kvina posttagmeze.
Kalka korb’ antaŭtempe atendanta,
je la kvina posttagmeze.
Ĉio estis morto, nur morto restis,
je la kvina posttagmeze.*

*La vento la kotonojn forportanta,
je la kvina posttagmeze.
Semis oksid’ nikelon kaj kristalon,
je la kvina posttagmeze.*

*Kolombo luktas kontraŭ leopardo,
je la kvina posttagmeze.
Kaj kruro kontraŭ angorstreĉa korno,
je la kvina posttagmeze.*

*Komencis vibri la burdonosonoj,
je la kvina posttagmeze.
L' arseniko kaj fum' de sonoriloj,
je la kvina posttagmeze.
Silentas la grupoj ĉe stratofinoj,
je la kvina posttagmeze.*

*La taŭro solas kun fieresprimo,
je la kvina posttagmeze.
Kiam ekaperis la neĝa ŝvito,
je la kvina posttagmeze.
Kiam invadis l' arenon la jodo,
je la kvina posttagmeze.
Metis ovojn en la vundo la morto,
je la kvina posttagmeze.
Je la kvina posttagmeze.
Precize, je la kvina posttagmeze.*

Mia bona amiko Miguel Fernández, sendube la plej klera hispana esperantisto kaj elstara fakulo pri la poezio de Lorca, opinias, “ke tiu simpla esprimo, “la kvina posttagmeze”, per alterna ripetado, donas al la poemo litaniecan monotonan tonon kiel konvenas al funebra kanto. Oni devus retroiri al la mezepoko por trovi, en la

poezio de Jorge Manrique okaze de la morto de lia patro, elegion tiel altnivelan.

Ankaŭ elstaris García Lorca kiel teatroverkisto: li publikigis teatroverkojn tiel belaj kaj interesaj, ke tiu altiris la atenton kaj laŭdojn de la publiko kaj rezencistoj en Hispanio kaj Ameriko: ni menciuj la poezian dramon “Mariana Pineda”, al kiu sekvis la farso “La prodigia ŝuist-edzino”. En 1933 li sukcese prezentas en el teatro Infanta Beatriz de Madrido la trilogian dramon “Sanga Nupto”, tragedia verko pri edziĝofesto, kiu malsukcesas, ĉar aperas en plena festo la antaŭa fianĉo de la ĵusedzino pretendanta forpreni la amatinon, konflikto kiu fine solviĝas per mortbatalo de ambaŭ rivaloj sub la lunlumo.

Poste venis aliaj gravaj teatraĵoj, kiel “Yerma”, kiun reprezentis la fama aktorino Margarita Xirgu, verko prezentanta intiman konflikton de malfeliĉa virino pro sia sterileco, kies torturo finiĝas kiam ŝi mortigas sian edzon; Sukcesa kiel la menciitaj lia verko “La domo de Bernarda Alba”, kiu temas pri streĉa konflikto de pluraj virinoj disputantaj por viro, kaŭzo de drama malfeliĉo de ĉiuj ili. En tiu trilogio, viroj kaj virinoj, ne agas kiel individuoj sed kiel arketipoj de pasioj, sentoj kaj humanaj situacioj ekstertempaj, impulsataj de nebremseblaj primaraj fortoj ekster ĉia rezonado kaj intelektismo, kaj envolvitaj de

ancestra fatalismo. La protagonistoj de tiuj dramoj havas kiel literaturaj antecedentoj la puran klasikan tragedion...

Dum la jaroj tridekaj, tuj post lia kontentiga turneo tra Ameriko kaj sukceso de lia teatraĵo, "La prodigia ŝuist-edzino" en la Hispana Teatro de Madrido, de la mano de la ĵus menciita aktorino Margarita Xirgu, Lorca realigas sian revon prezenti al la popolo la plej bonan teatron ĉe la ĉefpalacoj de urboj kaj vilaĝoj, tra itinero apriorie proletara, tute simple ĝuante kun la popolanoj la teatron de Calderon, Lope de Vega kaj aliaj famaj hispanaj aŭtoroj.

Tio signifis reveni al la originoj de la klasika teatro reprezentata ĉe publikaj placoj. Por tiu projekto li ricevis gravan subvencion de la Ministro pri Publika Instruado de la Dua Hispana Respubliko, prof. Fernando de los Rios, kaj la trupo de li nomata "La Barako" disvastigis per kleraj universitatoj la teatrokulturon, vojaĝante de urbo al urbo, ja ili aktoris por tiu celo anstataŭ ferii...

Kiam la intercivitana hispana milito eksplodis kaj Federico estis sovaĝe murdita, neniu povis tion kredi, kaj la novaĵo saltis super landlimoj ĝis la mondfino, sed evidente oni ne povis mortigi lin ja li vivas por ĉiam ĉe la koroj de ĉiu poeziamanto. Kun lia morto naskiĝis la mito. Tiuj kiuj ne konis lin pro lia vivo, de tiu momento konis lin pro lia

morto. Lia verkaro disvastiĝis tra la tuta mondo kaj lia figuro gigantiĝis.

La plej gravaj intelektuloj meritoplene parolis pri li, kaj multaj el liaj amikoj dediĉis al li artikolojn, eseojn, poemojn, kiel senprokraste faris Antonio Machado apenaŭ li eksciis ke Federico estis murdita. Jen la poemeto kiun Antonio dediĉis al li:

La krimo okazis en Granado

*Oni vidis lin marŝanta
inter homoj kaj fusiloj
tra tre longa frida strato
eliri al kamp' sen miro,
ankoraŭ la steloj brilis
venis haste la ektagiĝo.
Kiam la orsun' eklumis
oni murdis Federicon.*

*Ne kuraĝis lin rigardi
la grup' de ekzekutistoj
ĉiuj fermis la okulojn
preĝis: "savas vin nek Dio!"
Sango sur la frunt' kaj ventro
morta falis Federico.*

*La krim' en Granad' okazis,
ho, terura malfeliĉo!
sciu estis en Granado-
la Granad' de Federico!*

Unu el la plej prestiĝaj hispanaj intelektuloj de tiu tempo, la diplomato kaj verkisto Salvador de Madariaga, dediĉis al li jenan poemon:

Elegio al la morto de Federico García Lorca

I

*Du kristaloj nogrolumaj
en lia rigardo helis
kaj el lia buŝo brilis
blanka ombro kiam gestis.
Liaj haroj, nokt' sen lumo,
la vizaĝ' seren-prezentis
koloron oranĝ-olivan
geston de cigan' rivelis.
Voĉo el gitar-bordono,
el lia anim' dissendis
la parfumon el bedaro
de Granado kiam festis.*

*Cipresoj de l' Albajcino,
belaj mirtoj de l' Alhambro,
cedroj de l' Generalifo,
arom' belo, suko, cârmo,
la ĝoj-bruo de Seviljo,
la graveco de Granado,
la fajnaj bedar-jasmenoj,
geranioj de Triano...
El tiu spirito via
ŝprucis kvazaŭ filigrano;
la Andaluzi' eterna
plena de kolor kaj ravo.*

*Obeante lian voĉon
la taŭro el la taŭraro
rigardas lin kun surprizo
kaj fiere levas kapon.
La migdalarbo ruĝiĝas,
Rompiĝas blankŝaŭme l' akvo,
ĉe floranta rubusujo
ekstremas ĉe nest' birdaro.*

*Restas la ĉasist' absorta
rev' fulguras ĉe l' rigardo,
la ĉeval' laŭ ĝia ritmo
plezurigas la rajdanton,*

*la riveroj streĉ-vekiĝas
sidas firma la montaro,
profundiĝas ĉiel-bluo
brilas sun' kun arda flamo
kaj la bela amatino
bremsas ŝian koran ardon.
Siavoĉe tutan vivon
envolas ŝin en dolĉamo.
Siavoĉe la romancoj
revivas ĉe l'plac' kaj stratoj;
alten flugas ja la koploj
kun la fort' de la imago;
pleniĝas de melodioj
la ventroj de la gitaroj.
Siavoĉe eĉ l' aero kantas,
dancas eĉ la akvo.*

II

*Tra l' ĉielo vasta venas
du nuboj de fajr' kaj sango.
Unu kontraŭ la alia
minacas tragikajn tagojn.
Jam forviŝas la sunlumo
al la homoj, ter' kaj maro.
Spiritstreĉoj, vanaj sentoj.
Animstreĉoj, plendoj, dramo.*

*Fajr-vipoj de sang' kaj morto
Disŝiras la aeran vaston.*

*Kaj tra la aero flava
pasas mort', malam' kaj larmoj.
Malplena la vasta frunto.
La okuloj, jen du pafoj.
La tridekdu dentoj klakas
en l' amara buŝo-kavo:
Vivu ja la mort', ĝi venas
kun la signo de fatalo.*

*Nigra nubo, ruĝa nubo
iras sango kontraŭ sango.
Streĉ-animoj, kor-lividaj.
Streĉ-animoj, perfortflamo...
Brulis migdalarbaj floroj,
morta kuŝas la taŭraro.
En la aero dise flugas
Venĝoj, punoj kaj malamoj.*

*Embuskita la ĉasisto
gvatas homan celĉasaĵon.
La rivero sangon trinkas
kaj la nokto trinkas larmojn.
Arĝentaj lunoradioj*

*enretigas la kadavrojn.
La virinon, man' sur brusto
oni murdis sen kompato.
Eĉ l'aero dolorĝemas
dolorploras eĉ la akvo.*

III

*Via voĉ' mistere sonas
inter flar' el ĉifonaĵoj.
Sonas via voĉ', mi dubas,
mi ne kredas tiun klakon.*

*Bruas dum la tag' tumulto,
bruas dum la nokt' pafado.
Nigra nuboj, nuboj nigra
ŝvebis super urb' Granado.
el via animo streĉa,
el via spirita ardo
sur karmeno plej floranta
elŝiriĝis sonorpafo.*

*Mi rigardis la silenton
por konstati sen eraro
ĉu resonis lia voĉo?
sed aŭdiĝis nur pafaĵo,
tiu kiu lin mortigis*

la terura morto-bato.

*Forkuru dezire, fuĝu
tra la vojo de la saĝo,
vivo estas ja tumulto
kaj la morto nur pafado.
Ho, fajna Bedar-jasmeno,
geranioj de Triano,
cipresoj de l' Albajcino,
belaj mirtoj de l' Alhambro,
cedroj de l' Generalifo
arom', belo, suk' kaj ravo!
Jam mortinta kuŝas tiu:
plant-radiko, trunko, branĉoj,
kiuj ŝprucis en Granado
kaj floris en via tero
plena de gracia ĉarmo!*

*Forkuru dezire, fuĝu
tra la vojo de la saĝo,
vivo estas ja tumulto
kaj la morto nur pafado.
Federico,
vivo, kanto kaj magio,
Federico, Federico,
grundo, ombro, polv', nenio..*

*La vermoj de via korpo
ronĝas rozojn kaj oranĝojn.*

*La vermoj de via korpo
ronĝas ronĝi la estaĵojn;
streĉaj vivanimoj, koroj,
spiritoj lividaj, dramo,
la vermoj de via korpo
ronĝos ĉiujn la hispanojn.*

IV

*Ne, ĉar via nekorupta
fajnsprito kun spontano
leviĝos kaj venos arde
kun via kutima saĝo.
Li odoras je jasmenoj
kaj gustas kiel oranĝo.*

*Flugas super la paŝtejoj
kaj vivigas la toraron,
lumigas kiel kandelo
la cipresojn de l' Alhambro;
forkurigas violnubojn
kaj danĝerajn nubamasojn;
malkovras ĉe l' Oriento
la Morgaŭan kurtenaron.*

*Vi, floranta purspirito
kun gracio, lum' kaj ĉarmo.
Vi, el la Bedar' ŝprucigos
rikolton de homaranoj
de spiritoj plej honestaj
kiel kristaldiafano...*

Kompreneble, ke, kiel mi jam diris je la komenco de mia eseo, ni povus ankoraŭ daŭrigi horojn kaj horojn parolante pri Federico García Lorca, deklamante aliajn el liaj belaj poemoj, ekzaltante lian lirikismon, parolante pri lia sojfo de kulturo kaj lia amo al homoj senhelpaj aŭ persekutataj, sed hodiaŭ mi ne plu volas lacigi vin.

Permesu al mi fermi mian eseon deklamante al vi unu el la plej popularaj poemoj de Federico, temas pri la

Somnanbula Romanco

*Verda, mi ĝin volas verda.
Verda vento. Verdaj branĉoj.
La ĉevalo sur la monto
kaj la ŝipo sur la maro.*

*Kun la ombro sur la zono
revas ŝi ĉe la verando*

*per okuloj arĝent-fridaj,
haroj verdaj, verda karno.*

*Verda mi ĝin volas verda.
Sub cigana lunoĉarmo*

*la ĉirkaŭo ŝin rigardas
sed ŝi vidas kun amaro.*

*Verda mi ĝin volas verda.
Prujnaj steloj el gel-blanko
kun ombrofiŝo venas
kiam klaras nova tago.*

*La figarb' poluras venton
per la smirg' de siaj branĉoj,
kat' putora, bruna monto
sin hirtigas la agavojn.
Kiu venos? Kaj de kie?
Restas ŝi ĉe la verando,
verda karno, haroj verdaj
prirevanta amar-maron.*

*Karo, mi deziras ŝanĝi
por la domo la ĉevalon,
por spegulo mian selon,*

por ponardo mian ŝalon.

*De la altaĵoj apud Cabra
sargas mi je ĉiu paŝo.
Se mi povus ŝanĝi tion
mi akceptus ĝin kun danko,
sed ne povas mi decidi
ĉar ne estas mi la mastro.*

*Mi deziras morti dece
en la propra lit', kompano,
sur ferluksa lit', se eblas,
inter linotuk' el Flandro.*

*De la brusto ĝis la gorĝo
vundoj verŝas mian sangon.
Tricent' da brunetaj rozoj
ruĝmakulas la subjakon,
humidiĝas via zono
kaj odoras sangfluado.
Sed ne de mi, nek de domo
mastras mi por interŝanĝo.
Lasu min almenaŭ iri
ĝis la altaj balustradoj;
lasu min atingi tie
ĝis la verda verandaro!*

*balustradoj de la luno
kie sonas l'akv' kristalon.*

*Jam suprenas ambaŭ viroj
al la altaj balustradoj,
lasas post si sangogutojn
kaj riveron da roslarmoj.*

*Dume sur tegmentoj tremas
lanternetoj el stanlado
kaj la frumatenon vundas
milkristala tintilado.*

*Verda mi ĝin volas verda.
Verda vento. Verdaj branĉoj.
Supreniris la du viroj.
Lasis en la buŝ' l' amaron
la impeta longa vento
kun sensac' de ment' kaj galo.*

*La filin' amara via,
kie estas ŝi, kompano?
ŝi multfoje vin atendis,
rozvizaĝo, nigraj haroj,
dum senfinaj longaj horoj
sur ĉi verda verandaro!*

*En la puto rozvizaĝa
flosas cigana kadavro.
Verdaj haroj, karno verda
kun arĝent-okula ĉarmo.
Ŝajnas glaciaĵ' el luno
subtenata sub la akvo.
Iĝis nokto tuj intima
kiel placo de vilaĝo.
Gvardianoj tre ebriaj
batis brue la pordaĉon.*

*Verda, mi ĝin volas verda.
Verda vento. Verdaj branĉoj.
La ĉevalo sur la monto
kaj la ŝipo sur la maro.*

Kiel oni povas konstati la popolstilo de Federico aperas en ĉiu angulo de tiu ĉi poemo

Dámaso Alonso (1898-1990)

Dámaso Alonso y Fernández de las Redondas estis poeto, elstara kritikisto, profesoro pri Lingvo kaj Literaturo, membro de la tiel nomata "Generacio 27" kaj studemulo laŭ plej alta nivelo de la tradicia klasika hispana beletro en siaj originoj.

Li estis elstara lernanto de la fama intelektulo Ramón Menéndez Pidal ĉe la Centro pri Historiaj Studoj, kaj kiel profesoro instruis Hispana Literaturo en la Universitatoj de Valencio, Madrido, Berlino, Oxford kaj Cambridge...

Dámaso Alonso profunde analizis la verkadon kaj stilon de Luis de Góngora y Argote en siaj verkoj "Temas Gongorinos" (Gongoraj Temoj), "Soledades" (Solecoj), "Estudios y ensayos gongorinos" (Studoj kaj gongoraj eseoj) kaj aliaj, tiel majstre ke ne estas troveblaj studoj plej altnivelaj ol tiuj kiujn li faris pri tiu elstara poeto (1561-1627). Li ankaŭ profunde studadis la tradicia poezio pri harĉoj, verkoj de Gil Vicente kaj tiu de la plej elstara mistika poeto San Juan de la Cruz.

Logike, li kontaktis en la "Rezidejo de Studentoj" de Madrido kun la plej elstaraj membroj de la "Generacio de 27a": Garcia Lorca, Rafael Alberti, Luis Cernuda, Pedro Salinas, Vicente Aleixandre, Gerardo Diego k.a., brila grupo kiu admiris, precipe, al la poeto Luis de Góngora,

tiel entuziasme, ke ne nur ili estis influita de la stilo de la poeto, sed ĉiuj ili koincidis celebri omaĝon okaze de la tricentjara datreveno de la poeto, kio efektive okazis en la Ateneo de Sevilo en la jaro 1927.

Aŭtoro de pluraj gravaj verkoj, krom la jam menciitaj, aliaj eksterordinaraj kiel "Ensayo sobre la Poesía Española" (Eseo pri la Hispana Poezio)-1945-, "Poesía Española" (Hispana Poezio) -1950-, "Poetas actuales Españoles" (Nuntempaj hispanaj poetoj" -1952) k.a.

Dámaso Alonso ricevis la Premion Cervantes (1978), estis direktoro de la Reĝa Hispana Akademio kaj membro de la Akademio pri Historio; li ankaŭ estis direktoro de la revuo "Filología Española" (Hispana Filologio) kaj kunlaboranto de la prestiĝa "Revuo de Okcidento".

Kiel poeto li verkis tre interesan kaj gravan poezion, jen unu el liaj priamaj poemoj:

Scienco el Amo

*Mi ne scias, nur atingas min, l' adoro
al viaj okuloj, la tenebran sciigon
de dio, nur en viaj ruĝlipoj, kison
de granar-mondo, de ĉiela vivamoro.*

*Ĉu vi estas kristalpurig', aŭ detruema
ventego? Ne, mi ne scias...de tiu plezur'
de ĝia kosmik' avareco, mi scias nur
pri la sidera bat' kiun mi vin amegas.*

*Mi ne scias se vi estas mort' aŭ vivo,
se mi tuŝas vin kiel roz' aŭ kiel stelo,
se mi vokas vin aŭ eble vokas dion*

*Ĵonko en l' akvo aŭ surda ŝton' vundita
nur mi scias ke vesper' estas pli ol belo
nur mi scias ke mi estas vir' kaj vin amas.*

Kiel oni povas konstati la poezio de Dámaso Alonso ne konsistas el brilaj metaforoj aŭ artifikaj rebriloj, li uzas la regulojn de la klasika soneto, sed la esprimo de la versoj ne estas tiu de la ordinara poeto, li rompas la verson eble por doni simplecon al ĉiu esprimo, ja li volas ke la beleco estu en la konceptoj kaj tute ne en la formoj, eble estas pro tio ke li ne brilis laŭ la alta nivelo de liaj kolegoj de la "Generacio de 27a".

Jen alia soneto kiun li verkis por ekzalti la liberon kiun la liberpensantaj homoj aspiras:

Soneto pri la homo-libereco

*Kiom bela vi estas, liberec', nenio
kontrastas vin, kion? Donu min turmento.
Pli brilas sur la plej pura firmamento
liberec' en krisolita tortur-vivo.*

*Ke mi ne krii? Ĉu pretas buŝ-ŝtopilo?
Venu: buŝ-ŝtopu mian liberan penson.
Krio ne estas ondovibro al vento:
hom-ribelo estas ja konscienca krio.*

*Kiom bela vi estas, liberec', mem dio
vidis vin brili, antaŭ l' unua infero
sur sia brusto, tutsola bela stelo.*

*Fajreto el ardanta vulkano prenis
en sia mano. Kaj sur mia frunt' ardis
libera dia flamo, bela libreco.*

Dámaso Alonso y Fernández de las Redondas elstare
brilis inter la hispanaj intelektuloj plej altnivelaj de sia
epoko. Kiel kritikisto li estis vere senegala, ja li esploris
en la profundo de la naskiĝo de nia Liriko.

Li naskiĝis kaj forpasis en Madrido (1898-1990).

Vicente Aleixandre y Merlo (1898-1984)

Tiu ĉi prestiĝa poeto naskiĝis en Sevilo en la jaro 1898, sed studis en Madrido la karierojn pri Juro kaj Ekonomio, kaj de 1920 ĝis 1922 jam funkciis kiel profesoro en la Lernejo pri Komerco de la hispana ĉefurbo.

Li amikiĝis kun Dámaso Alonso, kiu multde influis lin pri poezio per la konatiĝo de la verkaro de Ruben Dario, kies stilo miksitita kun tiu de la hispanaj klasikuloj, aperis en la unuaj poemoj de Aleixandre publikigitaj en la jaro 1926 en "La Revista de Occidente" (La Revuo de Okcidento). En tiu revuo aperis lia unua verko "Ambito" (Medio) en la menciita jaro, kaj sub formo de libro en la jaro 1928, sed tiu indikita stilo, ŝajne survoje al la pura poezio, ŝanĝis post ne longe, montrante la surrealsman, kiun li esprimis kvazaŭ verkante en prozo, sed kun akompano de certa romantikismo kiu faris ĝin pli alloga, kiel vi povas konstati en jenaj versoj de la poemo

Kiel naskiĝis la Amo

*Kiel naskiĝis la Amo? Tio okazis en aŭtuno.
Maturiĝis la mondo,
mi ne plu atendis vin. Vi alvenis kontenta,*

*iomete blonda, glitante sur la mildec' de l' tempo.
Kaj mi vin rigardis... Kiom bela mi vin trovis!
ridetante, rigardante la lunon ankoraŭ infana
dum la frua vespero kaj tial sen lumo klara,
gracia kaj emanante orajn brilojn allogajn,
same kiel vi alvenanta sur la bluo, sen kiso,
sed kun viaj blankaj dentoj amon sopiranta...*

Brilas tiun belan realismo kiun ni citis, kiu ekzaltas la belecon profundan de tiu poezio, kiu allogis nian generacion, kie ne ekzistas la rigoro de la ritmo kaj la deviga rimo, sed nur la poetika muziko libera de ĉiaj reguloj kaj esprimoj.

Lia loĝado en Madrido kaj forta inklino por la poezio ebligis lian kontakton kun la plej elstaraj tiutempaj poetoj loĝantaj en la "Rezidejo de Studentoj: García Lorca, Pedro Salinas, Luis Cernuda, Jorge Guillén, Rafael Alberti k.a., tio estas, kun la kerno de la tiel nomata "Generacio de 27a", grupo kiu celebris la tricentjaran datrevenon de la naskiĝo de la poeto Luis de Góngora y Argote en la jaro 1927 en Seviljo.

Superante malsanojn kiuj devigis lin loĝi en la kampo dum certaj ripozperiodoj, li sin dediĉis al la verkado kaj publikigis "Pasión en la tierra" (Pasio surtere) kaj en 1932 "Espadas como labios" (Glavoj kvazaŭ lipoj), kaj en la

jaro 1935, eble lia plej grava verko "La destrucción o el amor" (La detruo aŭ la amo", kiu meritis la Nacian Premion pri Literaturo.

Jen unu el liaj priamaj poemoj:

Kisoj

*Ne vin forgesu, tro frue, iun proksiman tagon,
La flugilhavaj kisoj ke vian buŝon karesis,
Kiu dum momento arde sur viaj lipoj premis,
Kiam via buŝ' akiras pura desegn', kiu allogis,*

*Tiuj kisoj tuŝetis viajn dentojn, kaj vi tuj sentis,
Ke en via buŝ' vibris kvazaŭ ĉielmilda plumaro,
Kaj viaj rondaj lipoj pulsas pro senlima feliĉo,
Kiu ne kisas tiujn birdojn kiam al viaj lipoj alvenas?*

*Duonmalfermita via buŝ' mi vidis viajn blankajn dentojn,
kiel ili inter la lipoj plezure ĝisfunde profundiĝis,
Kaj tiam, ho ĉielmalicul'! vi kun granda plezur' sentis,
Ke via korpo rapide, tre rapide, sentive leviĝis.*

*Kiom gracia, kiom delikata, kiom belsvelta vi regis!
Lumo aŭ birdoj alvenas, belaj plumaroj, puraj kisoj,
Kaj obskuriĝas via vizaĝo kun siaj varmaj flugiloj,
Kiu vin tuŝetas kaj dum kelkaj blindiĝas, vi brilas.*

*Ne tion forgesu. Feliĉaj, ili iras, revenas kaj eskapas,
Jen: ili flugas, suprenas kaj karese adoptas ilin la bluo,
Suprenas alten, orkoloran. Ili varme kaj eĉ arde
Ĝemas, kantas, splendas, kaj en la ĉielo deliras...*

En la jaro 1937, okaze de la morto de Federico Garcia Lorca li publikigis omaĝe al la poeto Federico Garcia Lorca, kontraŭ lia murdo, "Federico", verko profunde homama.

Dum la intercivitana hispana milito li ne povis publikigi ian ajn verkon pro lia progresema liberpenso, kaj post la milito li restis en nia lando, kaj en la jaro 1944 li publikigis la verkon "Sombra del Paraiso" (Ombro el la paradizo) kaj regule li daŭrigis publikigante aliajn verkojn en la sekvantaj jaroj.

En la jaro 1950 li estis elektita membro de la Reĝa Hispana Akademio kaj kiel kulmino de lia meritoplena verkado en la jaro 1977 ricevis la Nobel-premion pri Literaturo.

Vicente Aleixandre y Merlo, grava poeto el la "Generacio de 27a" forpasis en la jaro 1984.

Rafael Alberti Merelló (1902-1999)

Tiu ĉi elstara poeto naskiĝis en El Puerto de Santa Maria (Cádiz) kaj apartenis al tiu prestiĝa Grupo de poetoj nomata "Generacio de 27a".

En la jaro 1917 li translokiĝis kun sia familio al Madrido tuj montrante sian fruan inklinon por la pentraĵo, kaj kuraĝigita de la pentristo Vazquez Díaz ekspoziciis ĉe la "Salono de Otoño" (1920) kaj en la "Ateneo Madrileño" (1921, sed de tiu jaro li forlasis la pentraĵon kaj sin dediĉis plene al la poezio, kaj en 1922 li publikigis siajn unuajn versojn en "Horizontes" (Horizontoj).

En tiuj tagoj, ĉar pulmomalsana, li devis translokiĝi al la montaro Guadarrama (San Rafael) kie krom reakiri la sanon li jam definitive aktivis en la verkado de poezio.

Kiam li resaniĝis reiris al Madrido, kie li ofte vizitis la "Rezidejon de Studentoj", kontaktante kun la plej gravaj poetoj de tiu tempo: Garcia Lorca, Pedro Salinas, Jorge Guillén, Vicente Aleixandre, Gerardo Diego, Luis Cernuda, Buñuel k.a. kies alta kvalito kaj amikeco signifis por li gravan progreson en la verkado de poezio.

En 1925 Alberti ricevis la "Nacian Premion pri Literaturo" pro lia verko "Marinero en Tierra" (Maristo surtere), kio signifis envicigi lin kiel poeto inter la plej elstaraj. Li

kunlaboris en la fama "Revuo de Okcidento", kaj dum la diktaturo de Primo de Rivera li estis unu el la plej duraj kritikistoj de la diktatoro.

En la jaro 1927, okaze de la tricentjara datreveno de la forpaso de la grava poeto Luis de Góngora, la ĉi-supre cititaj poetoj, kaj kelkaj aliaj, decidis omaĝi ĉe l' Ateneo de Sevilo al la poeto Góngora, majstro de la baroka stilo, tiu Grupo de Poetoj, estis la plej elstaraj pri liriko en Hispanio dum la jaroj dudekaj: ilia pensado estis progresema, kaj kiel komuna celo ili volis ekzalti la belecon, laŭ la stilo de la hispanaj verkistoj de "La Ora Jarcento", ja ili sentis certan fascinon por la tradicia beletra stilo de tiu periodo de nia liriko: libera verso, metriko kaj ritmo ne-regula, uzo de metaforoj, kaj aliaj karakterizoj de tiuj verkistoj kaj poetoj. Tiu omaĝo okazinta en Sevilo konsistis pri publikaj prelegoj, recitado de poemoj k.t.p.

En 1928 li publikigis unu el la libroj kiu pli prestiĝigis lin "Sobre los Angeles" (Pri la anĝeloj), en kiu li superis antaŭajn stilojn.

En la jaro 1930 Alberti interkonatiĝis kun la verkistino Maria Teresa León, kun kiu li edziĝis, kaj ambaŭ fondis en 1934 la revolucieman revuon "Octubre" (Oktobro), per kiu ambaŭ esprimis ilian politikan opinion partoprenante en la kampanjo favore al la "Popola Fronto", kiu klare montris ilian komunistan opinion.

En 1936 eksplodis la intercivitana hispana milito kaj li estis elektita direktoro de la "Romantika Muzeo", dum tiu periodo li, kiel membro aktiva de la Komunista Partio kaj apartenanta ankaŭ al la "Asocio de Antifaŝistaj Intelektuloj" aktivis politike kontraŭ la nacia kaj internacia faŝismo per prelegoj, mitingoj kaj ĉiaj propagandaj elementoj.

Post la malvenko de la respublikanoj li ekziliĝis en Parizo, kie li laboris kiel parolisto de "Paris-Mundial", sed kiam la germanoj invadis Francion dum la tutmonda milito, antaŭ la evidenta danĝero nazi-faŝisma li translokiĝis al Sudameriko: Argentino kaj Uruguay, kaj fine de 1957 li jam translokiĝis al Romo kie li loĝis ĝis lia reveno al Hispanio.

La loĝado en Romo inspiris al li la elvokon de tiuj belaj panoramoj kaj etoso de lia hispana loĝejo kaj urboj kie li loĝis ekzilita antaŭ ol alveni al la itala ĉefurbo, kaj tiu sento li esprimis en tiu ĉi poemo:

Kion mi lasis pro vi

*Mi lasis pro vi miajn arbarojn, miajn karajn arbojn,
miajn hundojn sendorme dum nokte bojajantaj,
miajn urbojn kie mi loĝis dum miaj ekzilitaj tagoj,
eĉ la vintro de mia vivo kiun mi ĝuis ĉiam verkanta.*

*Mi lasis kortremon, skuon pro emocio sentanta,
eĉ lumon de emociigaj fajroj tute ne estingitaj,
mi lasis mian ombron en l'amikaj okuloj sangantaj
pro l' adiaŭoj en la trista hor' kiam mi estis foririnta.*

*Mi lasis tristajn kolombinojn apud fluanta rivero,
ĉevalojn sub la suno reflektanta sur la arenoj,
kaj mi lasis odori kaj kontempli la bluan maron.*

*Mi lasis pro vi, ĉion kion mi ĉiam konsideris mia...
Vi, donu al mi, Romo, ŝanĝe de miaj doloraj penoj,
tiom kiom mi lasis por posedi vin plenplene ĝojiga.*

La poezio de Alberti komencas imitante la stilon de la Kanzonaro kaj iom post iom pasas al la "gongorismo" kiun li baldaŭ forlasis per la simbola realismo jam aperinta en lia verko "Sobre los Angeles" kaj "Sermones y Moradas".

Rafael Alberti revenis en Hispanion en la jaro 1977, post la forpaso de la diktatoro Franco. Tiu jaro li estis elektita deputito de la Hispana Parlamento, sed baldaŭ li forlasis ĝin ĉar... "mi nur deziras nun vivi kun la popolo".

Laŭlonge de lia vivo li publikigis multenombrajn verkojn, tiom da, ke nur menciante la titolojn ni plenigus paĝojn kaj paĝojn, li ĉiam trovis la kunlaboron kaj instigon de sia edzino Maria Teresa León. En la jaro 1983 li ricevis kiel agnoskon al sia beletra bonkvalita laboro la Literaturan Premion "Cervantes" kaj en 1991 la "Premio Roma pri Literaturo", sed antaŭe li ankaŭ ricevis la Premion "Lenin de la Paco" (1965) kaj en Hispanio la "Nacia Premio de Teatro" (1980).

Li multe vojaĝis, en Eŭropo, Sudameriko kaj jam reveninta en nia lando tra Hispanio. En unu el tiuj vojaĝoj al Kanariaj Insuloj, li restis tre surtrprizita pro la eksterordinara bela ŝanĝo de la insulo Lanzarote, kies protagonisto estis Cesar Manrique, honore al li dediĉis jenan poemon, kiun mi trovis en la Muzeo de tiu insulo:

Lanzarote

Dediĉita al Cesar Manrique, paŝtisto de ventoj kaj vulkanoj.

*Mi revenas por renkonti mian lazuron,
mian lazuron kaj la venton,
mian splendon,
la ne-dettrueblan lumon,
kiun mi ĉiam revis por mia vivo.
Tie estas miaj rumoroj,*

*miaj forlasitaj muzikoj,
miaj unuaj paroloj
naskiĝintaj el espero,
mia koro naskiĝinta antaŭ ol siaj historioj,
serena maro, pura maro sen abismoj.
Mi volus, eble, morti, mortiĝi,
ĉar tio estas plua vivo, de la vent' subtenita
plifortigi sian vagantan lazuron kun la spiro
de mia kanzono ankoraŭ ne-deklamita.*

*Mi estis ja la kantisto
de tiom da travideblo
kaj povus denove esti protagonisto
kvankam ege elsangante,
tre profunde vundita,
plena de tiom da mortintoj
ke ili volus revivi akompanante la voĉon mian.
Sed morti mi ne volas
kvankam mi tion diru,
morti mi ja ne volas
ĉar la maro ne mortas
kvankam ĝi iam mortu...*

*Mia voĉo, mia kanto akompanos vin
tie supre, preter la aĝa mondo.
Mi venis ĉe vi por vidi vin kaj vin paroli,*

*sablaro kaj marbordo senfinaj, kiujn mi ne konas,
dunoj kaj nigraj lavadoj,
batitaj palmaroj, tutsolaj homoj,
ĉirkaŭbrakitaj de vulkanoj kaj maro.
Subtera tremo, mi avanco ĝis la ĉiel'.
Mi sentas ke loĝos ĉe mi la fajr' kiun ĉe vi loĝas.*

Rafael Alberti Morello, neforgesebla elstara poeto de la "Generacio de 27a" forpasis en Madrido en la jaro 1990.

Miguel Hernández Gilabert (1910-1942)

Tiu ĉi jaro, 2010²³, estas la centjara datreveno de la naskiĝo en Orihuela (Alicante) de la eksterordinara poeto Miguel Hernández. Mia naskiĝurbo, Callosa de Segura, distas nur sep kilometroj de tiu urbo, kaj eĉ antaŭ kelkaj jarcentoj ambaŭ estis unu sola urbo, ja ĉio grava kio okazis en unu el ambaŭ tuj oni komentis en la alia, do estis tute normale, ke kiam Miguel ekelstaris kiel poeto, ni, en nia urbo, jam sciis ĉion pri li. Dum tiuj tagoj mi tre junis, sed ĉar grupeto de kunlernantoj de mia lernejo tre plaĉis poezion, kiam ekaperis la unuaj poemoj de Miguel en la oriola gazeto "La Popolo" de Orihuela ni tuj havis kopion po ĉiu ni, pli poste ni sekvis plaĉe liajn viverojn.

Tiu ĉi simpla Antaŭparolo nur intencas persvadi vin pri la fidinda fonto de tiu ĉi prelego, sed mi ne plu longigu ĉi-tiun Antaŭparolon kaj komencu jam paroli pri la vivo kaj verkaro de nia poeto.

Miguel Hernández Gilabert naskiĝis en Orihuela en la jaro 1910 kaj iris al la lernejo "Santo Domingo" ĝis kiam li estis 15 jara kaj brile finis elementan bakalaŭron, ekde tiu aĝo li okupiĝis pri paŝtado de la patra kaprogrego.

²³ *Mi faris ĉi tiun prelegon en Coma-ruga, en la Internacia Esperanto-Semajno en la jaro 2010.*

Tiu tasko konsistis paŝti la kapraron ĉu tra la bedaro aŭ la montaro, kio ebligis la penseman paŝtiston ĝui de bela pejzaĝo kaj sana medio: la bedaro kun la oranĝarboj, palmoj, citronarboj kaj tuta verda panoramo; la montaro kun la profiloj de agavoj, nopaloj, urtikoj kaj la pura beleco de naturo, kaj tio estis kvazaŭ lirika mesaĝo por la estonta poeto, sed... senkulpigis min se mi iom enfazis tiun medion, ja tiu estas la sama kiun mi mem vivis en mia infaneco kaj adoleskanteco...

Ankaŭ, en tiu epoko, la paŝtistoj kutimis vendi frumatene tra la stratoj de la urbo la kaprolakton, kaj tiu estis ankaŭ la ĉiutaga tasko de Miguel.

Tuj post forlasi la lernejon kaj eklabori, Miguel Hernández komencis lerni aŭtidakte aliajn malfacilajn studojn, kaj allogita de la interesaj verkoj aperintaj tiuj tagoj, legis kaj legis profitante ĉiun minuton liberan, al la tiamaj gravaj verkistoj Gabriel Miró, Zorrilla, Ruben Dario, Juan Ramón Jiménez, kaj poste kun la helpo kaj konsilo de Luis Almarcha li ankaŭ legis al la granda aŭtoroj de la Ora Jarcento: Cervantes, Lope de Vega, Calderón, Garcilaso kaj Góngora.

Dumnokte li partoprenis en babilrondo gvidataj de Ramón kaj Gabriel Sijé kaj fratoj Fenoll, kiuj pritraktis, precipe pri novkatolikilaj principoj kaj literaturo, do tiuj dumtagaj studoj, legadoj, noktaj babiladoj kaj recitado de poemoj,

kontribuis al lia aŭtodidakta formiĝo, al kiu efike ankaŭ kontribuis la konsiloj, scioj kaj amikeco de Ramón Sijé, tiama studento en la Murcia Universitato, sed precipe estis la poezio kiu pli allogis al nia juna estonta poeto.

En la jaro 1927, la plej elstaraj hispanaj poetoj omaĝis en nia lando la tricentjara datreveno de la eksterordinara poeto Luis de Góngora y Argote (1561-1627), majstro de tre ellaboritaj kaj elegantaj metaforoj, sendube la plej alta kulmino de la baroka stilo. Partoprenis en tiu celebrado selekta generacio de junaj kaj tre gravaj poetoj, kiuj admiris kaj sekvis la gongoran stilon, ni citu inter ili al Garcia Lorca, Aleixandre, Gerardo Diego, Dámaso Alonso, Pedro Salinas, Cernuda, Alberti, Juan Ramón Jiménez k.a. Ilia nivelo estis tiel alta ke post ne longe kelkaj el ili estis elektitaj ĉu akademianoj, Nobelpremioj kaj plej altaj prestiĝaj distingoj.

Estis tiuj tagoj pri ekzalto de la poezio, ke Miguel Hernández verkas siajn unuajn adoleskajn poemojn, kiujn postaj monatoj oni publikigos en la loka gazeto "La Popolo" de Orihuela kaj "La Tago" de Alicante, kaj de tiu momento jam li ne plu lasos verki poezion.

Sed, kompreneble, ne ĉio estis por Miguel verki poemojn, kaj en la jaro 1931 li konatiĝas kun Josefina Manresa, tajlorino ĉe privata oriola entrepreno, kaj enamiĝas de tiu knabino tiel arde, ke li dediĉis al ŝi multenombrajn

poemojn kaj kiel en *ôtu* vera amo li konstante persistos en tiu sento *ôis* edzi \hat{g} o...

En tiu sama jaro Miguel voja \hat{g} as unuafoje al Madrido kun granda paka \hat{g} o de poemoj, certa presti \hat{g} o kaj la iluzio resti tie inter tiuj famaj poetoj, sed li fiaskis en siaj pretendoj, nur intervjuis lin du presti \hat{g} aj beletraj gazetoj "La Estampa" kaj "La Gazeta Literaria", fakte la *ô*utaga kunvivado en Madrido estis io tute malsama ol en Orihuela: la intensa bruo en la stratoj, la ne oftaj kontaktoj kun bonaj amikoj, certa nostalgio, do li decidis reveni al sia naski \hat{g} urbo.

Tamen li eliris el tiu mallonga restado en Madrido certaj konkludoj, li devis esti pli aktiva, pli dinamika, montri publike sian poezion, kaj efektive li tiel ekagis: en la kazino de Orihuela li deklamis plurajn el siaj poemoj, kaj en Alicante, post dokta publika prelego de sia amiko Sijé li denove recitis, ja siaj poemoj diverstemaj pla \hat{c} as al la publiko, same la duresprimaj kiel aliaj delikataj, jen poemo kiun li dedi \hat{c} is al amikino, en kiu, krom fajnesprima, li montras sian regadon de la okversaj strofoj kun la gongora stilo:

Oran \hat{g} floro

Purec-limo, bela flor' frida.

*Via ses-eĝa blankeco, komplemento,
en la ĉefmondo, el l'enspiro via
en certa mond' meztagon resumas.
Astrologo troas branĉar', multaj,
la verdo restadas ja ĉiam.
Artika flor' ĉe la sud' necesa
glitiĝas la bona voj' kanaria.*

Mi elektis ĉi-tiun poemon ĉar estas unu el tiuj kiuj sin prezentas adekvata por klarigi kiel Miguel Hernández uzas la metaforojn, certe iomete pli komplekse ol aliaj poetoj: kiel multaj el vi sendube scias, metaforo konsistas uzi vortojn kun certa imaga analogio kiu identigas unu kun la alia, vi povas trovi ekzemplojn en tiu ĵus citita poemo: la oranĝfloro estas la limo por atingi la purecon; "ses-eĝa blankeco" estas komplemento el la aromo kiu situas en la enspiro; kaj oranĝfloro estas ankaŭ artika floro kies falo estas necesa por la apero de la flava frukto, tio estas la citrono. En aliaj poemoj vi trovos, ekzemple, la vorto "fulmo" kiu signifas amo, do la titolo "La ne ĉesanta fulmo ekvivalentas al "la amo kiu ne ĉesas".

Ankoraŭ pli, Miguel Hernández sin sentas preta superi sin en la verkado, kaj tra tiu sento li publikigas en la jaro 1933 sian unuan libron "Fakulo pri lunoj", eldonita en Murcio, kiu estis tre bone akceptita de la kritiko kaj vekis

en sia interno la firman senton atingi la gloron de la grandaj poetoj.

En 1934 li fianĉiĝas kun Josefina, kaj duafoje vojaĝas al Madrido, kie li laboras kiel oficisto de José Maria de Cossio, kaj post ne longe li verkas la religian dramon "Kiu vidis vin, kaj vidas nun, ombra resto de iama brila esto", teatraĵo stilo Calderón, kiun publikigis José Bergamin en sia gazeto "Kruco kaj Streko". En tiu ĉi dua vojaĝo al Madrido li profitas pli efike sian tempon, ĉar laboras, verkas kaj ofte konversacias kun siaj novaj amikoj, la famaj verkistoj: Alberti, Cernuda, Aleixandre, Neruda k.a., kaj kiel poeto li aldonas al la gongora stilo la verkadon de altnivelaj sonetoj. Jen unu el la plej lirikaj kiun oni publikigis en tiuj tagoj:

Vi ĵetis al mi citronon

*Vi ĵetis al mi citronon, tiel amara,
per via mano varma kaj tiel pura
sen damaĝo al ĝia formo struktura
ke mi provis l' amaron el citronflava.*

*Kun la flava bato dolĉe letargia
transiris mi al febro sendorm' angora
mia sango sentis mordon tre doloran
sur la longa mama pinto eskvizita.*

*Sed kiam mi rimarkis vian rideton
kiu, kaŭzis vin la citronbatan sercon
al mia fremda malic-interna sento
dormiĝis mia sang' sur mia ĉemizo
kaj fariĝis pora kaj la Brust' or-stelo
blinduman pinton kaj gravan kor-aflikton.*

Sed Miguel tute ne povas forgesi sian amon, Josefina, kaj ĉar ŝi ne korespondas al li tiel pasie kiel li deziras, li eĉ en meditemaj momentoj pensas, ke eble ŝi ne amas lin, sed tuj li skuas tiujn pesimismajn pensojn kaj pli oftas sian korespondadon, sed ne nur la korespondadon, ĉar oftas ankaŭ la verkadon de poemojn dediĉitaj al ŝi, kiel tiu ĉi:

*Vi mortiĝas en mi ĉar el kast' sensiva...
Mi ja scias kaj konfesas, amo mia,
ke mi lekis la tener-vizaĝon vian
kaj forrabis dolĉan kison, agresiva.*

*Mi lekis la teneran vizaĝon vian
kaj de tiu memorinda okazaĵo
via vango, skrupulsenta al ekstazo
surter' falas senpetal' kaj flava ĉiam.*

*La fantomo de tiu kis-deliktinto
la vango vin persekutas tre persiste*

*ĉiufoje pli videble, nigra stilo.
Kaj sendorme, amo mia, kaj ĵaluze,
mi viglas vian buŝon ĵtiel zorge!
por ke ĝi ne translimiĝu malvirte.*

La amo de Miguel al sia amatino, ŝajne ne varme akceptita je la unuaj tagoj, ŝanĝiĝis iom post iom, kaj tial la antaŭaj amaraj strofoj en multenombraj poemoj, transformiĝis en laŭdaj kaj pasiaj esprimoj.

Ankaŭ ne li forgesas la vivon de Orihuela, la riĉan kaj belan bedaron, la priliteraturajn kaj prikatolikajn babiladojn, kaj ofte li verkas poemojn dediĉitajn al tiuj rememoraĵoj, kiam pensas pri la bedaro li diras:

*Jen kiel bona grundo kaj alt-kvalita!
ĝi allogas kiel la patrin-odoro,
dum la hoj' mia, kiun vent' iĝas oro,
kaj l' irigaci' lasas Brust-malfermita. ktp.*

Kiel vi bone povas kompreni, mi ne povas reciti al vi ĉiujn poemojn kompletaj, ĉar estas sufiĉe longaj kaj multenombraj, kaj se mi volus tion fari, mi bezonus verki plurajn librojn, ja li verkis plurajn centojn da poemoj, nur mi mencios tiujn versojn kiuj iel profilas sian personecon kaj poezion, kaj same kiel ni ĵus citis sian inklinon pri la oriola bedaro, ankaŭ ni montros sian allogon pri la

batalema hispana taŭro, kiun li uzas kiel simbolo de Hispanio, kaj jen kun kia energio li ĝin mencias:

*Ekstaru, hispana taŭro: leviĝu kaj tuj vekigu,
tute vekigu jam, nigra-ŝaŭma taŭro!
kiu enspiras lumon kaj ŝvitas ĉe la ombro
kaj koncentras en vi la marojn sub via fermita haŭto!*

Vekigu tuj, hispana taŭro! ktp

La amikeco de Miguel kun la progresemaĵoj poetoj Neruda, Alberti, Aleixandre k.a., kaj lia propra personeca evoluo, ŝanĝis iom post iom, ekde la konservativa katolika penso de nia poeto, al tiu kulturaspekta progresema kaj eĉ politikmaldekstra ideologio.

Liaj amikoj el Orihuela, kiuj bone influis en la religia poezio kaj sakra teatr-verkado de Miguel en la pasinto, tuj konstatis tiun ŝanĝon kaj per ilia korespondado premis lin resti en tiu konservativa penso, sed vane, ĉar post certa ideologia krizo, Miguel daŭris en sia progresismo, li estis ja homo kun matura penso kaj firme ekverkis jam en tiu direkto, kaj en 1936 kiam triumfis la politika unuiĝo "Popola Fronto" li aliĝis en la maldekstra "Pedagogiaj Misioj", kies celo estis instrui al la laboristaro.

Sed li ne forlasis la verkadon de poezio kaj apenaŭ li eksciis la murdon de la elstara hispana poeto Federico Garcia Lorca li verkis sian unuan elegion dediĉita al tiu poeto kaj amiko. Dum tiuj tagoj li publikigis "La neĉesanta fulmo" konsistanta je dudek sep sonetoj, preparis "La Taŭro", kaj pretigis "La siblo vundegita".

Estis je la komenco de la ĵus citita jaro, kiam forpasis la plej intima amiko de Miguel, Ramón Sijé, la doloro pro la morto de tiu karega amiko estis ja tre profunda, kaj la elegio kiun Miguel Hernández dediĉis al li, vere altnivela. Sentivece kaj dolore li esprimis lirike tion kion sia koro profunde sentis:

*Plorante, mi volas esti bedarano
por zorgi la ter' kie vi frue kuŝas
kaj sterkas, mia plej kara kompano.*

*Nutrante pluvojn kaj orgenan ĥoron
krom bukcentoj kaj senspira papavaro
sendolor' mi donos por nutraĵ' vian koron.*

*Tiom da dolor' en mia interno sentas
ke eĉ por enspir' mi dolor-lamentas.*

*Dura man-frap', ege malvarma bato
nevidebla hak' sovaĝe mortiga*

brutala puŝ' vin faligis, amato.

*Ne ekzistas pli granda vund' dolora
ĉar pli sentas via mort' ol mia vivo
ja pro mia malfeliĉo mi ploras.*

*Mi paŝas sur kadavro-stoploj lante
sen nenies varmo kaj senkonsola
el mia kor' miajn aferojn pensante.*

*La morto tre frue ekflugis haste,
frue vekigis l' aŭror' tiu mateniĝo
frue vi ruliĝas surtere draste.*

*Ne pardonebla la enamiĝinta morto!
Ne pardonebla la vivo malatenta!
Ne pardonebla la ter' kun nul-forto!*

*En miaj manoj storm' eksplodas
el ŝtonoj, fulmoj kaj stridantaj hako*

*Mi volas mini la ter' ĝis vin mi trovos,
kisi vian kranion mi ja celas,
malligi, revenigi vin mian horton.*

Vi revenos al mia hort' kaj fig-arbon

*tra la altaj skafaldoj de la floroj,
via anim' birdos en abel-ĉelaro.*

*el belanĝelaj vaksoj kaj laboroj
vi revenos al dolĉa soko-kvero
de la plugistoj revantaj amoroj.*

*Mi, gaja ĝis l' ombr' de miaj brov-haroj,
mia sango iros de flank' al flanko
dispute l' fianĉin' kaj abelaro.*

*Jam velkita veluro, via koro,
vokas kampon kun ŝaŭma migdalaro
per avara enamiĝinta voĉo.*

*Al la flugil-animaj belaj rozoj
de l' krema migdaluj' por konversado
mi petas vin veni ĉar ni parolos
longedaŭre, kara anim-kompano.*

Laŭ opinio de elstaraj intelektuloj kiel Ortega y Gasset, Marañón, Juan Ramón Jimenez k.a. "tiu elegio estas la plej brila verkita dum la tuta dudeka jarcento", kaj Sánchez Vidal opinias "estas kiel miksiĝo de nerudaj elementoj, kiuj eliĝas el la ruĝ-koloro de la sango kaj la

dionizia terinflua kanto en la kunteksto de cerbismo kaj konceptismo"

Kiam komencis la intercivitana hispana milito, 18a de julio 1936, Miguel Hernández aliĝis kiel voluntulo en la 5a Respublikana Regimento, kaj iom poste li pasis al la bataliono de "El Campesino", ambaŭ gvidataj de komunistoj, li sin sentis kiel maldekstra respublikano.

De tiu momento li vivis tre intense tiun militon, ĉar devis iri de unu batalfronto al alia en sia tasko propagandi la respublikanan kaŭzon kaj recitadi al la batalantoj la tagoj kiam ili ne estis en la avangardo de la batalfronto. Poemoj tiel popularaj kiel "La kanzono de la soldato edzo" aŭ "La knabo plugisto" inkluditaj en la libro "Popol-ventoj", disvastiĝis inter la soldatoj de la batalfronto kaj ofte Miguel devis ilin recitadi kiel propagando de la respublikanoj kaj por komplezi siajn kompanojn. Tiu estis unu el la poemoj kiu akiris grandan prestiĝon, jen tiuj interesaj strofoj:

*Popol-ventoj min kunportas
Popol-ventoj min kunportas,
popolventoj min trenantaj,*

*disigas en mia koro
kaj mian gorgon ventumadas.*

*Bovoj sian frunton klinas
senpotence tre malsovaĝa
antaŭ la punoj, la leonoj
sian frunton levas brava
kaj samtempe dure punas
per siaj akraj krifoj klamaj.*

*Mi ne loĝas en bov-vilaĝo
sed en loko kie svarmas
kusejoj por la leonoj
kaj interkrutejoj aglaj
kaj altaj taŭro-montaroj
kun korno-fiero aroganta.
Neniam ja kreskis bovoj
sur la vastaj stepoj hispanaj.
-Kiu sugestis meti jugon
sur la kol' de tiu ras' brava?
-Kiu baris venton uraganan
aŭ metis jugon aŭ bremson
nek haltigis la fulmon
kaj enfermis ĝin enkaĝa?*

*Asturia gento brava,
el kirasa ŝton' la vaska,
el ĝojo la valenciaj,
el anim' la kastiliaj,*

*kiel la grundo plugita
kaj kiel flugiloj aerumitaj,
andaluzoj kiel fulmoj
inter gitaroj naskiĝintaj
kaj forĝitaj sur ambosoj
el torentaj larmo-fluoj;
ekstremaduro el sekalo,
galegoj el pluvo milda,
katalunoj el firmeco,
aragonoj gento digna,
murcianoj el dinamito
frukte propaganditaj,
navaranoj, leonanoj mastras
hakojn, ŝviton kaj malsaton,
el la minoj grandaj reĝoj,
sinjoroj el la plug-laboro,
inter la radikoj homoj
kvazaŭ radikoj graciaj,
de la viv' al la mort' vi iras
de l' nenio vi iras al nenio
per jugoj oni volas vin puni
gento el fiherbo bandita
jugoj kiujn vi ja metos
sur iliaj dorsoj kanajlaj.
Jen krepusko de la bovoj
kiam ektagiĝas ruĝmateno.*

*La bovoj mortas vestitaj
en humilaj odor-staloj
dum agloj, leonoj, taŭroj
kun aroganta viv-sinteno,
kaj post ili la blua ĉielo
nek malklaras nek finiĝas.
L' agonio de la bovoj
la vizaĝojn ekstristiĝas
tiuj de la masklaj bestoj
l' universon pligrandigas.*

*Mian morton tute ne gravas
mortu mi kun la kap' alta.
Morta, dudekfojojn mortinta
la buŝ' sur hund-herbo raspa
kaj la dentoj kunpremitaj
kaj la barbo decidita.*

*La mort' mi atendas kantanta
kiel kantas ja la najtingaloj,
sur la fusiloj vere aĉaj
kaj meze de kruel-bataloj.*

En la sama stilo de tiuj poemoj ni devas citi "Popol-milito"
kaj "La homo gvatas".

En la jaro 1937, li profitas specialan permeson, forlasas la batalfronton kaj vojaĝas al Orihuela, kie li edziĝas kun Josefina Manresa, sed lia restado tie nur daŭris kelkaj tagoj kaj denove reiris al la batalfronto daŭrigante la antaŭan intensan taskon, tiel elĉerpiga ke li malsanis kaj pro kuracista decido devis ripozi en aparta vilaĝo.

La ĝojo pro la naskiĝo de sia unua filo kaj la profunda tristeco pro lia forpaso impaktis amare en la koro de la poeto, sed inspiris al li multajn poemojn, ekzemple "Filo el la lumo kaj la ombro" k.a.

Homo kiel Miguel, homama poeto kun profunda sentiveco, kaj malgraŭ sia firma idealo, la milito estis kruela kaj ne-akceptebla, sed ĉar tiu ĉi estis por defendi demokration kaj liberojn de la hispana popolo li ne nur ĝin akceptis, sed partoprenis ĝin kiel volontulo.

Inter septembro kaj oktobro de la citita jaro, li kun kvar artistoj vojaĝis al Sovetio por partopreni en Soveta Teatro-Festivalo, kiun Miguel dediĉis tre laŭdan poemon titolitan:

Rusio

*En trajnoj posedantaj vageman pasion
kiujn ilin instigas kaj movas per karb' kaj fero,
per streĉaj aeroplanoj kun plumar-fiero*

mi trakuras la laboristlandon plena da neĝo.

*De la vasta Rusio tra ĝiaj gajaj fenestroj
eliras laŭtvoĉon el manoj kaj maŝinoj
indikante inter virinoj "jen viaj fratinoj"
kaj klami inter viroj "jen viaj karaj fratoj. ktp*

Sed la evoluo de la intercivitana hispana milito tute ne favoris al la respublikanoj, precipe dank' al la efektiva helpo de Italio kaj Germanio al la militistaj ribelintoj. La sola bona novaĵo estis la naskiĝo de sia dua filo, kiun li dediĉis plurajn poemojn.

Tiu malfavora situacio de la respublikanoj devigis al li mediti kion li pensis pri tiu milito kaj kial li propravole batalis eĉ riskante sian propran vivon, kaj li deklaris skribante sur paperaĉo en la tranĉeoj mem: "Mi batalas por ke nia revolucio ne estu ebria agado kiu precipitu Hispanion al profunda ĥaoso, estas multaj la problemoj kiuj aperas ĉiutage, kaj konscia homo devas esti preta por solvi ilin ja tiuj estas popolaj problemoj".

Sed Miguel profunde homama kaj idealisto, kiu jam vidis proksima la malvenko de la respublikanoj, ne povis eviti certan deprimon antaŭ certaj doloraj milit-scenoj, riveroj da sango, malamo kaj hororoj, kiujn li ĉiutage perceptis, kaj poemis tiel:

La trajn' de la vunditoj

*Silento kiu pereas ĉe l' silento
en la fermitaj buŝoj de la nokto.
Ne ĉesas silenti eĉ strangolita.
Li parolas mort-lingvon el dronintoj.*

Silento

*Malfermas vojojn el koton' profunda,
mutigas la radojn kaj la horloĝojn,
haltigu l' mar-voĉon kaj kolomb-kanton
ja emociigas la revo-noktojn.*

Silento

*la voĉ-doloraj silent-palaj veoj
la muta trajno de la hom-suferoj.*

Silento ktp.

Je la komenco de la jaro 1939 naskiĝas la dua filo de Miguel, kiun li dediĉis multajn sensivajn poemojn. Li ankaŭ laboras en la libro "La homo gvatas".

Kaj neeviteble, laŭ oni povis percepti, venis la milito-fino kun la malvenko de la respublikanoj. La batalantoj forlasis la tranĉeojn, kaj Miguel fuĝis al Portugalio, sed vane, ĉar la faŝistaj portugalaj aŭtoritatoj liveris lin al la hispana civilgvardio de Franco kaj li estis enkarcerigita, sed li ne haltis en sia verkado kaj enkarcere verkis tragikan lulkanton "Lulkanto pri la cepo", estis la konstato pri la terura malsato kiun ekvivis la hispana popolo, kiu daŭris jarojn kaj jarojn. Jen kelkaj strofoj de tiu bela poemo:

Lul-kanto pri la cepo

*La prujn' estas la cepo
povra kaj fermita:
prujn' de viaj tagoj
kaj de l' noktoj miaj.
Malsat' kaj cepo
Prujn' kaj glaci-nigra
granda prujn-peco.*

*Sur la lulil' malsata
kuŝis mia fil' kara.
Per cepa sango
li sin mam-nutras.
Sed via sango
el suker' prujnita,*

cep' kaj malsato.

*Iu bruna virino
en la lun' solviĝas
fluet' post flueto
falas sur la lulilon,
ridu kara bebo
ke vi se necese
englutas la lunon. Ktp*

La delikata sano de Miguel ne povis rezisti la duran translokiĝon de unu al alia karcero, unue al Huelva, Seviljo, Madrido, sed fine li estis liberigita dum kelkaj tagoj, kaj reiris al sia hejmo. Grava eraro ĉar la reganta malam-etoso estis granda, kaj li estis denove enkarcerigita ĉe la prizonoj de Palencia, Ocaña kaj fine en Alicante, sed malgraŭ lia delikata sanstato li daŭrigis verkante vibrantan poezion "Kanzonaro kaj Romancaro pri forestoj".

En la jaro 1940, li estis mortkondamnita, sed sekve li rivevis punŝanĝon, tridek jarojn da mallibereco, kio tute ne mildigis lian spiriton kaj ankaŭ ne sian sanstaton, kaj li grave malsanis.

La 28an de marto de 1942 forpasis en la malsanulejo de la karcero de Alicante, Miguel Hernández, unu el la plej elstaraj hispanaj poetoj de la pasinta jarcento.



Antonio MARCO BOTELLA, naskiĝis en la jaro 1921 en Callosa de Segura (Alicante), kaj nun estas emerita industria teknikisto. Li esperantistiĝis en 1937, kaj ekziliĝis tuj post la fino de la interci vitana hispana milito en Alĝerio, kie li ankoraŭ tre juna gvidis siajn unuajn Esperanto-kursojn en la alĝeraj urboj Boghari, Cherrhell kaj Oued-el Alleug...

Denove en Hispanio li strebis por revivigi la ankoraŭ malpermesitan Esperantan Movadon en pluraj urboj, kion li atingis en Zaragozo (1949) gvidante Esperanto-kursojn, precipe por gejunuloj, tiel efike, ke la ĵusvenintoj renovigis la esperantistan aktivadon de la veterana E-Societo "Frateco".

Elstara organizanto de la Hispanaj Esperanto-Kongresoj en 1954, 1983 kaj 2013, kaj en 1986 la SAT-Antaŭkongreso de Ordesa, li viglis kiel Sekretario de la menciita Zaragoza E-Societo kaj kiel Prezidanto de "Fundación Esperanto". Krome, li estis ofta preleganto ĉiujare en la Internacia Esperanta-Semajno.

Li estis ĉefredaktoro dum naŭ jaroj de "Boletín" de HEF, kaj "Kajeroj el la Sudo", kaj kunlaboris per oftaj artikoloj en "Sennaciulo", "La Gazeto", "Sennacieca Revuo" k.a.

Li estas aŭtoro de jenaj verkoj: "Kroniko el la historio de "Frateco" (1983); "Analoj de la Hispana Esperanta Movado" (1987) du volumoj; "Sesenta años de Esperanto en Callosa" (1992); "Lirikaj Perloj de Al-Andalus" (1995); "Laboristaj Kronikoj" (1996); "Un siglo de esperanto en Aragón" (2000); "Esperanto en la Valencia Komunumo" (2001) "Vivo kaj verkaro de Julio Mangada" (2003) en festlibro por Fernando de Diego "Klaro kaj Elasto"; "La popolstilo de Garcia Lorca" (2004), en la libro "La deka logo"; "Esperanto en Katalunio" (2005); "La odisea del Stanbrook" (2007); "Crónicas del movimiento obrero esperantista" (2009); "Episodios y leyendas callosinas" (2012).

"Hispana Lirika Antologio", kiun ni prezentas hodiaŭ al niaj legantoj, priskribas la historion de nia hispana liriko ekde la lastaj jarcentoj de la araba okupado, (naskiĝo de nia Liriko) ĝis la nuna periodo, kaj ekzaltas la plej gravajn poetojn de tiuj jarcentoj kun la poemoj plej gravaj de ĉiu el ili.

